

IL POPOLO CINIO

中國報道

3 1988





Ŭang Juĉin (la tria de dekstre) intervjuas en la 71-a UK en Pekino.

Nan Joŭli ĉiĉeronas por fremdlandaj esperantistoj.



VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Esperantista familio

Fotoj de Haj Feng

S-ro Nan Joŭli kaj lia edzino Ŭang Juĉin estas esperantistoj kaj laboris jam pli ol 20 jarojn en Radio Pekino. Ŭang Juĉin estas anoncistino kaj Nan Joŭli laboras kiel raportisto. Radio Pekino ĉiutage disaŭdigas en Esperanto, kaj ili ambaŭ multe dediĉis sian energion al tio. S-ro Nan Joŭli estas ankaŭ vicĉefsekretario de la Pekina Esperanto-Asocio. Li ofte ĉeestas ĝian aktivadon kaj akceptas fremdlandajn geesperantistojn.

Ŭang Juĉin (dekstre) parolas en radio.



Nan Joŭli (maldekstre) okupiĝas pri aranĝo de arta vespero de la Pekina Esperanto-Asocio.



Post intensa laboro estas gajaj horoj en la hejmo. Ili havas ĉarman filinon, kiu lernas en mezlernejo. Influate de la gepatroj, ŝi lernis abocan de Esperanto.

Dimanĉo ĉiam estas la plej agrabla tago por ili. Kiam la patro kaj la filino ludas vejĉi-on, la patrino estas ilia juĝanto.

S-ro Nan Joŭli kaj s-ino Ŭang Juĉin ĉiu havas sian maljunan patrinon, kaj en ferioj ili venigas la maljunulinojn por kune ĝui agrablajn horojn kaj bongustajn manĝaĵojn. La ĉambro estas saturita de gajeco kaj harmonio pro la renkontiĝo de la tri generacioj.



La patro kaj la filino en vejĉi-ludo

La tri generacioj



ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Ĉampiono de arta gimnastiko

La 17-jara Pang Ĉjong estas nova stelo de arta gimnastiko de Ĉinio. Ŝi gajnis la ĉampionecon en la Tutlanda Konkurso de Arta Gimnastiko de 1986 kaj en la Sesa Tutlanda Sportkunveno de 1987. Ŝiaj movoj estas graciaj, rapidaj kaj malfacilaj. Ŝi povas turniĝi je 1 080 gradoj. En la lastaj jaroj ŝi partoprenis kaj multe sukcesis en pluraj internaciaj konkursoj.

Foto de Ĉeng Ĝiŝan

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Esperantista familio

Fotoj de Haj Feng

ĈINAJ ARTOJ:

Ĉinaj porcelanaĵoj

SUR LA DORSKOVRILO:

(ĈINAJ POŝTMARKOJ)

Tutlandaj sportkunvenoj de Ĉinio

- 2 Granda konkurso de ĉinaj sportistoj
- 6 La ekonomio de la Ŝjangŝji-a Subprovinco en disvolviĝo
- 16 Kemiindustria urbo sur Mjaŝŝan-monto
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (15): Ĝjaling-rivero
- 19 Ŝanhajo, lulilo de la ĉina Esperanto-movado
- 22 SUR NIA LIBROBRETO: Granda pando vizitis mian hejmon
- 24 ESP-NOVAĴOJ
- 23 POR KOMENCANTOJ: Gitaro; Mia amiketo
- 26 Edukado rapide disvolviĝas en Janbjan
- 29 ĈINA MEDICINO: Diaĝnozaj metodoj de la ĉina medicino
- 39 NOVELO: Bofilino de malproksime
- 41 ĈINA LITERATURO:
 - Li Baj, granda romantika poeto
 - Elektitaj poemoj de Li Baj
- 46 Pordo malfermita al la monda akrobatiko
- 32 ĈINAJ ARTOJ: Ĉinaj porcelanaĵoj
- 49 Edzoj loĝantaj en edzinaj hejmoj
- 51 ĈINAJ MOROJ: Porti surdorse novedzinon
- 12 Hemudu-kulturo
- 52 1988, draka jaro de Ĉinio
- 67 La bela pitoreskejo Ulingjŭan
- 66 Sin gardi de internacia egoismo
- 64 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Bonaŭguraj animaloj en Ĉinio
- 62 KURANTAJ AFEROJ
- 48 KORESPONDI DEZIRAS
- 45 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50

Granda konkurso de ĉinaj sportistoj

Finiĝis la Sesa Tutlanda Sportkunveno de la Ĉina Popola Respubliko, kiu daŭris 20 tagojn kaj akiris bonajn sukcesojn. Profunde impresis la ĉeestantojn ĝiaj solenaj kaj varmaj scenoj kaj streĉaj kaj brilaj konkursoj.

SUKCESAJ KONKURSOJ


Posttagmeze de la 20-a de novembro 1987 la nomita sportkunveno deklaris sian malfermiĝon en la centra konkursejo — la Tjanhe-a Sporta Centro de Kantono kun 60 000 sidlokoj.

Post la malferma ceremonio okazis granda kolektiva gimnastiko titolita “Supernuba Volo”. Estas malfacile resumi ĝiajn trajtojn per simplaj vortoj. Ĝi koncentris liniojn, kolorojn, forton kaj melodion por la ĉefa bildo kaj montris la energian strebon de la ĉina popolo kaj ĝian bravan volon por potencigi la ĉinan nacion.

En la 21-a komenciĝis streĉa konkurso.

Unue ni rigardu la halterlevan konkurson. La Ĝuangdong-a sportisto de la pezkategorio de 52 kg. He Ĝŭoĉjang, konata kiel “Nigra Perlo”, levis per

He Ĝŭoĉjang kreis la mondajn rekordojn de la dumana ŝiro kaj la totala poentaro de la pezkategorio de 52 kg. per levo de 117.5 kg. kaj 265 kg. respektive. Jen li en la konkurso.





Ŭang Ŝiŭting (la unua) el Ŝandong-provinco en la konkurso de la virina 5 000-metra kuro

dumana ŝiro halteron de 117.5 kg. super la kapon. La tri lampoj sur la poenta tabulo eklumis kaj anoncis la sukceson de la halterlevisto.

La spektantoj emocie eksaltis de sur siaj sidlokoj. Tra la tuta halo sonoritis manklakado kaj aklamo. En la sama tago tiu 20-jara sportisto rompita du mondajn rekordojn de halterlevo. Post tio alia sportisto He Jingĉjang rompita la mondan rekordon de halterlevo per dumana ŝiro en la pezkategorio de 56 kg. Estis la unua fojo, ke ĉinaj halterlevistoj akiris tiajn sukcesojn en unu konkurso kaj rompita mondan rekordon de la totala halterleva pezo.

Streĉe iris konkurso de la 100-metra rapid-naĝo en la naĝa domo de la sporta centro. Pli ol 3 000 spektantoj kriante rigardis la ŝanhajan sportistinon Ĝuang Jong naĝantan en la kvara leno, kiu, forte movante siajn brakojn, rapidis al la fina loko. 56''57 — kreigis nova azia rekordo de 100-metra rapid-naĝo.

La naĝa sporto de Ĉinio plurjare estis sur malalta nivelo, sed disvolvigis rapide en la lastaj jaroj kaj eniris en la avangardan vicaron de Azio. La Hejlongĝjang-a sportistino Hŭang Ŝjaŭmin atingis la duan lokon de la mondo en la virina 200-metra brusto-naĝo, je 0.38 sekundo malpli rapide ol la

monda rekordo 2'27''40. La ŝanhaja naĝisto Ŝen Ĝjanĉjang gajnis sep orajn medalojn, kio estis senprecedenca en Ĉinio.

Ofte pluvis kaj ventis dum la sportkunveno. Tio estis malfavora al atletiko. Tamen multaj atletoj akiris bonajn sukcesojn. La Ŝandong-a sportistino Ŭang Ŝiŭting atingis la sesan lokon de la mondo en la virina 10 000-metra kuro. La Hebej-a sportistino Li Mejsu ĵetis pezglobon je 20.95 metroj. Tio signifas, ke ŝi enviciĝis inter la gajnintoj de la unuaj ses lokoj en la mondo. La Fuĝjan-a sportistino Liŭ Hŭaĝin je 0.04 sekundo superis la azian rekordon de 100-metra barierkuro, kiun oni tenis dum 17 jaroj.

La ĝojgaj informoj el la naĝa kaj atletika konkursejoj montras la bonajn sukcesojn de la ĉinaj sportistoj akiritajn dank' al energia strebado kaj scienca trejnado kaj inspiras al ili plialtigon de konkura kapablo en la venontaj olimpikoj.

Kiel tema konkursa sportbranĉo la artonaĝo donis belan ĝuon. La teamo de Ĝuangdong-provinco allogis spektantojn per sia brila prezentado. En akvo tri junulinoj ĵetis alten unu junulinon kaj poste rekaptis ŝin. La ĵeto ne estis malfacila, sed la rekupto de la vertikala falanto estis malfacila. Per tiu nova malfacila movo la teamo gajnis la plej altan poentaron kaj fariĝis ĉampiono.



Gimnasto Loū Jun el Ĝeĝjang-provinco gajnis orajn medalojn de kunmetita konkurso, ĉevalado, paralelado kaj grundgimnastiko.



Hūang Ŝjaŭmin en la konkurso

Tabloteniso, volanludo kaj plongo delonge estas fortaj sportbranĉoj de Ĉinio sur la monda sporta tereno. Pri ili oni intense konkuris en la sportkunveno. Pluraj eminentaj sportistoj estis venkitaj. La pasinteco ne atentataj ĵudo, lukto, remo kaj aliaj olimpiaj ludoj estis multe altigitaj teknike.

En la sportkunveno Ŝanhajo kaj Gŭangdong-kaj Ljaŭning-provincoj gajnis plej multajn poentojn kaj medalojn kaj konservis sian antaŭan pozicion. El iuj provincoj antaŭe kun meza nivelo aperis nombro da elitaj sportistoj, ekz. Li Ĉaŭĵang de Ŝenŝji-provinco superis kaj egaligis respektive unu mondan rekordon de pafado kaj la 12-jara Jang Bo de Ĝeĝjang-provinco gajnis la ĉampionecon de trabado.

Ĉinaj sportistoj en la sportkunveno de la prepara konkurso kaj maratono ĝis la konkurso finiĝinta en Kantono rompis 17 mondajn

rekordojn, egaligis 3 mondajn rekordojn, rompis 48 aziajn rekordojn kaj plej bonajn aziajn rezultojn kaj 83 ĉinajn rekordojn. La sukcesoj estis pli brilaj ol tiuj en ĉiuj pasintaj tutlandaj sportkunvenoj. Tio montras, ke Ĉinio havas sportan armeon kun sufiĉe solida bazo. Ĝi ne nur tenis sian superecon en malmultaj sportbranĉoj, sed ankaŭ akiris ĝojigan progreson en iuj sportbranĉoj longperiode malfortaj por ĉinaj sportistoj.

MALTRANKVILO KAJ KURAĜIGO

La fama altosaltisto Ĝu Ĝjanhŭa, dufoje rompinta la mondan rekordon en 1983, transsaltis 2.24-metran alton kaj gajnis atletikan oran medalon solan por la ŝanhaja teamo.

La spektantoj kaj manklakadis kaj bedaŭris. Ĝu Ĝjanhŭa staris sen rido sur la premia podio. Oni bedaŭis, ke vundo kaj malbona vetero malhelpis lin akiri pli bonan rezulton. Ĝu kaŝis la ĉagrenon en la koro kaj direktis sian celon al la venontjara monda konkurso.


Ankaŭ en la konkurso de aliaj sportbranĉoj oni vidis esprimon de bedaŭro de spektantoj. Ili estis maltrankvilaj pri la nesufiĉeco de forta rezerva sportistaro de Ĉinio.

En la konkursejoj de piedpilkado, korbopilado kaj flugpilkado preskaŭ ĉiuj plej okulfrapaj sportistoj estis famaj membroj de la ŝtataj teamoj. La spektantoj malofte havis ŝancon por aklami novicojn. Ankaŭ en la atletika konkursejo la gajnintoj de ĉampionecon plejparte estis veteranaj sportistoj. Tiuj, kiuj plurfoje kreis rekordojn en la naĝejo, estis steluloj fame konataj. En pafado, plongo kaj gimnastiko aperis talentaj novicoj, kiuj tamen estis tro malmultaj.

En la Kvina Tutlanda Sportkunveno estis nur kvar neolimpiaj konkursaj ludoj, kiuj ĉi-foje tamen pliiĝis al 18. Ofte okazis, ke unu altnivela sportisto devis partopreni en pluraj konkursoj. Tio malhelpis ilin akiri pli bonan rezulton kaj kaŭzis, ke novicoj perdis ŝancon partopreni en la konkurso. Oni esperas, ke la sportaj departementoj atentos kaj iom post iom forigos la mankojn.

La Sesa Tutlanda Sportkunveno okazis en la reforma kaj malferma periodo de Ĉinio kaj estis gravaj preparo kaj provo por organizi kaj okazigi grandan mondan sportkunvenon en la estonteco. S-ro Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, diris post la sportkunveno: "Unuaklasa organizado, unuaklasaj instalaĵoj kaj unuaklasa popolo." La ĉinoj tenas en la memoro liajn varmajn kuraĝigojn kaj faros pli grandajn klopodojn por disvolvi la azian kaj la mondan sporton. ■

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO



ALBUMO PRI ĈINIO

Kompil. la redakcio de "ĈINIO". 96p. 25cm. 85-Es-175P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Kun pli ol cent koloraj bildoj konigantaj Ĉinion pri ĝiaj geografio, historio, popolo kaj registaro, ekonomio, literaturo kaj arto, sciencoj, edukado, higieno kaj sporto, vidindaj lokoj kaj socia vivo.

VOJAĜO TRA ĈINIO

Kompil. la redakcio de EPĈ. 136p. 26cm. 85-Es-284P
Prezo: £8,80 US\$12,50

La albumo konigas 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorĝojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn. Kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj.

40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO

Trad. Censinio. 252p. 18.5cm. 12-Es-1825P
Prezo: £1,90 US\$3,90

Gvidlibro pri 40 plej famaj pitoreskejoj en Ĉinio. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos en ĝi ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj bildoj kaj ilustraĵoj.

PITORESKA PEKINO

Trad. Zoŭ Guohiang k.a. 74p. 18.5cm. 17-Es-1827P
Prezo: £0.95 US\$2,00

La libreto kun mapo, pentraĵo kaj koloraj bildoj, konigas 19 vidindejojn en Pekino. En la enkonduka artikolo "Pekino hieraŭ kaj hodiaŭ" oni skizas la historion kaj evoluon de la urbo.

DEK SES URBOJ DE ĈINIO

176p. 18.5cm. 17-Es-1885P. Prezo: £1,90 US\$3,90

La ĝenerala skizo pri la historio, ekonomia konstruado, kulturo kaj eduko k.a. de 16 ĉinaj grandaj urboj. Kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj.

GVIDLIBRO PRI PEKINO

Kompil. Laj Hajlong. 150p. 18.5cm. 12-Es-2067P.
Prezo: £1,55 US\$2,85

Ĝi servas kiel helpanto al vizitantoj al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn ktp. Kun mapo kaj koloraj bildoj.

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Peranto de EPĈ

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio**
de Ĉinio, Esperanta Sekcio, P.O.
Kesto 313, Bejiing, Ĉinio

La ekonomio de la Ŝjangŝji-a Subprovinco en disvolviĝo


La nomita subprovinco situanta en la nordokcidenta parto de Hunan-provinco estis rigardata kiel "cekumo de Ĉinio" kaj "infero de la homa mondo" antaŭ duonjarcento. Kvankam tie belis pejzaĝoj, altis montoj, prosperis arbaroj, ĉie troviĝis riveretoj kaj valoj, tamen pro la danĝeraj montoj malfacilis trafiko. En longa tempo tie loĝantaj tuĝja-oj, mjaŭ-oj, jaŭ-oj kaj aliaj nacimalplimultanoj estis tre malriĉaj kaj sin vivtenis per primitiva kultivado per fajro kaj tranĉilo kaj ĉasado. Ili kontaktiĝis malmulte kun la ekstera

mondo kaj ofte estis trompitaj de fikomercistoj. Tie cirkulis popolkanto:

*Da riz' dekalitro por plenman' da salo,
Ĝi devas ja sufiĉi eĉ por duonjaro.
Ni vivas el kultiv' de virga tero,
Transportas per la propra ŝultroparo.*

Tiam banditoj tiranis senskrupule en la regiono. Tio faris vastajn kampojn dezertaj kaj la popolan vivon mizera. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la armeo sendita de la

Rikolto



popola registaro ekstermis pli ol 40 000 banditojn kaj likvidis la centjaran banditan furiozon en la regiono. Nur tiam la diversnaciecaj popolanoj restarigis normalajn produkton kaj vivon. Aŭguste de 1952 oni tie ekpraktikis regionan naciecan aŭtonomecon, kaj en la 20-a de septembro 1957 oficiale fondiĝis la Ŝjangŝji-a Tuĝja-Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. Je la 30-a datreveno de la fondiĝo de la subprovinco mi invitite partoprenis en la celebrado. Profunde impresis min ĝiaj popolanoj, urboj, urbetoj, minejoj, pejzaĝoj kaj vidindejoj.

Laŭ mia sperto trafiko estis la plej granda malfacilo por viziti malproksimajn montregionojn kaj lokojn loĝatajn de nacimalplimultoj. Kiel status tie la trafiko? Antaŭ 40 jaroj tien trapasis nur la Hunan-Siĉŭan-a Ŝoseo, kies sektoro en la subprovinco kun longeco de 178 km. estis mallarĝa, zigzaga kun multaj danĝeraj pontoj. Sed nun ŝanĝiĝis la stato. Oni povas veturi trajne de Pekino al Hunan- aŭ Hubej-provinco, de kie oni povas veturi al Ĝjiŝoŭ, la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco per trajno laŭ la Ĝiĝjang-Liŭĝoŭ-a Fervojo. La pli-ol-4 300-km-a ŝoseo de la subprovinco kunligas 98.3% de ĝiaj urbetoj kaj vilaĝoj kaj tute ŝanĝis la pasintan izolecon. La favora trafiko akcelis la totalan disvolviĝon de la subprovinco.

En mia imago Ĝjiŝoŭ estas monta urbeto. Sed ekster mia atendo, elvagoniĝinte mi rondire vizitis ĝin per aŭto, akompanate de stiristo sinjoro Ŭang, kaj vidis larĝajn stratojn movoplenajn kaj ombratajn de verdaj arboj, etaĝdomojn en diversaj formoj kaj stiloj, konstruejojn kun alte levita gruo, homplenajn magazenojn kaj foirojn, mode vestitajn pasantojn. Ĝi evidente estas nova urbo. Ŭang diris al mi, ke jam en la jaro 1070 la registaro de Song-dinastio starigis tie urbetan registaron, sed ĝis 1950 ĝi restis urbeto kun pli ol 9 000 loĝantoj. En 1982 sankciite de la ŝtata konsilantaro Ĝjiŝoŭ fariĝis mezgranda urbo. Ĝi estas monturbo kun 70 000 loĝantoj kaj areo de 28 kvadrataj km. kaj la politika, ekonomia, kultura kaj trafika centro de la subprovinco.

La subprovinco havas abundajn naturajn riĉfontojn, sed al tiu fekunda tero en la pasinteco mankis moderna industrio, en Ĝjiŝoŭ ne estis vera fabriko. Eĉ desegnonajloj, kudriloj, alumetoj kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj estis liverataj de aliaj lokoj. Post 30-jara konstruado la aŭtonoma subprovinco havas certaskalajn industriojn malpezan, tekstilan, elektroenergian, karban, forstuman, konstrumaterialan, metalurgian, mekanikan, farmacian, ledan kaj tiun de nacimalplimultaj bezonaĵoj. Nun la subprovinco havas pli ol 1 000 ŝtatajn kaj kolektivajn entreprenojn kun totala produktov valoro de 0.54 miliardo da ĵuanoj (laŭ statistiko de



Geteknikistoj de kemisterka fabriko en eksperimentado

1986). Precipe la malpeza kaj tekstila industrio disvolviĝis rapide, sinsekve konstruiĝis fabrikoj de cigaredoj, alkoholaĵoj, papero, sukero, tekstilaĵoj, plastaĵoj, alumetoj, sapo, ledaĵoj kaj mangaĵoj. La subprovinco nun produktas tekstilaĵojn de pli ol 100 specoj kun pli ol 2 000 markoj, interalie subvestoj kaj tualet-tukoj vendiĝas en Japanio, Hongkong kaj Aŭmen. La brando produktita de la Ĝjiŝoŭ-brandofarejo estis juĝita kiel bonkvalita produktaĵo de Hunan-provinco en sinsekvaj jaroj pro siaj klareco, milda, agrabla kaj longdaŭra aromo.

Kun disvolviĝo de la malpeza kaj tekstila industrio, disvolviĝis ankaŭ la karba, kemia, elektroenergia kaj metalurgia industrioj kun celo utiligi kaj ekspluati la lokajn riĉfontojn. La aŭtonoma subprovinco havas abundajn hidraŭlikajn riĉfontojn kaj konstruis en la krutaj lokoj kun torenta akvo proksimume 500 malgrandajn montregionajn hidroelektrajn centralojn, kiuj ĉiujare produktas proksimume 200 milionojn da kilovattthoroj da elektro.

Pro la abundaj subteraj mineraloj, la tieaj minekspluatado kaj la koncernaj kemia industrio kaj prilaborado rapide disvolviĝis. Nun la sulfura, fosfora, karba, alumini-zinka kaj mangana ekspluatado kaj produktado atingis certan skalon. Interalie la Puŝi-a Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Luŝji-gubernio estas atentiga kaj fariĝis produkta bazo de fosforaj produktaĵoj kun certa skalo.

En la lastaj jaroj la subprovinco energie disvolvis diversajn horizontalajn kontaktojn, plene utiligante siajn naturajn riĉfontojn. Ĝi sinsekve starigis ekonomiajn kunlaborajn rilatojn, sub-



Mjaŭ-aj virinoj en foiro

skribis kunlaborajn kontraktojn kun 38 regionoj de 18 provincoj kaj municipoj, inkluzive de Ŝanhajo, Nankino, Pekino, Gŭangdong-provinco kaj la urbo Ŝjangtan, enkondukis kapitalon kaj alvenigis teknikajn laborantojn. Tio kombinis la avantaĝon de la subprovincaj riĉfontoj kun alilokaj talentuloj, teknikoj kaj kapitalo kaj pliiĝis novan forton por disvolvi la ekonomion.

La nacikostuma fabriko de Ĝjiŝoŭ starigis kunlaboron plej frue kun Ŝanhajo. Helpate de la ŝanhajaj teknikistoj ĝi pliiĝis ekipaĵojn, altigis administran kaj teknikan nivelon kaj ekposedis merkatajn informojn. Tio ebligis al ĝi altigi la kvaliton de produktaĵoj kaj duobligis la produktokvanton, ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en 22 najbaraj gubernioj kaj urboj. La bovaj feloj de Ĝjiŝoŭ estas bonkvalitaj, sed la produktaĵoj de la Ĝjiŝoŭ-a Leda Fabriko estis kvalite malbonaj pro malalta teknologio kaj malorda administrado. Marte de 1985 iu leda fabriko de Ŝanhajo sendis 13 fakulojn, inkluzive de vicfabrikestro, ekonomikisto kaj inĝenieroj, al la Ĝjiŝoŭ-a Leda Fabriko por fari


totalan teknikan kunlaboron postulante pagon de teknika servo. Ili trejnigis por ĝi administrantojn, plibonigis ekipaĵojn, difinis specialajn ekzamenistojn kaj determinis normojn por kvalita ekzameno. Ĝia produktado rapide normaligis, la kvalito stabile leviĝas kaj la produktaĵoj havas grandan debiton en merkato.

Kvankam en la subprovinco estas multaj montoj kaj apikaj montpintoj, tamen la grundo estas fekunda, klimato milda, pluvo abunda. La aluviaj ebenaĵoj kaj basenoj ambaŭflanke de riveroj taŭgas por agrikulturaj plantoj, tie produktiĝas rizo, maizo, milio, sojfabo, azukio ktp. En 1957, kiam fondiĝis la aŭtonoma subprovinco, la produkta metodo estis postiginta, ĝia totala grena produktokvanto estis nur 480 000 tunoj. Sed nun la produkta metodo estas multe progressa kaj la reformo praktikata en la lastaj jaroj tie donas frukton. En 1986 la totala produktokvanto de greno atingis 980 000 tunojn, ankaŭ la produktokvantoj de oledonaj plantoj, tabako, fruktoj, teo, lino kaj aliaj ekonomiaj plantoj kreskis duoble. Tio certgrade plibonigis la vivon de la kamparanoj.

En la montaj regionoj nombro da familioj kun forstumado kiel la ĉefa okupo fariĝis grava forto por disvolvi forstumadon. La montdekliva herbejo en Ŝjangŝji estas ideala loko por brutobredado, tial ĝi estis difinita de la ŝtato kiel bazo de viandobovoj.


Ĉar en la pasinteco la ekonomio de la subprovinco estis tro postiginta, kvankam ĝia industri-agrikultura produktado multe disvolviĝis en la pasintaj 30 jaroj, precipe en la lastaj jaroj, tamen ĝi ankoraŭ estas kompare postiginta en la ekonomia disvolvo en la tuta lando kaj estis unu el la pli ol dek malriĉaj regionoj difinitaj de la ŝtato en 1984. En la pasintaj pli ol 3 jaroj, helpate de la ŝtato kaj aliaj regionoj kaj dank' al la penado de la diversnaciecaj popolanoj de la subprovinco, duono de ĝiaj pli ol 240 malriĉaj subdistriktoj havis evidentan ŝanĝiĝon, pli ol 13 000 familioj enloĝiĝis en novaj domoj. Krome, dank' al la konstruado de trinkakvaj instalaĵoj kaj malgrandaj hidroelektraj centraloj, rekonstruado de ŝoseoj kaj reordigo de riveroj, parto da malriĉaj lokoj havis evidentan pliboniĝon en la produktado kaj vivo.


Kun la leviĝo de internacia turismo, tiu subprovinco jam fariĝis unu el la mondaj turismaj lokoj pro la ŝtata naturparko Ĝangĝjaĝje, mirakla Tjanziŝan-monto, Sŭoŝjiju kun 5-kilometra galerio, pitoreskejoj Tjanmenŝan-monto kaj Mengdongherivero. Tie verdas altaj montoj, brilas akvo, koketas kavernoj, prosperas arbaroj kaj bambuaroj, bele kantas birdoj kaj aromas floroj, pro kio la loko forte allogas turistojn venintajn el urboj. La izolita Ŝjangŝji-subprovinco nun famiĝas en la mondo. ■




En la urbo Ĝjişou FOTO DE LONG GŪANGMAŪ

La Puŝi-a Kemiindustria Fabriko en nokto FOTO DE LONG ZANCA






La fama Fenghǔang-urbeto en la okcidenta parto de Hunan-provinco



Reveno de foiro



Komputila klasĉambro en nacimalplimulta mezlernejo

Laborejo de la Fabriko de Naciecaj Artoj kaj Metioj

FOTO DE TANG KELI



Tuĝja-a maljunulino talenta en teksado de brokato gvidas junulinojn en produktado.





Osta agrikulturilo

Hemudu- kulturo

—Grava arkeologia
eltrovo en la malsupra
baseno de Jangzi-rivero

Teksto de Caŭ Bajlong

Fotoj de Ĝang Ŝumin



Ebura tranĉilo kun
birdforma tenilo



Ebura trinkvazo

Ĉinaj arkeologoj prifosis la ruinion de la neolitika kulturo de Hemudu en Jujau-gubernio, Ĝeĝjang-provinco, orienta Ĉinio, dufoje en 1973-1974 kaj en 1977-1978 respektive. La prifosita areo estas 2 630 kvadrataj metroj. Tie oni trovis kvar kulturtavolojn, laŭvice dispoziciitajn unu sur alia. Laŭ la konataj materialoj Hemudu-kulturo ĉefe estis en la orienta regiono de la Ningbo-Ŝaŭŝing-a Ebenajo, Ĝeĝjang-provinco. Oni determinis per karbono 14, ke la supra templimo de la kulturo estas antaŭ ĉ. 7 000 jaroj. El la ruinoj de la neolitika kulturo malkovritaj en la lastaj 40 jaroj pli ol 7 000 estis publikigitaj kaj pli ol cent oficiale prifositaj. De la grandnombraj elterigitaj materialoj oni akiris novan scion pri la primitiva kulturo de diversaj lokoj de Ĉinio. El tiuj eltrovoj la plej atentiga estas la ruino de Hemudu-kulturo, en la malsupra baseno de Jangzi-rivero. La tie elfositaj objektoj montras, ke antaŭ 6 000-7 000 jaroj ĉinoj kreis brilan primitivan kulturon ne nur en la baseno de la Flava Rivero, sed ankaŭ kaj eĉ pli frue en la baseno de Jangzi-rivero. Tio ŝanĝis la vidpunkton, ke la ĉina kulturo originis el la baseno de la Flava Rivero kaj de tie evoluis al aliaj lokoj. Laŭ la analizo de la arkeologiaj materialoj en la lastaj jaroj, iuj ĉinaj neolitikaj kulturoj povas dividiĝi en kelkajn tipojn kaj aliaj en kelkajn periodojn laŭ ilia evoluo. Tiam ekzistis samtempe kulturoj en malsamaj lokoj de la ĉina teritorio, ĉiu kun sia propra evolua proceso. Ili influis sin reciproke kaj fundamentis la postan disvolvigon de la brila ĉina civilizacio.

DELIKATAJ OSTAJ KAJ LIGNAJ PRODUKTILOJ

En la elfositaj ŝtonaj, ostaj, lignaj kaj ceramikaj produktiloj grandparto estas ostaj. Multaj ostaj kaj lignaj iloj, novformaj kaj delikate faritaj, vidiĝis unuafoje en

la neolitikaj elfosaĵoj. Tiuj produktiloj kaj bestaj specimenoj bone spegulis la tiaman ekonomian formon kaj nivelon de la produktaj fortoj.

La elfoso de granda nombro da sokoĵ de Hemudu-kulturo estas okulfrapa afero. Nur en la kvara stratumo oni elfosis 170 sokoĵn. Soko estis la ĉefa ilo en la tiam agrikultura produktado kaj ĝi estas unu el la tipaj objektoj de Hemudu-kulturo. La sokoĵ, faritaj el skapolo de granda mamulo (verŝajne de bubalo) longas 20 cm. kun kvadrata truo ĉe la sinartro kaj malprofunda kavo en la mezo kaj du truoj ambaŭflanke de la kavo. Oni trovis ankaŭ postsignon de ligna tenilo sur soko, kio pruvas ke antaŭ 6 000-7 000 jaroj la ĉinaj prapatroj vivantaj en Hemudu jam atingis la etapon de "terkultivado per soko" kaj ĉesigis la migran vivon.

GRANDA NOMBRO DA KARBIĜINTA RIZO

Unu el la plej grandaj rikoltoj en la prifosado de la ruino de Hemudu-kulturo estas malkovro de amaso de rizo, ĝiaj ŝeloj, pajloj kaj folioj en la tria kaj kvara stratumoj. Ĝi dikas ĝenerale je 20-50 cm. kaj kelkloke je pli ol unu metro. La rizo jam karbiĝis kaj multaj rizaj ŝeloj, pajloj kaj folioj


ankoraŭ konservas sian formon. La multnombra kaj kompleta konservo de rizo estas malofte videbla en la historio de la ĉina arkeologio pri neolitiko. Tio estas la plej frua kultivita rizo ĝis nun malkovrita en Ĉinio kaj ankaŭ la plej antikva rizrestaĵo en Azio, kio montras ke Ĉinio estas unu el la gravaj originaj landoj de rizkultivado.

Krom rizo oni elfosis ankaŭ amasojn da kverksemoj, trupoj, sovaĝaj jujuboj, persikoj, kalabasuĵoj, fungoj, algoj kaj aliaj. Evidente, tiam la fruktokolektado estis prospera kaj servis kiel nemankigebla branĉo en agrikultura produktado.

BURĜONO DE FIŜKAPTADO, ĈASADO KAJ BREDADO

En la ruino oni trovis grandan nombron da porkaj, bovaj kaj hundaj ostoj. Laŭ analizo la ostoj de porkidoj kaj adoltaj porkoj konsistigas 90%, kio atestas ke ili estis buĉitaj por esti manĝaĵoj. Oni trovis ankaŭ argilan porkidon kun pendanta ventro kaj mallongaj kruroj. La proporcio de la antaŭa kaj posta partoj de ĝia korpo estas inter apro kaj moderna porko. Evidente, ĝi estas meza tipo en la evoluo de apro al moderna porko. La elfositaj bubalaj ostoj atestis,

Ostaj fajfiloj



ke Hemudu-anoj siatempe bredis brutojn.

La elfositaj mil ostaj sagpintoj kaj ostoj de pli ol 50 bestspecoj montras, ke la fiŝkaptado kaj ĉasado estis gravaj branĉoj de la tiam ekonomio. Oni trovis pli ol 400 cervajn kornojn, kio montras ke cervo estis la ĉefa ĉasaĵo de tiamaj homoj. Krome estis elfositaj ankaŭ ostoj de rinocero, elefanto, urso, tigro, krokodilo, lutro, makako k.a.

El la elfositaj objektoj troviĝas ankaŭ lignaj remiloj. Ili atestas, ke tiam jam aperis kanuo, kaj ke Hemudu-anoj jam havis certan kapablon aktivadi surakve. Hemudu-anoj kaptis fiŝojn kaj testudojn en granda kvanto. Sur la ruino ĉie oni povas trovi iliajn ostojn. Tio montras, ke tiam la tiea klimato estis varmeta kaj humida, simila al tiu de la baseno de la Perla Rivero en Ĉinio.

Ostaj sagpintoj, lignaj lancoj, ostaj fajfiloj, ŝtonaj kaj argilaj globoj estis fiŝkaptiloj kaj ĉasiloj. Konsiderinte, ke mankas pezaĵo por reto kaj dume ekzistas multe da fiŝostoj, oni divenas, ke iuj ostaj sagpintoj estis uzataj por kapti fiŝojn (troviĝis eĉ balenaj ostoj). La osta fajfilo estis farita el birda ostoj. Kun truoj en si iuj fajfiloj havas ankaŭ moveblan oston ene. Hemudu-anoj fajfis per ĝi por logkapti bestojn kaj birdojn. Ĉio

ĉi bone atestas, ke Hemudu-anoj estis spertaj en ĉasado.

PRIMITIVAJ METIARTOJ

Oni trovis restaĵojn de fragmita mato plektita per du varperoj kaj du vefteroj. La mato estis kompakte plektita kaj preskaŭ sama kiel la nuna. Oni trovis ankaŭ lignajn, diversgrandajn ceramikajn kaj ŝtonajn ŝpinilojn por elbobonado kaj tordado, lignajn veftordigilon, longformajn kombilojn por ordigi varpon kaj lignajn teksaj-cilindrojn kun du kavaĵoj ĉe la du ekstremitoj, kaj ankaŭ ostajn kudrilojn. Elfoso de tiel multaj specoj de teksiloj estas nevidebla en aliaj neolitikaj ruinoj. La elfositaj objektoj montras, ke Hemudu-anoj jam havis vestojn.

La ceramiko de Hemudu-kulturo estis originala. Farante ceramikaĵojn, Hemudu-anoj miksis certan kvanton da rizaj ŝeloj, pecigitaj pajloj kaj folioj en argilon. Ili faris argilaĵon ŝnurforma kaj poste modlis ujon, spirale metante la argilan ŝnuron. La ujoj estis neregulformaj kaj bakitaj en la medio de 800-900°C. Ili aspektas krudaj, dikaj, malkompaktaj, malpezaj kaj porozaj. Pro la entenata kristala karbono oni nomas ilin nigraj ceramikaĵoj kun karbono ene.

Oni trovis sur la kvara kultura stratumo rompitan fajencan vazon, sur kies blanka eksteraĵo estas pentrita porko. La vazo brilas lake, aspektas simpla kaj delikata.

Oni elterigis tie ankaŭ kuirilojn, kiaj kuir-forno, potoj kaj vazoj, kiuj markis grandan progreson de la kuirarto siatempe. Per la kuiriloj oni povis kuiri aŭ vaporumi manĝaĵojn. Ili estas facile portebaj kaj uzebaj en- kaj eksterdome.

Inter la elfositaj ceramikaĵoj de Hemudu-kulturo troviĝas plurangul-randa potoj, plado, kovrilo, kubforma ujo, cilindra ujo, vazo k.a. Sur iuj el ili vidiĝas ĉizitaj desegnoj, kiaj tiuj de rizspikoj, folioj aŭ strioj.

LA PLEJ FRUA LIGNO-STRUKTURA KONSTRUAĴO


En la tempo de Hemudu-kulturo furoris palafita konstruaĵo. Oni trovis milojn da cilindraj, kvadrataj kaj plataj palisoj, traboj, kolonoj, tabuloj k.a. La ruino montras, ke iuj konstruaĵoj kun areo de pli ol 160 kvadrataj metroj supozeble estis destinitaj por komuna loĝejo. Tiaspeca konstruaĵo estis unu el la ĉefaj konstruaj formoj en la

Argila porkido




Argilaĵo kun desegno de porko





Argila mangājujo



Kvarpieda ujo

regiono sude de Jangzi-rivero en neolitiko kaj konvena por la humida, pluvoza suda regiono de Ĉinio. La konstruaĵo en Hemudu-kulturo estis la plej frua el la ĝis nun eltrovitaj.

Sur la dua stratumo de la ruino de Hemudu-kulturo oni trovis lignan puton. Ĝi estas la plej antikva puto ĝis nun konata en Ĉinio, kaj estas ankaŭ la plej antikva vertikala puto kun ligna strukturo. Ĉe la fundo de la puto oni trovis maldikan palison kaj pecetojn de fragmita mato. Videblas ke tiam super la puto estis kiosko.

Oni trovis, ke la Hemudu-anoj jam scipovis uzi junton kaj tenonon en ligna-struktura konstruaĵo por kunligi diversajn pecojn, precipe tiam jam aperis hirundvosta junto, junto kun stifta truo, kaj foldo kaj lango. Tio markis la brilan atingon en ligno-prilaborado de Hemudu-anoj. Antaŭe oni opiniis ke tia teknologio estis neimagebla antaŭ la apero de metalaj iloj.

El la elterigitaj objektoj estas ankaŭ lignaj bovloj, ujoj surkovritaj per natura lako. Ili, faritaj antaŭ 7 000 jaroj, estas la plej fruaj lakaĵoj de Ĉinio.

BRILAJ ARTAJ ATINGOJ

En la ruino de Hemudu-kulturo estis malkovritaj ankaŭ ceramikaj

homkapoj, fiŝoj, hundoj kaj birdoj, ostponardaj teniloj kun desegno de duoblakapa birdo, ebur-skulptaĵo kun birda formo, papiliforma ebur-skulptaĵo, ceramikaj pecoj kun ĉizitaj desegnoj k.a.

La arto de Hemudu-anoj fontis el ilia vivo. Ili ĝenerale skulptis realisme kaj iafoje troigante. Ili lerte kaptis la ĉefajn trajtojn de la objekto, ekz., obeema hundo kaj dresita porko. Ĉiuj estis fidelaj priskriboj de la tiamaj breditaj bestoj. La ceramika homkapo, skulptita per simplaj linioj, elmontras la persistemon de la tiamaj homoj en batalo kontraŭ la naturo. La ebura skulptaĵo "Du birdoj ĉe la sunleviĝo" estas skulptita precize kaj lerte. Ĝi estas primitiva artaĵo farita sen ajna metal-instrumento.

Krome oni trovis ankaŭ prilaboritajn ornamaĵojn, kiaj ostaj tuboj, fiŝaj dentoj, ŝtonaj globoj, jadaĵoj, pecoj, fiŝostaj bidoj, duonlunaj jadaĵoj kaj fluoritaj tuboj. Unu el ili estas farita el tigradento.

Krom Hemudu-kulturo, kiu apartenis al la kulturo de neolitiko en la malsupra baseno de Jangzi-rivero, ekzistis ankaŭ Maĝjabang-kulturo apud Ĝjaŝing, ĉefe en la regiono ĉirkaŭ Tajhu-lago. Oni ankaŭ trovis restaĵojn de rizo en la ruino. Iuj specialistoj opinias, ke Maĝjabang-kulturo evoluis de Hemudu-kulturo, kaj aliaj asertas, ke la du primitivaj kulturoj estis samtempe ekzistantaj. La problemo ŝuldos sian solviĝon al plia esplorado kaj prifosado. ■

Kondolenco

Kun subita atako de malĝojo ni informiĝis, ke prof. d-ro Ivo Lapenna forpasis en Kopenhago, Danlando je la 15-a de decembro 1987. Tiu-kaŭze nia movado perdis unu el la plej grandaj entuziasmaj kaj sinoferemaj gvidantoj, kiu plenumis multajn elstarajn taskojn por la disvastigo kaj rekono de Esperanto kaj tiel meritas alt-honoran lokon en la historio de nia Internacia Lingvo.

Al la familio de prof. d-ro Ivo Lapenna ni esprimas nian plej koran kondolencan.

La Red.

Kemiindustria urbo sur Mjaŭŝan-monto

Vizitante la Tuĝja- kaj Mjaŭ-nacienca Aŭtonoma Subprovinco de Okcidenta Hunan, mi multfoje aŭdis pri la Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Puŝi en Luŝji-gubernio. Oni sciigis min, ke ĝi estas vizitinda, ĉar ĝi estas fierindaĵo de la industrio de okcidenta Hunan-provinco kaj avangarda fabriko de la tutlanda kemia industrio.

Estis serena tago. Mi ĵipe veturis al tiu ĉi fabriko. De Ĝjiŝou, la ĉefurbo de la nomita aŭtonoma subprovinco, nia ĵipo kuris orienten en la montaron. Post du horoj, nelonge post la traŭro de la urbeto de Luŝji-gubernio, oni povis vidi tra fenestro de la ĵipo, ke en la montvalo longa 6-7 kilometrojn bonorde staras fabrikoj kaj altaj fumtuboj, kaj en la arbaro staras vicoj da loĝdomoj. Jen mi jam atingis la nomitan fabrikon.

Tie mi estis varme akceptata de U Ŭenĝi, la ĉefo de la fabrika oficejo. Same kiel multaj aliaj ĉinaj fabrikoj, ankaŭ la fabriko havas eksponejon pri fabrika historio. Mi vizitis ĝin akompanate de U. Dank' al lia sciigo, mi havis ĝeneralan konon pri la antaŭa kaj nuna stato de la fabriko.

OK PIONIROJ KAJ OK MARTELOJ

En 1966, por sin liberigi de malriĉeco ok homoj komencis ekspluati minon en la montaro, la hejmloko de Tuĝja- kaj Mjaŭ-naciecoj. Tiam ili havis nur ok martelojn, ok ŝtalajn stangetojn kaj kapitalon de 500 jŭanoj. Ili

ŝvitplene laboris monaton post monato por transporti aliloken fosforan ercon el la montaro. Tiele aperis fosfora minejo de Puŝi en rudimenta formo.

En 1971, Hunan-provinco asignis sumon da mono por plivastigi la fosforan minejon de Puŝi. Post unu jaro konstruiĝis fossejo, kiu povis produkti ĉiujare 150 000 tunojn da erco. Sed en 1978, en la tutprovinca menda kunveno, la nomita fosfora minejo ne sukcesis subskribi eĉ unu kontrakton por vendi sian produktaĵon, ĉar la merkato jam estis saturita de fosfora erco. La fosfora erco amasiĝis kiel monto kaj ĉie sur ĝi kreskis herboj en somero. Sekve la fosfora minejo de Puŝi, kiu vivtenis sin per ercovendado, devis eksigi siajn 100 laboristojn.

REFORMO — ELIRO EL MALFACILO


Vizaĝe al tia rigora situacio,

mjaŭ-naciano Tjan Ĉangĝja, tiama respondeculo de la nomita minejo kaj la nuna estro de la fabriko, kune kun aliaj gvidantoj de la minejo, post enketado rezolute komencis reformon en produktado, por sin liberigi el la malfacilo kaj disvolvi plue la fabrikon.

Ilia unua paŝo estis "determini la produktadon laŭ vendkvanto de la erco": Ili malmultigis la jaran produktokvanton de fosfora erco de 150 000 al 110 000 tunoj, kaj samtempe ĉiamaniere serĉis aĉetantojn. En la unua jaro post la reformado la enspezo per ercovendo kreskis 50% kompare al tiu en 1986.


Kvankam reboniĝis la situacio de la minejo, tamen Tjan Ĉangĝja klare vidis, ke la simpla produktaĵa strukturo ne povas ĉiam protekti la minejon de la ofta stagnado en vendo de fosfora erco.

La Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Puŝi





lama oficejo de la fabriko



De tie oni transportas kemiindustriajn produkton de la fabriko.

Tial ili faris novan decidon: reformi la administran sistemon, ŝanĝi la nedezirindan situacion produkti simplajn produktaĵojn kaj fondi fosforan kemiindustrion, nome iri la vojon gajni pli da profito el prilaboro de krudmaterialoj. Tiele ili faris la duan paŝon el fosfora erco produkti flavan fosforon.

Dank' al helpo de iu kemiindustria fabriko en Sicŭan, la Fosfora Minejo de Puŝi en 5 monatoj konstruis sian unuan fornon de flava fosforo kaj sukcesis komenci produkton en junio 1980. La pureco atingis 99.95%. Instigita de la unua sukceso, oni plue

konstruis la duan kaj trian fornojn.


Ŝanĝigema estas la merkato. Venis la informo pri depresio de kelkaj fosforaj produktaĵoj, kiam la fosfora kemiindustrio de la fabriko apenaŭ komencis sian produktadon. Tiam la jam fondita Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Puŝi decidis fabriki novajn produktaĵojn, por levi sian adaptiĝemon al la ŝanĝigemo de la merkato kaj konkurencon povon.

DE KIE VENIS KAPITALO KAJ TALENTULOJ?

De kie kolekti kapitalon por komenci novajn specojn de

produktaĵoj? Tio estis la unua malfacila problemo renkontita de la pioniroj de la nomita fabriko, en penado prosperigi la entreprenon. Kompreneble, unue ili apogis sin sur siaj fortoj: kreskigi enspezon, ŝpari elspezon kaj multigi profiton. Due ili petis de banko mezlongajn kaj mallongajn kreditojn por aĉeti necesajn ekipaĵojn, faris kompensan komercon por gajni per ĝi monprunton de aliaj lokoj kaj departementoj de ekstera komerco kaj kolektis kapitalon kune kun entreprenoj de subdistriktoj kaj urbetoj, por fondi novan fabrikon.

Ili ŝpare utiligis sian kapitalon.



Dum projektado kaj konstruado de la fabriko, ili plene utiligis siajn rezervitajn instalaĵojn kaj materialojn. Ekzemple, la ŝtuparoj sur la tri flavafosforaj fornejoj estis faritaj el eluzitaj mallongaj ŝtalpecoj de la minejo.

Alia malfacila problemo estis manko de teknikistoj kaj fakuloj.

Antaŭ 1978, tie estis nur 7 teknikistoj pri elfosado. Ili neniom sciis pri produktado de flava fosforo, kiam ili preparis sin por produkti flavan fosforon en 1979. Tial la respondeculoj devis peti helpon de aliaj lokoj. Petinte helpon en 5-6 urboj, ili finfine akiris helpon de iu kemiindustria fabriko en Siĉŭan. Tiu fabriko liveris al ili planojn, kulturis por ili ĉefajn teknikajn fortojn kaj sendis helpi ilian konstruadon. Poste, en la konstruado de vitriolo-boliga kaldrono kaj instalaĵoj por produkti fosfatan acidon, ankaŭ tiel solviĝis la problemo pri manko de teknikoj kaj teknikistoj.

Por radikale solvi la problemon ili decidis kulturi siajn teknikajn fortojn. La fabriko fondis post-laboran vesperan lernejon por la laboristoj, kaj sendis grupon da junaj laboristoj lerni en supera lernejo. Samtempe la fabriko instigis la laboristojn diligente lerni teknikojn, por ke ili fariĝu talentuloj. Dank' al tiaj metodoj ili elkulturis en mallonga tempo pli ol 400 ĉefajn teknikistojn pri kemiindustria produktado. Krome, ili malavare engaĝis alilokajn inĝenierojn kaj teknikistojn kiel siajn oficistojn aŭ konstantajn teknikajn konsilantojn de la fabriko. Serio da rimedoj rapide ŝanĝis la situacion, ke al la fabriko mankis teknikaj fortoj.

Pro la solviĝo de la problemo de kapitalo kaj teknikaj fortoj, en 1985 la Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Puŝi sukcese komencis produktadon de mangano, antimono, alumina pulvoro, cemento, malpeza magnezia karbonato k.a.



Tjan Ĉangĝja (dekstre) kaj laboristoj

KEMIINDUSTRIA URBO EN IMPETO

Post malfacila luktado dum 20 jaroj kaj kuraĝa reformado, en areo de 12 kvadrataj kilometroj de la antaŭa dezerta Mjaŭŝan-monto leviĝis la Ĝenerala Kemiindustria Fabriko de Puŝi, kiu konsistas el 1 minejo, 9 fabrikoj kaj 3 kompanioj. Kun 1 600 laboristoj, ĝi posedas grupon da ŝipoj kaj ŝarĝaŭtoj, hospitalon, lernejon por la gefiloj de laboristoj, loĝdomojn por la laboristoj, ĉiu kun 15 kvadrataj metroj, ĉiovendejon, restoracion, glacian fabrikon, greno- kaj furaĝo-prilaborejojn k.a. Ĝi estas urbeto en profunda montaro.

Nun, en la fabriko estas 17 specoj de produktaĵoj, kiel flava fosforo, fosfata acido, ruĝa fosforo, kalcia superfosfato, antimono, mangano k.a. Interalie flava fosforo, mangano kaj antimono estas jam vendataj en dekkelkaj landoj kaj regionoj, kiaj Japanio, Hindio, Brazilo, FR Germanio, Kanado kaj sudorientaziaj landoj. Kiam mi vizitis la trian fabrikon, mi vidis, ke bonorde stokiĝas bluaj fersiteloj kun flava fosforo ene aliloken transportotaj. U Ŝenĝi konigis al mi, ke iu insekticida fabriko en Bombajo de Hindio volontis aĉeti en pli alta prezo la flavan fosforon produktitan de la Ĝenerala

Kemiindustria Fabriko de Puŝi. Li diris ankaŭ, ke la produktaĵoj de la fabriko estas altkvalitaj kaj bonvenaj al la klientoj. En 1987 la fabriko akiris 1.5 milionojn da usonaj dolaroj per eksportado de siaj produktaĵoj.

Lastatempe la fabriko jam subskribis kontrakton pri livero de kristala silicio, kiun la fabriko baldaŭ ekproduktos. La fabriko planis kunlabori kun Ŝanhajo por repreni ellasitan gason el la flavafosforaj kaldronoj por produkti okzalan acidon kaj esplori la eblecon produkti magnezion kaj kromon. Streĉe iras la konstruado de la tria vitriolo-boliga kaldrono kaj la triaperioda konstruado de mangano.

Raporto de la fabriko montris, ke en 1978 ĝia jara produktovalor estis 2.94 milionoj da jŭanoj, dum en 1987 18 milionoj da jŭanoj. Nun la gvidantoj de la fabriko planas kreskigi la produktovaloron al 50 milionoj en 1990. Tio estos certe efektivebla, dank' al la tradicia penemo de la laboristoj kaj la spirito de kuraĝa reformo kaj esploro de la gvidantoj de la fabriko. Neniu dubas, ke la kresko de 500 jŭanoj en 1966 al 50 milionoj da jŭanoj en 1990 signifas veran impeton de la fabriko. ■

ŬANG MINHAŬ:

Ŝanhajo, lulilo de la ĉina Esperanto- movado



“La Verda Lumo” kaj “La Mondo”
eldonitaj de la Ŝanhaja Esperanto-
Asocio en la 20-aj kaj 30-aj jaroj

Parolante pri la historio de la ĉina E-movado, oni certe mencias Ŝanhajon, kiun oni nomas lulilo de tiu movado.

En la komenco de la kuranta jarcento Esperanto estis enkondukita en Ŝanhajon ĉefe tra du kanaloj: 1. En 1905 iu rusa komercisto disvastigis Esperanton en Ŝanhajo. Ĉe li lernis Lu Ŝi-ĉin (ĉino). Ekde 1906 Lu okazigis en Ŝanhajo la unuajn Esp-kursojn dum 3 jaroj; 2. Li ŝipe kaj aliaj studentoj en Japanio lernis Esperanton ĉe japana esperantisto s-ro Dosagi Sakae. Reveninte Ĉinion, ili funkciigis Esp-kurson en Ŝanhajo. De tiam, nemalmultaj ĉinoj kontaktiĝis kun tiu internacia lingvo kaj disvastigis ĝin en la tuta lando.

En 1908 fondiĝis la Ŝanhaja Esperanto-Asocio (ŜEA), la plej frua Esperanta organizo en Ĉinio. Poste ekviglis Esp-movado en Pekino kaj Kantono. Stariĝis unu post alia Esp-organizoj en aliaj lokoj de la lando.

En 1909 Lu Ŝi-ĉin kaj aliaj fondis en Ŝanhajo la Ĥinan Esperanto-Asocion (ĤEA) kaj eldonis la unuan numeron de “La Mondo”. En 1911 aperis en Ŝanhajo la lernolibroj “Esperanto”, “Esperanto por Ĥino” kaj “Esperanto-Ĥina Konversacio” kompilitaj de Lu. La tiamaj Esp-kursoj uzis ilin senescepte.


En 1912 ĤEA estis reorganizita en la Esp-Asocion de la Ĉina Respubliko, kiu funkciigis korespondan Esp-kurson kun pli ol 1 000 lernantoj el diversaj lokoj de la lando. Hujucz, pioniro de la ĉina Esperanto-movado, iam lernis Esperanton en ĝi. La tiamaj esperantistoj favore propagandis Esperanton kaj ankaŭ anarkiismon. Ekz. la sekreta gazeto “Voĉo de la Popolo” estis unu el la Esperantaj eldonaĵoj pledantaj por anarkiismo.

En marto 1920 Hujucz, Lu Ŝi-ĉin, Bakin k.a. reestablis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion

(ŜEA). Okazis la unua kaj dua kongresoj de ĝiaj membroj. Post la reestablo de ŜEA oni havis grandan finanĉan malfacilon en funkciigo de Esp-kurso kaj koresponda Esp-kurso. En oktobro 1921, laŭ invito de Hujucz, la rusa blinda poeto kaj esperantisto V. Eroŝenko venis al Ŝanhajo por instrui Esperanton en ŜEA. Por solvi ties finanĉan malfacilon, li donis en Ŝanhajo internacian koncerton. Per la akirita mono ŜEA senŝuldigis sin kaj aĉetis multajn Esp-librojn el aliaj landoj.

En junio 1922 ŜEA fondis la monatan gazeton “La Verda Lumo”, kiu ekzistis ĝis la fino de 1933. La gazeto multe kontribuis al la ĉina Esp-movado en la 20-aj jaroj.

En 1923 ŜEA fondis la Ŝanhajan Esperanto-Bibliotekon kaj la Ŝanhajan Esperanto-Librejon, kiu vendis speciale Esperantajn literaturajn verkojn,



Joĉaŝien kaj liaj edzino kaj infanoj antaŭ la sidejo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo en la 30-aj jaroj

asocioj, aperigo de eldonaĵoj kaj organizado de kursoj. Multaj el la aktivuloj en alilokaj Esp-asocioj estis membroj de ŜEL.

En septembro 1933 ŜEA okazigis la 2-an kongreson de siaj membroj, kiu aprobis la programan sloganon: "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". Dank' al la slogano la Esp-movado senĉese disvolviĝis kune kun la leviĝo de la kontraŭjapana nacistava movado de Ĉinio.

En aprilo 1936 en Ŝanhajo publike aperis la Esperanta periodaĵo "Ĉinio Hurlas". Ĝi uzis Esperanton kiel internacian propagandilon por disaŭdigi en la tuta mondo la voĉon de la ĉina popolo pri la kontraŭjapana nacistava movado kaj tio havis gravan influon sur la mondon.

En aprilo 1937 Verda Majo, fama japana internaciisma batalantino kaj esperantistino, venis al Ŝanhajo kaj partoprenis en la kontraŭjapana nacistava movado kune kun la membroj de ŜEL.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito la Esp-movado ne povis disvolviĝi en Ŝanhajo pro la limigo kaj malpermeso de la movado fare de la regantoj.

Post la Liberigo de Ŝanhajo en 1949 la Esp-movado eniris denove en novan historian periodon. En julio okazis en Ŝanhajo kunveno por festi la 62-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, kiun ĉeestis 65 esperantistoj kaj kiu decidis restarigi ŜEL. Poste okazis kunveno de la membraro, kiu aprobis la statuton de la ligo kaj deklaron pri restarigo de la ligo kaj elektis Ĵelezon, Tikos, Pandiŝon, Sanion, Lŭo Mingfeng kaj Ŝju Mo kiel membrojn de la Konstanta Komitato de la ligo. La ligo aktive laboris post sia restariĝo. En la fino de 1949 ĝi jam havis pli ol 170 membrojn. En la 1-a de septembro ĝi ekfunkciigis tri sinsekvajn kursojn de Esper-

vortarojn kaj lernolibrojn eldonitajn de aliaj landoj, kio multe helpis tiujn, kiuj lernis Esperanton. Tiam en Ŝanhajo Esp-kurson malfermis la Ŝanhaja Universitato, Fudan-universitato, la Nacilingva Kolegio, la Ĉina Profesia Lernejo kaj aliaj ses altkaj mezlernejoj. En 1926 ŜEA funkciigis novan korespondan lernejon de Esperanto, en kiu instruis Hujucz, Ŝju Gengĉjan, Bakin, Ĉen Ĝaŭjing k. a. La lernejo kulturis por Ĉinio aron da eminentaj esperantistoj, kiel Ĵelezo, Tikos, Ĝoŭ Ĝuangping, Ĝang Ĉjiĉeng kaj Li Najŝji.

Menciindas, ke en la komenca periodo, kiam Esperanto eniris en Ŝanhajon, iuj esperantistoj kombinis Esperanton kun la ĉina revolucia batalo. En majo 1925 ŜEA diskonigis al la monda esperantistaro la faktojn de la Masakro de la 30-a de Majo, sanga subpremado de imperiistoj al la patriota kontraŭimperiisma movado de la ĉina popolo, malkaŝis la agresajn krimagojn de la imperiistoj kaj gajnis la subtenon de diverslandaj esperantistoj.

En novembro 1931 Hujucz,

Ĝang Ĉjiĉeng, Joĉaŝien, Loŭ Ŝiji, Zensto kaj aliaj esperantistoj en Ŝanhajo iniciatis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union (ĈPEU), kiu estis kultura organizo de maldekstruloj gvidata de la Ĉina Ĝenerala Kultura Federacio de Maldekstruloj en la 30-aj jaroj. La fondiĝo de ĈPEU markis, ke la ĉina Esp-movado eniris novan etapon. Kaj Hujucz estis pioniro de la maldekstra Esp-movado. ĈPEU ofte raportis al la tuta mondo la ĉinan naciliberigan batalon kaj la aferon de la Ĉina Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo per siaj eldonaĵoj "Ĉina Proleta Esperantisto" kaj "Ĉina PEK-Bulteno".

En 1932 ĈPEU fondis la Ĉinan Korespondan Esp-Instituton kun Joĉaŝien kiel gvidanto.

En decembro 1932 naskiĝis "La Mondo", la plej grava eldonaĵo por la ĉina Esp-movado en la 30-aj jaroj. Ĝi helpis la legantojn ne nur lerni Esperanton, sed ankaŭ koni la socion. Ĝi ekzistis 4 jarojn kun 49 numeroj ĝis la fino de 1936.

En januaro 1933 fondiĝis la Ŝanhaja Esperantista Ligo (ŜEL). Sub ĝia influo viglis la Esp-movado tutlande: fondo de

anto en iu radio de Ŝanhajo, oktobre faris 6 prelegojn pri Esperanto en la Ŝanhaja Popola Radio kaj poste regule elsendis Esperantajn programerojn. Krom tio, la ligo ankaŭ organizis elementajn kaj mezgradajn Esp-kursojn.

En januaro 1950 la ligo iniciatis la organon "Popola Mondo", kiu ludis rolon organizi kaj eduki la ĉinajn esperantistojn en la komenca periodo post la naskiĝo de la nova Ĉinio. La ĉina Esp-movado reviglis tagon post tago, sekve de la reviviĝo de la Esp-movado en Ŝanhajo.

En marto 1951 fondiĝis en Pekino la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj transprenis "Popolan Mondon" kiel sian organon. Marte de 1952 ŜEL eldonis "Bultenon de ŜEL" por raporti sian ĉefan laboron, tradukis kaj eldonis Esperantajn librojn.

En junio 1957, por festi la Internacian Junularan Festivalon kaj la 70-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, ŜEL kune kun la Ŝanhaja Filio de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ŝanhaja Demokratia Junulara Federacio okazigis Esp-kurson, kiun gvidis Pandiŝo kaj kiu daŭris 2 monatojn, kun ĉ. 50 lernantoj. Ekde septembro 1964 Esp-kursoj iris samtempe en la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto kaj Fudan-universitato.

En la fino de 1963 fondiĝis en Ŝanhajo Esp-grupo, kies gvidantaro konsistis el Liŭ Hŭozi, Ŭang Japu kaj Sanio. Sub ilia gvido oni elektis instruistojn el la supraj 3 altlernejoj por kompili Esperantajn lernolibrojn por altlernejoj. En oktobro 1964 la Ministerio de Altgrada Eduko de Ĉinio funkciigis Esp-kurson en la Pekina Radio-Instituto, kun 20 studentoj venintaj el 5 ĉinaj altlernejoj, duono el la Orient-Ĉinia Instruista Universitato kaj la Ŝanhaja

Fremdlingva Instituto, kiuj laboras poste en Pekino kiel fortaj profesiaj esperantistoj.

Dum la 10-jara tumulto ekde 1966 la Esp-movado en Ŝanhajo preskaŭ stagnis. Nur en 1976 oni rekomencis la aktivadon. Junie de 1980 okazis en Ŝanhajo kunsido por Esperanta laboro. En ĝi oni starigis la preparan grupon de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio (ŜEA), kaj ŜEA fondiĝis post du jaroj. Tio markis, ke la Esp-movado en Ŝanhajo eniris novan periodon, kaj montris, ke ŜEA pli unuigos kaj organizos la ŝanhajajn esperantistojn por energie propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj kreskigi junan forton.

ŜEA funkciigis elementajn kaj mezgradajn Esp-kursojn, kiuj kulturis aron da junaj esperantistoj. Ĝi kune kun altlernejoj kaj mezgradaj kolegioj organizis Esp-kursojn. En 1983 fondiĝis instrua sekcio de Esperanto en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto. Septembre de 1984 ĝi, komisiite de ĈEL,

funkciigis Esp-kurson por instruistoj.

Kune kun la pluapaŝa praktikado de la malferma politiko, ŜEA oftigis kontaktiĝon kun eksterlando. En la lastaj jaroj ĝi invitis alilandajn esperantistojn al Ŝanhajo por fari prelegojn kaj ĉeesti kunsidojn kaj akceptis multajn alilandajn esperantistojn. Precipe okaze de la 71-a UK, Ŝanhajo gastigis ĉ. 400 esperantistojn. Laŭ invito de s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, ŜEA sendis en aŭgusto 1987 delegacion al la Unua Azia Konferenco de UEA en Tokio kaj al la 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj. Tiuj amikaj kontaktoj akcelis la interkomprenon kaj amikecon inter la esperantistoj de Ŝanhajo kaj aliaj landoj.

Nun ŜEA diligente laboras, por ke la Esp-movadoj de Ĉinio kaj Azio daŭre progresu, kaj por ke Esperanto akiru pli brilajn sukcesojn en sia dua jarcento. ■

Kondolenco

Paul Neergaard, fame konata danlanda sempatologo, forpasis je la 13-a de novembro 1987.

Membro de la Akademio de Esperanto kaj la Honora Patrona Komitato de UEA, fonda membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino kaj fondinto de la Internacia Scienca Akademio Comenius s-ano Neergaard kiel elstara sciencisto sindediĉeme klopodis por la enkonduko de Esperanto en la sciencajn rondojn. Krom verki en Esperanto kaj alilingve renomajn verkojn pri sia profesia fako li faris multe da valoraj kontribuoj sur la tereno de esperantologio.

Al la familio de s-ano Neergaard ni sendas nian plej koran kondolencan.

La Red.

Granda pando vizitis mian hejmon

— Pri percepto de ĉina bildlibro en Jugoslavio

de SPOMENKA ŠTIMEC

Vizitante mian ankoraŭ ne kvarjaran nevon, ni kunportis donace novan ĉinan bildlibron pri pandoj. Realismaj pentraĵoj sufiĉos por la rakonto, senkonsidere pri la lingvo.

La etulo lokis sin en mian sinon kaj petis legi. Improvize mi tradukis por li. Li evidente ĝuegis. Tuj post la fino li petis ke mi relegu. Mi cedis... kaj li ne laciĝis ĝis la kvara legado, kiam mi rifuzis pluan kunlaboron. Dum lia ŝato al la pando kreskis, mi havis la okazon pripensi kial tia entuziasmo ĉe li. Kaj kial ankaŭ por mi funkciis tiu ĉi fabelo.

Kion mi laŭdu? Diskretan geografian informon (pandoj loĝas en Siĉŭan), plaĉan folkloran tonon ĉe la pentritaj vestaĵoj de la gepatroj kaj ne laste benefikis kuraĝiga tono: la infano mem kuras tra arbaro por trovi kuraciston por la malsana pando.

Sur iu paĝo ĉefrolas — fekaĵo. Mi ne konas eŭropan bildlibron kiu mencias tiun ĉi vorton. En la ĉina la patro per bastoneto fosas en fekaĵo por konstati, ke la besto havas ventroproblemon. Ĉu ne gravas leciono pri medicino por infanoj?

Pandido disradias gravajn emociojn: jen ĝi malsana provokas tujan helpon de homoj, jen ĝi en kinejo kun pandoj sur ekrano eklarmas kaj rigardas arbaren. Jen poste la knaba larmo, kiam li komprenas, ke tiu ĉarma amiko, kiu lernis manĝi kaĉon kaj

kaŝludi, efektive apartenas al arbaro.

Kiam lastpaĝe la pandido restas sur la branĉo, dum sur la homoj densiĝas krepusko kaj la fabelo finiĝas, mi mensogis al la eta aŭskultanto, fantaziante, ke la aŭtoro (bedaŭrinde anonima) jam verkas novan libron pri la pandido, en kiu ĝi denove renkontiĝos kun siaj bonaj amikoj.

Mi emis streĉi la krurojn kaj ne plu okupiĝi pri la pandido. La etulo komprenis, ke mi ne plu relegos por li. Li foriris al sia ĉambro kaj alportis pijamon, preta enlitiĝi. Kutimaj ribelscenoj ĉe enlitiĝo forestis: li ruze esperis en la lito ankoraŭfoje ricevi la rajton je la rakonto pri la pandido.

Eble simile povus efiki ankaŭ aliaj rakontoj. Eble.

Kaj mi volonte rakontas tiun ĉi scenon pri perceptado al ĉinoj por

konsciigi ilin, ke ili faris bonan laboron.

Ili ne forgesu kandidatigi la bildlibron por la infanlibro de la jaro ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA. Ekzempleron de la bildlibro nepre ricevu ankaŭ la homoj ĉe la kanada fondaĵo Carson, kiu stimulas eldonon de porinfanaj libroj. Se juĝi laŭ la libro "Venas vespero", kiun la fondaĵo subtenis en 1986, la fondaĵo devas altigi siajn kriteriojn pri pentra kaj literatura valoro de la eldonaĵo.

Konsilo pri iu alia eldono: ne hezitu doni al roluloj ĉinajn nomojn. Necesas, ke ni tralegu multajn ĉinajn paĝojn por iel tiel proksimiĝi al ĉinaj nomoj. Necesas komenci ĉe bildlibroj por realigi la alproksimiĝon.

Dankon por la paŝoj kiujn faras ĉinaj Esperanto-eldonejoj venante de jaro al jaro pli proksimen al ni.

La infanlibro "Granda Pando Vizitis Mian Hejmon"



Gitaro

Posttagmeze de la 3-a de decembro 1987 la dekjara pekina knabino Jang Ŝjüefej akceptis donacon — hispanan gitaron, transdonitan de la hispana ambasadoro kaj lia edzino. La donaco estas kuraĝigo de du famaj hispanaj gitaristoj al Jang Ŝjüefej pro ŝia brila ludo en la gitara festivalo okazinta lastmaje en la urbo Ĝuhaj.

Jang Ŝjüefej lernas en elementa lernejo de Pekino. Antaŭ tri jaroj ŝi komencis sin ekzerci per gitaro kaj nun sin progresigas ĉe iu fama ĉina gitaristo. En la festivalo ŝi ludis altnivelan verkon de J.S. Bach kaj ricevis laŭdojn de la du hispanaj gitaristoj. Ili bedaŭris, ke ŝia gitaro estas malbonkvalita. Tial ili promesis donaci al ŝi unu hispanan gitaron. Hispanio estas sanktejo de la gitara arto. Tie oni tre frue ekproduktis delikatajn gitarojn. Ludado kaj farado de gitaro estas fiero de la hispana popolo.

La du gitaristoj petis gitaron pere de radio en sia lando. Iu gitarfaristo zorgeme faris altkvalitan gitaron por la knabino laŭ la peto kaj donis ĝin al la du artistoj, kaj poste la hispana ambasadoro en Ĉinio transdonis ĝin al la knabino.

Instruisto de Jang Ŝjüefej diris, ke ŝi povas bone ellerni arton de malfacila ludo kaj estas multepromesa lernantino, tamen ŝia muzika komprenpovo devas altiĝi. Li esperas, ke ŝi daŭre diligente sin trejnos por danki la amikojn por ilia sincera helpo. ■

Mia amiketo

“Pep, pep,” kantis kanario. Ĉiufoje, kiam mi aŭdis ĝian pepadon en la korto, mi ekpensis pri ĝia nutrantino Malgranda Fengju (kiu, en la ĉina lingvo,



signifas fenikson kaj jardon). Laŭ la nomo vi eble opinias, ke ŝi estas bela. Sed fakte ne. Ŝiaj okuloj estas malgrandaj, buŝo larĝa kaj haroj maldensaj. Ŝi ĉiam portas bluan veston el hejme teksita ŝtofo kaj aspektas kiel provincano.

Kiam Malgranda Fengju estis 8-jara, ŝi venis al Pekino kune kun siaj gepatroj. La elementa lernejo ne plu akceptis novajn lernantojn, tial ŝi devis resti en la hejmo. Se mi estus en tia situacio, mi certe amuziĝus en la domo. Sed ŝi ĉien kuris tage. Jen ŝi akvumis florojn por iu familio, jen ŝi lavis vestojn por alia.

Tamen oni ne devas juĝi homon laŭ lia aspekto. Iutage ni kune ludis tablotenison en nia korto. Malgranda Fengju montris sian kapablon. Ŝi venkis ĉiujn fortajn rivalojn en la korto. Ne subtaksu ŝian lernadon. Mi ja hontas diri, ke mi, 11-jara knabo, devas

kelkfoje peti ŝian helpon en solvo de malfacilaj matematikaj problemoj.

Ŝi plej profunde impresas min per tio, ke iun aŭtunan tagon najbara onklino Ŭang petis mian helpon. Aŭdinte tion, mi mallevis la kapon kaj balbutis post longa silentado: “Matene mi... vizitos... lernejon!” Neatendite, Malgranda Fengju, kiu staris apud mi, senhezite diris: “Onklino Ŭang, mi helpu vin!” Mi bedaŭras, ke mi rifuzis la peton. Poste, kiam mi renkontis ilin, mi hontis pro tio.

Post du jaroj Malgranda Fengju kaj ŝiaj gepatroj forlasis nian korton. Ŝi donacis la kanarion al la amiketoj en nia korto.

Ĉe ilia foriro ĉiuj loĝantoj de nia korto eliris por iom akompani ilin. Kiam Fengju malproksimiĝis, larmoj nebuligis miajn okulojn. ■

ARTA VESPERO EN PEKINO POR
CENTJARIĜO DE ESPERANTO

La Pekina Esperanto-Asocio, la Ĉina Muzikista Asocio kaj aliaj kvar organizoj okazigis en Pekino vesperon por centjariĝo de Esperanto en la 8-a de decembro 1987. Muzikistoj kantis ĉinajn kaj fremdlandajn kantojn ĉine kaj Esperante. Dancistoj prezentis belajn dancojn. Pli ol 1 000 esperantistoj kaj Esperanto-simpatiantoj ĝuis la vesperon. Televid-stacio, radio kaj ĵurnaloj raportis pri tio.

JUNULARAJ ESP-ASOCIOJ FONDITAJ
EN ĈINAJ URBOJ

En 1987 oni fondis junularajn Esp-Asociojn en la ĉinaj urboj Ĉangŝa, Nanĉang kaj Ŝenjang. Tia asocio helpas kulturalan interŝanĝon inter junaj esperantistoj kaj akcelas la Esp-movadon.

ESPERANTO AKCEPTITA KIEL LA DUA
FRENDA LINGVO EN EKZAMENO POR
PROMOCIO

Junie de 1987, 8 instruistoj de la



La emblemo de la 44-a Internacia Junulara Kongreso

Ŝjuĝoŭ-a Normala Instituto en Ĝjangsu-provinco ricevis titolon pere de Esperanto, kiun oni akceptis kiel la duan fremdan lingvon en ekzameno por promocio. El ili iuj estis nomumitaj vicprofesoroj kaj aliaj Esperanto-docentoj.

En aliaj lokoj de Ĉinio nemalmultaj edukistoj kaj scienc-teknikistoj trapasis ekzamenon pri Esperanto kaj ricevis mezan aŭ altan titolon.

NOVAĴOJ EL ANHUJ

Oni komencas instrui Esperanton en tri pliaj altlernejoj de Anhuĵ-provinco. Pli ol 80 studentoj el ĉiu klaso lernas tiun lingvon. La Anhuĵ-a Politekniko okazigis Esperantan bildo-ekspozicion speciale por helpi ilin koni la internacian lingvon.

Post la fondiĝo de la Anhuĵ-a Esperanto-Kolegio en 1984 jam 1 500 lernantoj finis du-jaran korespondan kurson de Esperanto kaj 3 000 finis unu-jaran tian kurson. La Eduka Eldonejo de la provinco eldonis "Ĉina-Esperantan Vortaron". La 30 000 ekzempleroj de la unua eldono estis tuj elĉerpitaj kaj la dua eldono aperos post nelonge.

JARKUNVENO DE HEA

En la meza tagdeko de decembro 1987 okazis en la urbo Ŝinŝjang la dua jarkunveno de la Henan-a Esperanto-Asocio, en kiu oni resumis sukcesojn akiritajn post la unua jarkunveno, interŝanĝis sperton en Esperanta laboro kaj elektis bonajn esperantis-tojn kaj Esp-organizaĵojn.

La ĥoro de la Ĉina Trupo de Leĝera Muziko en la amuza vespero por la centjariĝo de Esperanto



La estraro de la fabrika sekcio de la E-societo "La Espero" de la urbo Kutina, Jugoslavio, deziras kontaktiĝi kun ĉinaj laboristoj en fabrikoj de minerala sterko por interŝanĝi spertojn pri laboro kaj E-movado.



INVITO AL SAN MARINO

La 5-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 5) okazos en San Marino de la 27-a de aŭgusto ĝis la 5-a de septembro 1988. La programo en la ses sekcioj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) enhavos po 1-3 fakursojn kaj fakajn lekciseriojn po 8-horajn, realigotajn de profesoroj kaj docentoj de AIS. Ankaŭ la liberaj prelegoj okazos plej grandparte en la Internacia Lingvo, sed kelkaj el ili ankaŭ en alia oficiala lingvo de AIS, ĉu en la angla ĉu en la franca, la germana aŭ la itala.

Limdato por kandidatigo por la adapta adopto de sciencista grado aŭ titolo estas la 28-a de marto.



La inaŭguro de la Nančang-a Junulara Esp-Asocio

"FAKTOJ PRI SVEDIO" NUN EN ESPERANTO

La Sveda Instituto por informi pri Svedio eksterlanden presis 8 000 Espeantlingvajn informfoliojn. Ĝi enhavas svedan mapon kaj abundan materialon de diversspecaj informoj pri geografio, klimato, popolo, demokratio, politiko, defendo, naturriĉoj, industrio, komerco, ekonomio, labormerkato, enspeznivelo, socia bonstato, edukado, kulturo kaj amaskomunikiloj de Svedio.

Oni povas senpage ricevi tiujn informfoliojn ĉe la Sveda Instituto, P.K. 7434, S-10391, Stockholm, aŭ ĉe svedaj ambasadoj kaj konsulejoj en la tuta mondo.

LA 12-A HEJS-TENDARO

En Monistrol de Monserrat, Katalunio, Hispanio, okazos la 12-a HEJS-Tendaro de la 31-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1988. Plej gravaj programeroj: ĝenerala kaj federacia kunvenoj, kursoj de kataluna kaj Esperanta lingvoj, ekskursoj, teatro ktp. Ĉiu reprezentanto de oficiala landa sekcio de TEJO aŭ komitatano de TEJO ĝuos loĝadon en la Junulara Esperantista Restadejo kaj manĝadon kaj ĉiujn servojn de la HEJS-Tendaro senpage.

Pliaj informoj estas haveblaj ĉe: Jususo Armengol i Arbiol, Francese Moragas 95-3-2 E-08922-Sta Coloma

de Gramanet, Hispanio.

ĜISDATIGO DE LA LIBRETO "OFICIALA SITUACIO DE LA E-INSTRUADO EN LA MONDO"

Denove Germain PIRLOT petas vian afablan helpon por reĝisdatigi lian kompiladon pri oficialaj E-kursoj en universitatoj kaj superaj (postmez-

gradaj) institutoj, kiuj okazos oficiale en 1988. La informoj atingu lin plej malfrue ĝis la 15-a de majo 1988. Tamen jam bonvenas ĉiuj sciigoj tiurilate: ĉu konfirmo de antaŭaj kursoj, kiuj daŭros; ĉu korektoj aŭ aldonoj pri ili; ĉu priskribo de novaj situacioj.

Kiel kutime, ĉiu respondint(in)o ricevos kompenso, kaj senpage, ekzempleron de la 7-a eldono tuj post ĝia apero.

Partoprenantoj de la dua jarkunveno de la Henan-a Esperanto-Asocio



Edukado rapide disvolviĝas en Janbjan

La ĉinaj kore-naciecaj popolanoj ĉefe loĝas en Ĝjilin-provinco, 800 000 el ili loĝas en la Janbjan-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. Ĝi limtuŝas Sovetunion oriente kaj rigardas al Koreio trans Tumen-rivero sude. Mi vizitis la lokon invitive en aŭtuno de 1987, okaze de la 35-jara datreveno de la fondiĝo de la Janbjan-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco.

Antaŭ longe mi aŭdis, ke la kore-naciecaj popolanoj estas lertaj en kantado kaj dancado. En tiu ĉi vizito krom brilaj kantoj kaj dancoj ankaŭ la rapide disvolviĝantaj kulturo kaj edukado faris sur mi plej profundan impreson. Tradicie la kore-naciecaj popolanoj donas grandan atenton al kulturado kaj edukado. Post 35-jara disvolviĝo, nun la subprovinco havas pli ol 1 190 elementajn

lernejojn. Laŭ ŝtata inspekto en 1985 Janbjan jam popularigis elementan edukadon. La subprovinco nun havas 232 ordinarajn mezlernejojn, pli ol 96% de la lernoagaj infanoj lernas en lernejoj; tio estas avangarda en la lando. La subprovinco havas 91 profesiajn mezlernejojn, 6 fakajn mezlernejojn, 4 superajn lernejojn kaj 2 kamparanajn superajn lernejojn, kie diplomitiĝis sume


Lernantinoj de ĝjaje-kurso



1 400 studentoj kaj 20 000 mez-lernejoj. Ili ne nur kontentigis la postulon pri talentuloj por la aŭtonoma subprovinco sed ankaŭ sendis al la ŝtato kaj Ĝjilin-provinco aron da fakuloj. Nun en la subprovinco estas 118 studentoj por ĉiu dekmilo da homoj, je 60 pli multe ol la tutlanda meznombro. En la pasintaj 35 jaroj en Janbjan-subprovinco jam formiĝis nacia eduka sistemo kun ĉiuj administraj tavoloj de pedagogio ĝis supera edukado kaj eduka reto kun racia aranĝado je diversaj niveloj, regionoj kaj lernejoj.

La unua urbo, kiun ni vizitis, estas Janĝji, la ĉefurbo de la aŭtonoma subprovinco. Ĝi estas juna urbo. Antaŭ pli ol cent jaroj tie estis dezerita loko frekventata de sovaĝaj bestoj. Poste oni fondis tie la Terkulturaran Buroon kaj la loĝantoj pli kaj pli multiĝis. Nun ĝi jam fariĝis centro de politiko, ekonomio, kulturo kaj trafiko de la subprovinco.

La Janbjan-a Universitato, la unua nacimalplimulta universitato de Ĉinio, ja situas en Janĝji. Ĝi estas universitato en bela medio. Ĝia domo estas bela, laboratorio komplete ekipita, biblioteko riĉa kaj la manĝejo pura. En la universitato laboras pli ol 900 instruistoj, oficistoj kaj laboristoj, 455 el ili estas profesiaj instruistoj, inter kiuj estas 71 profesoroj kaj vicprofesoroj. En ĝi lernas 2 500 lernantoj, plejparto el ili estas kore-naciecanoj kaj ankaŭ parto da hanoj kaj aliaj nacimalplimultanoj. La universitato jam starigis 18 fakojn, kiaj tiuj de politiko, ekonomio, juro, historio, ĉina literaturo, han-lingvo, korea lingvo, matematiko, fiziko, kemio, fizika kulturo, geografio, voĉmuziko, belarto, kemia inĝenierado kaj entreprena administrado. Estas ankaŭ ĉ. 100 esplorist-studentoj, kiuj lernas por doktoriĝo pri korea lingvo kaj literaturo kaj magistriĝo pri 14 fakoj.



En la Janbjan-a Universitato



Prof. Cuj Junĝja (meze) de la korelingva fakultato donas konsilojn al studentinoj por verkado de disertaĵo.

Laŭ la bezono de la socio la Janbjan-a Universitato funkciigas korespondan instruadon kaj vesperan universitaton. Tie pli ol 3 000 laboristoj kaj oficistoj ricevas superan edukadon. Ĝi funkciigas ankaŭ naciecan instituton, instituton pri koreaj problemoj, instituton de antikvaj libroj, instituton de teoria fiziko kaj aliajn esplorajn unuojn. En la lastaj jaroj la universitato dediĉis grandan atenton al akademia interŝanĝo kun aliaj universitatoj kaj scienc-esploraj departementoj

en- kaj eksterlandaj. Ĝi starigis rilatojn sinsekve kun universitatoj de Koreio, Svedio, Usono kaj Kanado. Krom interŝanĝi librojn kaj materialojn ili ankaŭ sendis instruistojn por reciproka vizitado. Tiuj aktivadoj grave altigis la instruan kvaliton de la Janbjan-a Universitato. Nun diplomitiĝintoj de la universitato jam fariĝis elitaj fortoj en multaj unuoj de la aŭtonoma subprovinco kaj ludas gravan rolon.

Dum vizitado en Longĝing-gubernio, mi rimarkis la plej altan

kaj luksan konstruaĵon tie. Tio estas la domo de la gubernia supera mezlernejo. Ĝi estas okulfrapa ne nur en la gubernia urbeto, sed eĉ nekomparebla kun mezlernejaj domoj en Pekino. Oni informis min, ke la kore-naciecaj popolanoj konsistigas 65.8% de la tuta loĝantaro de Longĝing-gubernio. Ili metas edukadon de la infanoj sur la unuan lokon kaj volonte vivas modeste por ŝpari monon por lernado de siaj gefiloj. Tial la gubernia registaro prenis konstruadon de lernejoj kiel sian unuan farendan aferon dum planado de konstrua projekto.

Longĝing-gubernio estas unu el la kompare disvolviĝintaj gubernioj en kulturo, eduko kaj higieno, kaj la gubernio havas bonan moron respekti instruistojn. La gubernio havas 35 mezlernejojn kun ĉ. 2 200 lernantoj, 144 elementajn lernejojn kun pli ol 3 300 lernantoj, 2 fakajn mezlernejojn, 3 profesiajn mezlernejojn kaj 1 kamparanan universitaton, kiuj formis kompletan edukan sistemon. Instruistoj en Longĝing-gubernio estas privilegiitaj en akiro de loĝejo kaj enoficigo de iliaj infanoj. Instruistoj jam fariĝis homoj plej respektataj.

Janbjan-subprovinco dediĉas apartan atenton al pedagogio de la antaŭlernoaj infanoj. En la Infanĝardeno de Gŭangĝaŭvilaĝo, Gŭangkaj-subdistrikto mi vizitis vartoĉambbron, dormoĉambbron kaj manĝejon de infanoj. Sur la sportejo estas rotacia aviadilo, sidglitejo, trapezo, aerveturilo kaj aliaj grandaj ludaparatoj. Estrino de tiu infanĝardeno kaj 6 vartistinoj speciale edukitaj prizorgas 124 antaŭlernoajn infanojn de la vilaĝo. Tie ne ekzistas la problemo, kiel en Pekino, ke por infanoj estas malfacile eniri en infanvartejon kaj infanĝardenon.

En la infanĝardeno oni donas al la infanoj lecionojn pri lingvo, komunaj scioj, kalkulado, fizika kulturo, muziko, slojdo k.a. Per vivecaj kaj viglaj ludoj la

vartistinoj lertigas la infanojn en observokapablo, memorkapablo, juĝpovo kaj esprimovo. Dank' al bona edukado, la infanoj estas ĝentilaj ekde sia infaneco.

La kore-naciecaj geknaboj de la infaneco jam interesiĝis pri muziko kaj danco dank' al denaska edukado, kaj preskaŭ ĉiu infano ŝatas kanti kaj danci. Iuj elstaraj el ili estas akceptitaj en la postlecionan artkurson kaj lernas sub gvido de instruisto. Kiam mi vizitis la Janbjan-an Infanan Doman, la infanoj de la *ĝjaje**-kurso ekzercis sin en ludado. La ritma frapado de tamburo, ludado de *ĝjaje* kaj dolĉa kantado de la infanoj ekscitis ĉiujn. La malgrandaj kursanoj estas nur 9-jaraj lernantoj en la tria klaso de elementa lernejo.

La Geknaba Postleciona Kultura kaj Arta Lernejo de Hunĉun-gubernio varbis lernantojn pri akordiono-ludo, fluto-ludo kaj belarto post sia fondiĝo en 1985. La infanoj diplomiĝintaj el tiu lernejo povas labori kiel instruistoj pri muziko kaj belarto en la elementaj lernejoj de la gubernio. En Maĉŭanzi-a Geknaba Postleciona Arta Lernejo funkciigata de la Maĉŭanzi-a Kultura Stacio mi vidis, ke 14 malgrandaj akordionistoj de la akordiona kurso estas absorbitaj en lernado sub la gvido de muzika instruisto. Mi rigardis prezentadon de la infanoj. Kvankam ili lernis mallongan tempon, tamen la prezentado jam plene montris ilian artan talenton. Tia postleciona arta lernejo ne nur riĉigis la kulturan vivon de la kamparo, sed ankaŭ kulturis artajn aktivulojn por la gubernio kaj subdistrikto, el ili la plej talentaj estas senditaj al faka lernejo aŭ organizo por plua studo.

La lernejoj de Janbjan dediĉis grandan atenton ankaŭ al speciala edukado, iuj lernejoj dediĉis atenton al kulturado de piedpilkistoj, iuj al tiu de sportistoj de sketkuro kaj artosketado kaj iuj al

instruado pri abaka kalkulado. La lernantoj de la Janbjan-a subprovinco iam enviciĝis inter la plej antaŭaj lokoj en konkurso de abaka kalkulado por plenaĝuloj de la lando. La infana piedpilka teamo plurfoje gajnis ĉampionecon en Bejbej-pokala konkurso de elementlernejanoj de la tuta lando.

Laŭ la koncernaj artikoloj de "Leĝo pri Aŭtonomeco" de la aŭtonoma subprovinco, ĉiuj kore-naciecaj infanĝardenoj, elementaj lernejoj kaj mezlernejoj de la subprovinco uzas la korean lingvon en instruado kaj lernolibrojn en la korea lingvo. Ekde la tria klaso de elementa lernejo la lernantoj eklernas la hanan lingvon. La abiturientoj de superaj mezlernejoj povas respondi en la korea lingvo en ekzameno por viziti superan lernejon. Dank' al tio, la kore-naciecaj lernantoj povas sufiĉe disvolvi sian talenton, kio senĉese altigas ilian lernonivelon.

Ankaŭ ekzistas iuj mankoj en la disvolviĝo de la eduka afero de la Janbjan-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. Ekz., la lernantoj tie devenintaj plejparte estas talentaj en la flankoj de la sociaj sciencoj, kulturo, eduko kaj arto, sed mankas talentuloj en tiuj de scienco, tekniko, ekonomia administrado k. a., kio jam fariĝis problemo urĝe solvenda en la ekonomia disvolviĝo de la aŭtonoma subprovinco. Krome, ankaŭ la profesia teknika edukado, mezgradaj fakaj lernejoj kaj edukado al laboristoj kaj oficistoj devas esti plue disvolvataj. ■

*Ĝjaje — kordinstrumento.



Diagnozaj metodoj de la ĉina medicino

de U BOPING¹

En "Ŝi Ĝji", la plej antikva historia verko de Ĉinio, legiĝas jena rakonto: Fama kuracisto Bjan Ĉjue vojaĝis al Ĉji-regno. Vidinte la regnestron de Ĉji, li tuj rimarkigis al li, ke li estas malsana kaj la malsano kuŝas en la karno kaj haŭto. Tamen la regnestro ne kredis. 5 tagojn poste Bjan Ĉjue revidis la regnestron kaj diris, ke la malsano jam transiĝis en la sangon, sed la regnestro ankoraŭ ne kredis. En la tria intervidiĝo la kuracisto diris, ke la malsano jam atingis la internaĵojn, tamen la regnestro ree kapneis. Post la kvara renkontiĝo la kuracisto tuj foriris. Oni demandis lin pri la kialo. Li respondis, ke la malsano de lia regnestra moŝto jam eniĝis en la medolon kaj kontraŭ ĝi efikas nenia kuracilo. Post kelkaj tagoj la regnestro mem konsciis la graviĝon de sia malsano kaj tuj serĉis Bjan Ĉjue, kiu tamen estis jam for. Post nelonge la regnestro mortis.

Diagnozo per rigardo estas grava metodo de kuracistoj de la ĉina medicino, kion oni nomas rigarda diagnozo. Ĝuste tiamaniere Bjan Ĉjue konis la ŝanĝiĝon de la malsano de la regnestro.

Kuracistoj de la ĉina medicino diagnozas per jenaj kvar metodoj: rigardo, flarado kaj aŭskultado, pridemando, pulso-palpado kaj palpo-premado.


La rigarda diagnozo signifas, ke kuracistoj observas per siaj okuloj la tuton aŭ parton de la korpo de la malsanulo por koni la kazon.

Supre mi jam konigis, ke la ekstero de homo strikte rilatas kun liaj internaĵoj. Ĝenerale dirite, la malsano de internaj organoj estigas respondan ŝanĝiĝon ĉe la homa ekstero. Tio speguliĝas precipe sur la vizaĝo kaj lango. La rigarda diagnozo ampleksas rigardon de la mieno, koloro, aspekto kaj sinteno de la malsanulo, rigardon de liaj ekskrecioj kaj rigardon de la okuloj, oreloj, nazo, lipoj, lango kaj fingraj haŭtlinioj.

Parolante pri rigardo de la koloro, ĝenerale oni observas tiun de la vizaĝo. La ĉinoj estas flavuloj. La vizaĝo de la sanaj ĉinoj devas esti brile flava kaj iom ruĝa. La malsanoj alikolorigas la vizaĝon. Bluo estiĝas ĉefe ĉe la malsanuloj suferantaj malvarmon kaj doloron. Ruĝo ĉefe ĉe tiuj suferantaj varmajn simptomkompleksojn. Flavo ĉefe ĉe tiuj suferantaj malsekan malsanon aŭ ĉe tiuj, al kiuj mankas vitala energio. Pala koloro estiĝas de manko de sango kaj nigra koloro de la rena feblo.

Rigardo de la lango estas tre

Ĉin-medicina kuracisto palpas pulson de paciento.



grava en la rigarda diagnozo. Unue oni rigardas la esencon de la lango, inkl. de ĝiaj koloro kaj aspekto. La normala lango estas palruĝa, malseka, mola kaj lertmova. La tro pala koloro signifas mankon de vitala energio kaj sango. La tro ruĝa koloro signifas internan varmon. La mallerta movo de la lango montras graviĝon de la malsano. Rigardo de la saburo utilas por koni la digestan funkcion, la malsanon kaj patologian ŝanĝiĝon de la stomako kaj intestoj. La saburo de sana homo estas maldika, pala kaj malseka. Ĝia blankiĝo montras malvarmiĝon. Ĝia flaviĝo febron kaj ĝia griziĝo graviĝon de la malsano.

Spertaj kuracistoj de la ĉina medicino povas multe koni la malsanon per rigarda diagnozo.

Flarado kaj aŭskultado estas alia metodo de kuracistoj por fari diagnozon. Kuracistoj de la ĉina medicino povas fari diagnozon pere de ŝanĝiĝo de la parolo, spiro, tuso, rukto kaj vomo. Sana homo parolas nature, mezvoĉe kaj klare. La tro alta tono indikas, ke fizike forta malsanulo suferas febron aŭ perturbon, kiaj kongesto kaj mallakso. La tro malalta tono indikas malsanon markitan per manko de vitala energio, malleviĝo de rezistpovo ktp. La obtuza tono montras malsekecon perturbanta la pulman funkcion. La subita raŭkiĝo pro nova malsano montras, ke tiu malsano estas kaŭzita de eksteraj faktoroj. Raŭkiĝo pro longa malsano montras damaĝon de vitala energio. Rapida obtuza spirado de abrupta malsaniĝo montras, ke tio estas kazo de fizike forta paciento suferanta febron aŭ perturbon, kiaj kongesto kaj mallakso, kio vidiĝas ĉe forta pulma varmo. Dum spirado malforta, mallonga kaj brueta de malrapida malsaniĝo montras, ke la paciento suferas nesufiĉecon de vitala energio kaj korpa rezistpovo, kio vidiĝas en manko de vitala energio

ĉe la pulmoj kaj renoj. Forta tuso kun multa kaj maldensa mukaĵo estiĝas plejparte de malvarmo damaĝanta la pulmojn, dum malfacila tusado kun flava kaj densa mukaĵo estiĝas plejble de varma mukaĵo en la pulmoj.

Krome, laŭ la ĉina medicino la buŝa malbonodoro vidiĝas en pirozo aŭ gastroentera perturbo. La serioza hepata insuficienco kaŭzas fiodoron. Fetoro de akselo kaŭziĝas de malsekeco kaj varmo. Akra malbonodoro de fekaĵo kaŭziĝas de la akumulita varmo en la intestoj, kio vidiĝas en enterito. Maldensa kaj fiodora fekaĵo montras, ke la paciento suferas malvarmon ĉe la intestoj, kio vidiĝas en intesta tuberkulozo, parta enterito k.a.

Dum la diagnozo kuracistoj de la ĉina medicino ĝenerale demandas la pacienton aŭ lian parencon por koni liajn simptomojn, la estiĝon kaj ŝanĝiĝon de lia malsano kaj la antaŭan kuracadon. Tio estas demanda diagnozo.

Kuracistoj de la ĉina medicino ĝenerale povas reciti "Dek Demandoj": "Unue demandu pri varmo kaj malvarmo. Due pri ŝvito. Trie pri la kapo kaj korpo. Kvare pri la urino kaj fekaĵo. Kvine pri manĝitaĵo. Sese pri la brusto kaj ventro. Sepe pri la oreloj kaj okuloj. Oke pri la dormo. Naŭe pri la malnovaj kazoj kaj deke pri la kaŭzoj." Tio helpas la kuracistojn koni la enhavon kaj vicon de la demandoj en la diagnozo kaj ludas gvidan rolon en la praktikado. Kompreneble tio estas nur skizo, fakte la demanda enhavo estas tre detala kaj diferenca laŭ la nivelo de la kuracistoj. Ekz., ĝenerale post demando pri ŝvito la kuracistoj konas la kazon, ĝiajn ŝanĝiĝon kaj evoluon. Ekz., la eksteraj simptomoj kaŭzitaj de eksteraj faktoroj: senŝvita simptomo montras malsanon de fizike forta homo suferanta febron kaj mallakson. La simptomo kun ŝvito indikas

nesufiĉecon de vitala energio. Facila ŝvitado je ajna movo montras febliĝon de *jang*², dum ŝvitado en dormo kaj ĉeso post vekigo montras febliĝon de *jin*². Hemikorpa ŝvitado kaj hemikorpa neŝvitado kaŭziĝas ĝenerale de hemiplegio, longa aŭ grava malsano, dum la tutkorpa ŝvitegado kun malvarmiĝo de la kvar membroj kaj malleviĝo de la sangpremo montras kolapson. Malapero de febro post ŝvito, normaliĝo de pulso kaj malvarmetiĝo de korpo ĝenerale montras iom-post-ioman resaniĝon. Post ŝvitado daŭra febro, malkvietiĝo kaj soifo montras fortan internan varmon.

Alia ekzemplo estas lokoj de doloroj. Malsamaj doloroj estas manifestiĝo de malsamaj malsanoj: Ŝvela doloro kaŭziĝas de vital-energia stagno, pikdoloro — de kongestado, vaga doloro — de reŭmatismo, malvarma doloro — de malvarmo, brula doloro — de ekstera brulo, ŝirdoloro — de malvarma stagno, malklara doloro — de manko de vitala energio kaj sango, implika doloro — de malĝlata cirkulo de hepata vitala energio, kaj malplena doloro — de manko de vitala energio kaj sango.

La pulso-palpado estas farata tiamaniere: Kuracisto palpas la pulson de arterio de paciento por koni lian malsanon. Dum la pulso-palpado la paciento devas sidi aŭ kuŝi surdorse kaj etendi siajn brakojn kun manplatoj direktitaj supren, por ke la sango fluu facile. Kuracistoj de la ĉina medicino ĝenerale palpas la pulson de la dekstra pojno de paciento per sia maldekstra mano kaj palpas tiun de lia maldekstra pojno per sia dekstra mano. Ili palpas en jena maniero: Per sia longa fingro ili premas *gŭan*, la post-pojnan internan flankon de radiuso de la paciento, dum iliaj montra kaj ringa fingroj premas *cun*, la antaŭan parton, kaj *ĉi*, la postan parton de *gŭan*. Dum la premado



Palpo-premado de *cun*, *gūan* kaj *çi*.


ili devas iomete fleksi la fingrojn kaj premi oblikve. Ili tuŝas la pulson de la paciento per la fingraj palpkusenetoj. La dekstra kaj maldekstra manoj ĉiu havas *cun*, *çi* kaj *gūan*, sume 6 partojn. Ĝenerale oni opinias, ke la maldekstra *cun* apartenas al la koro kaj maldika intesto; la maldekstra *gūan* al la hepato kaj galo; la maldekstra *çi* al la renoj kaj veziko; dum la dekstra *cun* al la pulmoj kaj dika intesto, la dekstra *gūan* al la lieno kaj stomako, kaj la dekstra *çi* al la renoj kaj vitala pordo.

Homo havas kelkdek pulsajn statojn. La normala pulso estas stabila kaj ritma, ne flosa nek profunda. La flosa pulso estas facile palpebla, kio indikas ke la malsano estas ekstere. La profunda pulso estas trovebla nur ĉe forta premado, kio indikas, ke la malsano estas interne. La rapida pulso indikas, ke la paciento suferas febron, dum la malrapida pulso montras, ke la paciento suferas malsanon kaŭzitan de malvarmo. La glita pulso montras, ke la pacientino suferas mukajan varmon aŭ gravediĝis. La neglita pulso montras, ke la paciento suferas mankon de sango. Se la pulso sentiĝas kiel

streĉo de pafarko, tio montras, ke la paciento suferas hepatan malsanon. La malrapida kaj neregula pulso montras, ke la paciento suferas kormalsanon.

En la prema diagnozo kuracisto per la manoj tuŝas la membrojn, bruston, ventron kaj haŭton de paciento. La temperaturo kaj grado de moleco de la tuŝitaj korpopartoj estas utilaj por diagnozo.

La palpa-prema diagnozo estas originala metodo. Tamen la ĉina medicino emfazas, ke ĉiu ajn metodo devas kombiniĝi kun la aliaj tri por fari ĝeneralan analizon kaj ĝustan diagnozon. Antikvuloj faris trafan resumon pri la kvar diagnozaj metodoj de la ĉina medicino: "Dia kuracisto konas malsanon per rigardo. Sankta kuracisto konas malsanon per flaro kaj aŭskulto. Sperta kuracisto konas malsanon per demandoj. Lerta kuracisto konas malsanon per pulso-palpado kaj palpo-premado." Tio signifas, ke la kombiniĝo de rigardo, flaro kaj aŭskulto, demando kaj palpo-premado povas ĝuste konigi la malsanon. Tia kuracisto estas erudicia kaj eminenta kaj povas bone koni la kazojn.



Bildo pri rigarda diagnozo en klasika libro de la ĉina medicino

La materialoj akiritaj de kuracistoj de la ĉina medicino estas bazo por koni malsanon. Sur tiu bazo oni devas fari ĝeneraligon, analizon, resumon kaj prijuĝon, alivorte, per dialektiko, laŭ la profundeco, trajtoj de la malsano kaj la forteco de la vitala energio de la paciento, oni konkludas ok simptomarojn: *jin*, *jang*, nesufiĉa, ekscesa, ekstera, interna, malvarma kaj varma. Ili estas ok principaj simptomaroj taŭgaj por diagnozi diversajn malsanojn en kliniko. ■

1. La aŭtoro estas esploranto de la Ĉin-medicina Instituto.

2. *Jin* kaj *jang*, la du fundamentaj principoj aŭ fortoj en la universo, ĉiam kontraŭaj kaj kompletigaj unu al la alia — antikva filozofia koncepto uzata en la tradicia ĉina medicino por aludi diversajn antitezojn en anatomio, diagnozo kaj klinika traktado, ekz. femalo, interno, malvarmo kaj hipofunkcio estas *jin*, dum masklo, varmo kaj hiperfunkcio estas *jang*.

Ĉinaj porcelanaĵoj

de ĈENG ĈINHŬA

Porcelanaĵo estas unu el la grandaj antikvaj inventaĵoj de Ĉinio kaj renomiĝas tra la mondo pro sia beleco kaj multuzebleco. Laŭ teknologio porcelanaĵo disvolviĝis el argilaĵo, sed ili diferencas unu de la alia. Porcelanaĵo farita el kaolino post bakado en temperaturo de pli ol 1 200°C estas nepenetrebla por akvo kaj metale tintas je frapado,

dum argilaĵo farita el kruda argilo post bakado en temperaturo de malpli ol 1 000°C estas akvopenetrebla kaj eligas obtuzan sonon je frapado.

En la meza periodo de Ŝang-dinastio antaŭ 3 500 jaroj Ĉinio jam elfaris primitivan celadonverdan porcelanaĵon. En la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.) la ĉina


porcelanaĵo eniris el la primitiveco en la fruajn periodojn.

En la dinastioj Ŭej kaj Ĝin kaj la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (220-589 p.K.) impetis la ĉina porcelana produktado. Pro la influo de budhismo la tiamaj porcelanaĵoj ĝenerale portis lotusflorajn desegnojn. En Hebej-provinco oni elterigis faman



Avalokitesvaro el celadonverda kaj blanka porcelanoj (Ĵŭan-dinastio)

Gravurohava botelo kun arĝenta kovrilo (el Dingbakujo de Song-dinastio)






Celadonverda vazo kun lotusflora desegno (el la Nordaj Dinastioj)




Kvinkolora pelvo (el Ming-dinastio)

Celadonverda plata kruĉo kun figuroj de homo kaj leonoj (el Tang-dinastio).



Blanka porcelana vazo kun gr
dinastio)

Porcelana kapkuseno en formo






Pravurita desegno (el Song-




Bludesegna kruĉo
kun ok anguloj (el
Jŭan-dinastio)


Vazo kun lotusflora
desegno (el Ĉing-
dinastio)

de infano (el Song-dinastio)





Duobla koloro vazo kun emajla lotusflora desegno (el Ĉingdinastio)



Orelhava vazo (el Ge-bakujo de Song-dinastio)



Kruĉo kun bluaj desegnoj de floroj kaj drakoj (Ming-dinastio)

celadonverdaj porcelanaj vazoj altan je 66.5 centimetroj. Kun diketa korpo ornamita per reliefaj lotusaj petaloj ĝi estas rigardata kiel elito de la celadonverdaj porcelanaĵoj en norda Ĉinio. Estas aparte menciinde, ke en la Nordaj Dinastioj (386-534 p.K.) oni sukcesis elbaki blankajn porcelanaĵojn, kio estas grava afero en la ĉina porcelana historio, ĉar dank' al tio oni produktis poste porcelanaĵojn kun koloraj desegnoj.

En Tang-dinastio (618-907 p.K.) Ĉinio havis senprecedencan disvolviĝon en diversaj flankoj. La celadonverdaj porcelanaĵoj produktitaj en Juĵaŭ-gubernio, Ĝeĝjang-provinco, en suda Ĉinio kaj blankaj porcelanaĵoj produktitaj en Linĉeng-gubernio, Hebej-provinco, en norda Ĉinio montris la atingojn de la tiama porcelana

produktado. Tiaj celadonverdaj porcelanaĵoj karakteriziĝis per delikateco, maldikeco kaj kristaleco de glazuro. Iuj el ili servis al la imperiestra familio. La blankaj porcelanaĵoj de Linĉeng kun koloro, neĝa aŭ arĝenta ĝuis grandan famon. Tiam iu muzikisto elektis 12 bovlojn el la duspecaj porcelanaĵoj, plenigis ilin per malsamkvanta akvo kaj ludis muzikon per frapado al ili. La sonoj estis tre plaĉaj al la oreloj, kio plene pruvis la bonkvalitecon de la objektoj.

En la malfrua periodo de Tang-dinastio la bakujo Tongĝuan de Ĉangŝa inventis novan teknologion unue pripentri la nebakitan porcelanon kaj poste ĝin glazuri kaj baki. La elterigita brunverda porcelana kruĉo kun floroj kaj birdoj lerte kaj vivece pentritaj vidigis al ni la aspekton de popolaj

penetraĵoj de Tang-dinastio pri floroj kaj birdoj.

En Song-dinastio (960-1279) la ĉina porcelana produktado impete progresis. La arkeologiaj eltrovoj montras, ke el la 170 ĉinaj gubernioj, kie troviĝas ruinoj de la antikvaj bakujoj de porcelanaĵoj, 130 havas tiajn bakujojn de Song-dinastio. Tiam estis kvin famaj bakujoj, nome Ding (en Ĉĵujang-gubernio, Hebej), Ĵu (en Lingĵu-gubernio, Henan), Ĝuan (en Kajfeng kaj Hangĝou), Ge (en Longĉĵuan-gubernio, Ĝeĝjang) kaj Ĝjun (en Juŝjan-gubernio, Henan). Ding-porcelanaĵoj estis ne nur delikataj, maldikaj, glazure kristalaj, sed ankaŭ multe ornamitaj per presitaj kaj gravuritaj desegnoj kun strekoj simplaj kaj fortaj. La ornamaj desegnoj temas pri floroj, bestoj, birdoj, fiŝoj, ludantaj infanoj k.a. Anstataŭ uzi

ornamajn desegnojn la aliaj famaj bakujoj donis atenton al plastiko kaj glazuraj koloroj por beligiajn produktaĵojn. Ĵu-porcelanaĵoj estis brile glazuritaj. Ĝjun-porcelanaĵoj neforgeseble impresis per pompeco kaj ŝanĝiĝemo, kiujn ili akiris dum la bakado pro interpenetrado de diversaj glazuroj. Ge-porcelanaĵoj plenaj de glacikrevaj desegnoj aspektas pli antikvecaj kaj pli elegantaj. Ĝuan-porcelanaĵoj estis faritaj el kaolino riĉa je fero kaj glazuritaj dike kaj brile. La supra parto de la porcelanaĵoj maldikis pro malsuprenfluo de la glazuro kaj ricevis purpuron, dum la bazo montriĝis nigra pro manko de glazuro. Tiuj trajtoj faciligas ekspertizi produktaĵojn de tiu bakujo. Krome, okulfrapa estis ankaŭ la bakujo Ciĝou (kies ĉefa parto en Handan de Hebej), kiu produktis porcelanaĵojn ĉefe por la popolo. Tiam oni ornamis la porcelanaĵojn per pentritaj floroj, birdoj, insektoj, fiŝoj, homfiguroj kaj pejzaĝoj plenaj de densa etoso de popola vivo. En la Suda Song-dinastio (1127-1279) la celadonverdaj porcelanaĵoj de Longĉjŭan, Ĝeĝiang, sin trovis en sia plej prospera periodo. Ili estis maldikaj, dike glazuritaj kaj kristalaj kiel jado.

En Ĵuan-dinastio (1271-1368) oni fondis la Fuljang-an Porcelanan Buroon en Ĝingdeĝen, Ĝjangŝji, kaj la loko fariĝis la centro de la ĉina porcelana produktado. En tiu tempo pli kaj pli perfektigis la farado de bludeseĝna blanka porcelanaĵo. Por fari tian porcelanaĵon, oni unue pentris sur la nebakita korpo per kobalta pigmento drakon, fenikson, birdojn aŭ florojn kaj poste ĝin blanke glazuris kaj bakis. En Ĵuan-dinastio, krom jadblanka glazuro, oni sukcesis fari ankaŭ ovoblanke, ruĝan kaj bluan glazurojn. Dank' al tio porcelanaĵoj ekhavis polikromian ornamon.

Bludeseĝna kaj polikromia

ornamaj bone reprezentis la ornaman nivelon de porcelanaĵoj de Ming-dinastio (1368-1644). La bludeseĝnaj porcelanaĵoj de Ŝjŭande-erao karakteriziĝis per delikateco, pureco kaj brileco. La desegnoj de bluaj marondoj kaj blanka drako, per kiuj oni ornamis Tjanĉiŭ-botelon, vidigis belecon de forto kaj movado per kolora kontrasto kaj fluaj strekoj. La kvinkolora porcelanaĵo kaj tiu kun polikromia surglazura ornamo estis novaj specoj de porcelanaĵoj de Ming-dinastio. La kvinkolora homfigura pleto, produktita de Ĝingdeĝen, kun bildo pentrita en koloroj ruĝa, blua, verda, flava kaj purpura donis impreson de pompeco. La porcelanaĵo kun polikromia surglazura ornamo estis tiel farita: Unue oni pentris skizajn desegnojn per blua kolorilo sur la kruda korpo kaj ĝin blanke glazuris, post bakado oni aldonis polikromiajn desegnojn al la bluaj sur la glazuro kaj ĝin denove bakis. Tia ornamo kun kolora nuanco brila kaj harmonia havas efekton de la ĉina tradicia realisma pentrarto.

En la regperiodoj de la imperiestroj Kangŝji, Jongĝeng kaj Ĉjanlong (1662-1795) de Ĉing-dinastio la produktado de ĉinaj porcelanaĵoj atingis sian kulminon. En Kangŝji-periodo la kvinkoloraj porcelanaĵoj ĉarmis per denseco kaj brileco de koloroj. Tiam oni povis pentri sur porcelanaĵo grandiozan scenon de historia epizodo, ke la porcelanaĵo havis pli altan artan valoron. Lŭanmu-trinkvazo de Jongĝeng-periodo maldikis kiel papero. La akvarela ornamo reprezentis tiutempan ornaman arton. Oni unue pripentris porcelanaĵon per ĉina tuĉado. Post bakado la pentraĵo efektis kiel akvarelo. Dum Ĉjanlong-periodo oni perfekte kopiis produktaĵojn de ĉiuj famaj bakujoj de diversaj tempoj kaj ankaŭ faris porcelanaĵojn imite al bronzaĵoj, jadaĵoj, lakitaĵoj kaj lignaj ujoj. La tiamaj porcelanaĵoj

kun emajla ornamo farita laŭ olepentrado servis nur al la imperiestra familio.

Nun ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio povas produkti porcelanaĵojn en klara loka gusto kaj nacia stilo. La ĉefaj produktaĵoj de ĉinaj porcelanaĵoj inkluzivas Ĝingdeĝen de Ĝjangŝji, Liling de Hunan, Tangŝan kaj Handan de Hebej, Ŝiŭan de Ĝuangdong, Dehŭa de Fugĵan, Jiŝing de Ĝjangsu, Longĉjŭan de Ĝeĝiang kaj Zibo de Ŝandong. Ĝingdeĝen restas ankoraŭ fama urbo de la ĉinaj porcelanaĵoj, kies produktaĵoj kun bluaj desegnoj, kun tiuj kaj aĵuraĵoj, kun polikromia ornamo kaj kun koloraj glazuroj ĝuas grandan famon. Por la porcelana ornamo oni lerte uzas esprimmanierojn de ĉinstila pentraĵo, olepentraĵo, ksilografado, akvarelo k.a. La glazuraj koloroj de porcelanaj skulptaĵoj de Ŝiŭan estas brilaj kaj pompaj, kaj la formoj graciaj. La statuoj de Avalokitesvaro kaj Bodhidharma bakitaj de Dehŭa, kun laktoblanka kaj helflava glazuroj, estas admirindaj en farado. Ciĝou-porcelanaĵoj de Handan kun koloroj blanka kaj nigra en kontrasto distingiĝas per eleganteco, sereneco kaj originaleco. La porcelanaj gravuraĵoj de Zibo estas freŝaj en la projektado kaj la strekoj vivecaj kaj fortaj.

Ĉinio jam restarigis produktadon de ĉiuj famaj antikvaj bakujoj, kiuj ne funkciis dum multaj jaroj. La celadonverdaj porcelanaĵoj de la restarigita Jaŭĝou-bakujo de Song-dinastio estas tre ŝatataj de la uzantoj pro la fortaj strekoj de la gravuritaj desegnoj, brilaj glazuroj kaj klaraj glacikrevoj. La restarigita Ĝjun-bakujo reaperigis siajn tradiciajn produktaĵojn kaj Ĵu-bakujo vidigis sur siaj produktaĵoj la originalajn trajtojn: sub la glazuro punktiĝas malgrandaj makuloj kaj surglazure montriĝas glacikrevaj desegnoj. ■

Bofilino de malproksime (Novelo)

Baldaŭ mi vidos la bopatrinojn, kaj la timemo kaj hontemo faris al mi premon en la koro.

Kion mi diros je la renkontiĝo? Kompreneble, mi devas nomi ŝin panjo. Ha, kiel honte! Mi estas nun fianĉino. Aŭ mi nomu ŝin onklino? Sed tio ofendetos Ŝjueljang. En Harbin li ĉiam nomas mian patrinojn panjo. Fakte baldaŭ ni geedziĝos, kaj cetere Ŝjueljang restis en Harbin post diplomitiĝo el universitato por esti kune kun mi. Alie li povus reveni al sia patrino, ĉar li estas solfilo. Tion pensante, mi ofte ruĝiĝis. Jes, hodiaŭ mi nepre nomos ŝin panjo!

Forta estis la vintra vento, ke mi ne povis malfermi la okulojn. Ŝjueljang paŝis antaŭen kun levita kapo, kvazaŭ li forgesis mian ĉeeston. Trakuris mian koron ia malagrableco.

Ni paŝis en malgrandan kvadratan korton. Ŝajne Ŝjueljang hezitis momenton kaj malrapide malfermis la pordon de iu ĉambro. Jen la hejmo de mia bopatrino.

“Ĉu Jingzi venas? Tuj eniru. Mi pretigis por vi batatojn.” En la ĉambro eksonis maljunula voĉo en gaja tono.

Ŝjueljang dube ekrigardis al mi; evidente ŝi salutis ne nin.

Estis obskure en la ĉambro. Nebule konturiĝis figuro de maljunulo kun dorso al ni, pri io okupiĝanta antaŭ la kuirforno. “Panjo”, Ŝjueljang mallaŭte salutis, kaj la maljunulino nerveze turnis sin.

Ho, kia vizaĝo! Marasma, ŝrumpa, tute ne tia, kia en mia

imago.

“Panjo, ŝi estas Pingping... Antaŭe mi menciis ŝin al vi...” Li klopodis por rememorigi al si pri mi.

“Pingping...” la maljunulino glitigis la rigardon sur min.

Mi tuj klinis la kapon kaj mallaŭte salutis: “Onklino,” tuj poste mi ektemis pro frosto kaj tute malvarmiĝis la koro. Mi ne kuraĝis levi la rigardon al Ŝjueljang, tamen mi konsciis lian surpriziĝon kaj ŝokiĝon.

“Vere ĉarma knabino,” subite miaj manoj estis kaptitaj de krudaj manoj plenaj de bluaj vejnoj. Mi tuj eksentis la afablecon kaj amikecon en ŝia voĉo. Mi legis en ŝiaj okuloj ekscitiĝon kaj kontenton, kiuj faris ŝian ŝrumpo vizaĝon similan al juglanda ŝelo afabla kaj intima...

En pluraj tagoj Ŝjueljang okupis sin pri vizito al amikoj kaj kunlernintoj, sed neniam kunportis min, kaj intence lasis min al tiu

nekonata maljunulino.

Kiam en la ĉambro restis nur mi kaj la maljunulino, ŝi ofte petis min subite: “Mia infano, ne estu tiel silentema! Ion preparolu.” La espera kaj timida peto de la maljunulino rememorigis al mi pri mia forpasinta avino.

Kiel en mia memoro, mia avino ĉiam kuŝis en la lito dum sia maljuneco. Mia patro estas honesta, kaj la patrino mastras la domon. Tiam mi estis tre malgranda, kaj ofte okazis kverelo inter la gepatroj pri la manĝaĵoj por la avino. La patrino ĉiam donis al mi bongustaĵojn, kaj mi ŝtele donis ilin al la avino, sed la avino ĉiam diris karesante min per la malgrasaj, sekaj manoj: “Ping, vi mem manĝu ilin. Mi jam maljuniĝis, kaj estas indiferenta por manĝaĵoj. Mi volas nur konversacii kun vi.” Kaj en tiu tempo ŝi ĉiam havis larmojn en la okuloj kaj mi malpeze forviŝis por ŝi larmojn starante sur la piedpintoj.



Kiel similaj estas la maljunulino kaj mia avino! Mi tristiĝis. Ŝjueljang, nun mi komprenis, kial vi ĉiam montris aflikton, eĉ en la plej agrabla momento. En via koro ĉiam kaŝiĝas neforviŝebla melankolio, nome sopiro al la patrino kaj konscienc-riproĉo.

“Vi ploras, mia infano,” diris la maljunulino fiksante la rigardon sur mi.

“Mi, mi rememoras mian avinon.”

“Kiel ŝi fartas?”

“Ŝi forpasis.”

“Ve, homoj maljuniĝas, sentaŭgiĝas; preferinde morti ol vivi.”

Silente mi rigardis ŝian maldensan grizan hararon kaj sentis sufokiĝon. Jes, kiam homoj maljuniĝas, ili havas neniun aspiron kaj nur esperas interkomunikiĝon kun aliaj, por eskapi el soleco kaj forgesiteco. Mi konsciis mian devon, ke mi devas savi la maljunulan koron el senhelpa soleco.

“Mi ŝuldas grandan dankon al Jingzi en tiuj jaroj, kiam Ŝjueljang forestas,” senĉese murmuris mia bopatrino, senmove rigardante la maljunan paŭlovnion ekster la fenestro. “Ve, homoj maljuniĝas, sentaŭgiĝas kaj fariĝas ĝenaĵoj...”

Mi ne kuraĝis rekte levi mian rigardon al ŝia vizaĝo kaj nur fiksas ĝin sur ŝiaj malgrasaj manoj plenaj de bluaj vejnoj.

“Kiu estas Jingzi?” mi mallaŭte demandis.

“Nepino de najbara avino Ma.” Unuafoje supren kurbiĝis la anguloj de ŝiaj ŝrumpaj lipoj. “Ŝi estas afabla knabino. Ŝi ofte venas al mi, reveninte de lernejo. Mi ofte pretigas por ŝi bongustaĵojn, por ke ŝi restu ĉe mi pli longe...”

Mi rigardis eksteren tra la fenestro, sekvante ŝian rigardon kaj vidis, ke folio defalas de sur la paŭlovnio kaj spirale ŝvebas



ĉirkaŭ la arboradiko. Subite, eksterdome, tuj ĉe la fenestro aperis kapeto. Ekradiis la okuloj de la maljunulino: “Venu, tuj venu, Jingzi!” La kapeto malrapide turniĝis al mi. Post momento ŝi skuetis la kapon kaj malaperis. Malaperis ankaŭ la ĝojo sur la vizaĝo de mia bopatrino. “Ve, homoj maljuniĝas, sentaŭgiĝas...”

“Kiel fartas via patrino?” subite ŝi demandis min.

“Dankon, ŝi fartas bone.” Tuj aperis en mia cerbo la sana kaj graseta figuro de mia patrino.

“Certe ŝi multe pli juna ol mi, ĉu ne?”

“Jes,” mi diris, “sed fakte ne multe.”

“Kiam mi estis juna, mi estis tualetema. Vi rigardu mian foton,” ŝi palpe fositadis en la malordaj tirkestoj, kaj pli forte tremetadis ŝiaj maljunaj manoj. “Ve, perdiĝis, ili perdiĝis, neniun foto dum mia juneco estas trovebla...” Ŝi diris afliktite,

ŝajne bedaŭris pri la forpasinta juneco.

Ho, ĉiu virino spertas junecon, ĝojon, kaj kompreneble ankaŭ maljuniĝon kaj morton.

Apogante mian mentonon sur la manoj, mi larmis nereteneble. Mi unuafoje profunde komprenis la seneliran staton de la homa vivo. “Panjo,” mi volontus kroĉiĝi al ŝi kaj tiel nomi ŝin, sed mi detenis min de tio. Mi timis, ke en tiu momento mia ekscitiĝo fortigos aflikton de la maljunulino. Sed kiamaniere mi povos alporti ĝojon kaj lumon al la soleca koro? Granda implikiĝo formiĝis en mia koro.

Malheliĝis, ekventis. Eksonis en la korto la konata paŝbruo.

“Ŝjueljang revenas!” ĝoje ekkriis la silenta patrino.

Mi eliris, renkontante al la alpaŝanto. Mi diros al li: “Ŝjueljang, ni loĝu kune kun panjo!”

Esperantigis ŬANG SENCAJ

Li Baj, granda romantika poeto

de MEJ ĜI

Li Baj (701-762 p.K.) vivis en la prospera periodo de Tang-dinastio. Li estis elstara reprezentanto de tiutempa poezio kaj ankaŭ granda romantika poeto en la ĉina literatura historio post Ĉju Jūan.

Kie li naskiĝis? Tio restas problemo diskutata eĉ hodiaŭ. Iuj opinias, ke liaj prapatroj vivis en Gansu-provinco kaj li mem en Siĉŭan-provinco. Aliaj asertas, ke li naskiĝis en Sujje de la Centra Azio. Vivante en riĉa familio Li Baj ricevis bonan edukon dum sia infanaĝo. La juna Li Baj estis interesata de multaj aferoj: legi librojn, verki poemojn, sin ekzerci en skermado, kaj kondukis kavalire. En la aĝo de ĉ. 20 jaroj li komencis vojaĝi en Siĉŭan-provinco kaj en la aĝo de 25 jaroj li forlasis la familion kaj komencis la vagan vivon.

Li Baj vivis en la epoko, kiam Tang-dinastio estis senprecedence prospera kaj potenca kaj havis diversajn sociajn kontraŭdirojn kaj krizojn. La trajtoj de la epoko kaj liaj apartaj spertoj multe influis liajn penson, karakteron kaj poezian stilon.

Lia karaktero estis liberala kaj senĝena. Li delonge havis idealon bone servi al sia patrujo kaj feliĉigi la popolon. La potenco de la patrujo multe lin energiigis. Tamen, kiam lia idealo disreviĝis, li dronis en malĝojo, senfina indigno kaj montris fortan ribelemon kontraŭ la realo. Tio formis la romantikan tonikon en liaj poemoj. Li Baj tre amis drinkadon, multaj liaj eminentaj poemoj estis unuspire verkitaj post lia ebriiĝo. Tial estas diro, ke pli da drinkado por Li Baj, pli da poemoj el sub liaj penikoj. Lia drinkemo estis parto de lia ekstravaganca karaktero kaj ankaŭ lia propra maniero por fordrinki la ĉagrenon kaj indignon. Li ofte aplikis en siaj poemoj abundajn imagojn, buntajn mitojn kaj legendojn, kuraĝajn kaj konvenajn komparojn kaj hiperbolon por esprimi sian fortan emocion, tiel ke liaj poemoj spiras majestecon. Unuvorte, estas harmonie kombinitaj

lia karaktero, la romantikismo kaj romantikaj esprimmanieroj en liaj poemoj.

Lia penso estis tre kompleksa. Li lasis al la posteuloj pli ol 900 poemojn pri diversaj temoj. En lia penso estis kaj pozitivaj kaj negativaj faktoroj kiaj evito de la realo kaj strebo al feiĝo. Sed lia penso ĉefe estis pozitiva, tio koncentre prezentigis en lia arda strebado al la politika idealo feliĉigi la popolon kaj servi al la patrolando, kaj al la individueca liberiĝo. Tiu politika idealo montriĝas en multaj liaj poemoj. Li plurfoje komparis sin kun *peng**:

*“Kiam peng flugas supren per la vento,
Ĝi sturmas rekte al la firmamento.”*

Revante

*“Kiam la ŝanco montri la talenton venos,
Al la celita loko mi ja rekte velos.”*

*“Aspiras ni fervore fari bravan flugon
al la ĉielo blua por preni la lunon.”*

La versoj vidigas lian bravan idealon. Li ofte

Li Baj



esprimis en siaj poemoj sinceran admiron al eminentaj personoj en la historio kaj per tio ankaŭ sian patriotisman penson.

En 742, rekomendite de sia amiko, Li Baj venis al la ĉefurbo, alvokita de la imperiestro Ŝjūanzong. Antaŭ la forlaso de la hejmo li verkis poemon. Jen du versoj el ĝi:

*"Forlasas mi la hejmon kun kapleva rido,
Kaj mi ne povus resti ĉiam kamparano!"*

Ili elverŝis plene la ĝojon de la poeto. En la ĉefurbo lia talento estis admirata de la imperiestro Ŝjūanzong. Laŭ onidiro, kiam la imperiestro unuafoje akceptis Li Baj, li propramane preparis por Li Baj bulĵonon. Tamen, la tiama Ŝjūanzong ne plu estis la sagaca imperiestro kiel en sia juneco, kiam li ĉiamaniere klopodis por prosperigi la landon. Li fariĝis nebulkapa, donis la ŝtatajn aferojn al flatemaj korteganoj kaj mem ĝuis diboĉan vivon. Tial en la ĉefurbo Li Baj estis nur poeto dungita de la imperiestro por beligi la socion kaj palacan vivon. Li Baj baldaŭ konsciis, ke lia idealo ne realiĝos. Ankaŭ la imperiestro trovis, ke Li Baj ne estas obeema intelektulo, kaj traktis lin apatie. Kaj plie, lia fiera konduto antaŭ privilegiuloj kaŭzis multajn kalumniojn, li ĉiam pli forte sentis, ke li ne povas adaptiĝi al la palaca vivo, kaj fine forlasis la ĉefurbon kaj refoje komencis vagan vivon.

Li Baj vivis tri jarojn en la ĉefurbo, propraokule vidis la putran vivon de la feŭda regantaro kaj la obskuran politikon. De tiam li verkis poemojn saturitajn per indigno kaj atakantajn la aktualaĵojn. Ili montras la neflekseblecon de Li Baj kaj ankaŭ faris senindulgan malkaŝon al la regantoj:

*"Oni aĉetas kanton, ridon per juveloj,
sed la talentulojn nutras per furaĝo."*

En la longa poemo "Respondo al Ŭang Ŝier", li kun abomeno kaj malestimo mokis korteganojn flatemajn al la imperiestro per kokobatalo kaj generalojn strebantajn al la agresiva milito, kaj esprimis sian indignon pri la devigita forlaso de la kortego kaŭze de kalumnioj. Li Baj iris malfacile sur malglata vojo de la vivo, lin forte afliktis lia elreviĝo el la idealo. En la poemo "Malfacila Vojaĝo" li kriis laŭte:

*"Voji malfacile,
Iri malfacile!
Da kruciĝoj multe,
Kien voji ĝuste?"*


En la poemo "Adiaŭo al Onklo Li ĉe Ŝjūanĝou" li skribis:

*"Glavhake mi haltigas fluon — plus ĝia kuro.
Per vin' mildigas mi ĉagrenon — kreskas
malplezuro.*

*Se mi ne povas realigi mian idealon,
Boatos mi kun lozaj haroj en migradveturo."*

Kvazaŭ por li restis nur sola vojo — vagi per ŝipeto.

Li Baj pasigis plejparton de sia vivo en vojaĝo. Li amis sian patrolandon kaj la naturon, kaj verkis multajn poemojn pri famaj montoj kaj riveroj. En ili estas plene esprimita lia karaktero ami liberon kaj aspiri al emancipiĝo. Sub lia peniko la montoj estis majestaj, riveroj torentaj, kiuj vidigis la karakteron de la poeto libere agi kiel ĉiela ĉevalo en la empireo. Tiu karaktero ofte gvidis la poeton al iluzia ideala mondo. En sia brila poemo "Vizito al Tjanmu en Songo" la poeto bildigis buntan kaj misteran mondon, siajn diversajn travivaĵojn kaj strebojn en



Skribaĵo de Li Baj

la spirito per libera kaj gaja priskribo. Lia aflikta animo en la reala vivo estis plene liberigita de aflikto en la sonĝo. Je la komenco la poemo prezentas mirinde majestajn pejzaĝojn de Tjanmu-monto, poste la sonĝitajn pejzaĝojn kaj pli poste la fean landon: De la kvietaj, bela luno en lago al la rava kaj superba suno kaj maro, de zigzaga kaj mistera vojo al la teruraj profundaj arbaroj kaj tremigaj montsuproj, al la bunta fea lando, liaj iluzioj fariĝis ĉiam pli strangaj kaj ĉiam pli efektivaj. Kiam la poeto vekiĝis el la sonĝo kaj vidis la realon, plifortiĝis liaj indigno kaj antagonismo. Li laŭte kriis:

*"Kiel mi povus humiliĝe servi potenculojn,
Neniigante al la koro miajn vivplezurojn!"*

Tio sendube estas natura speguliĝo de lia ribela karaktero malrespekti privilegiulojn.

Ankaŭ la pejzaĝaj poemoj de Li Baj spiras liberalan, grandiozan, gracion kaj freŝan karakterojn. Multaj liaj poemoj konsistas nur el kelkaj versoj, sed bone prezentas la naturan grandiozecon. Tion ekzemplas la poemo "Rigardo al la Akvofalo de Luŝan-monto":

*"Ĉe Ŝjanglu**en sunlumo naskiĝas violfumo,
Jen fore akvofalo pendants de l' montmuro.
Descendon trimil-futan per unu salt' ĝi faras,
Ĉu l' Laktovojo staras en sia bril' kaj puro?"*

Simila priskribo troviĝas ankaŭ en liaj poemoj pri la Flava Rivero. Ekz.,

*"L' akvo de l' Flava River' venas de l' ĉielo,
Kaj ĝi torentas al la maro sen reveno."
"Kiel majeste alta kruta Hŭaŝan-monto!
Flava Rivero venas de la horizonto."
"Kuras impete, muĝe, tondre de l' ĉielo
Al l' Orienta Maro Flava la Rivero."*

Li Baj alte taksis amikecon. Li kaj la samtempa granda realisma poeto Du Fu estis bonaj amikoj. Li verkis multajn adiaŭajn poemojn kun sincera sento. Ekz.,

*"Mia amik' forlasis Pavilonon Flava Gruo,
Por Jangĝou en monato tria, pompa florsezon'.
Jen la soleca velo dronis jam en fora bluo,
Nur la rivero fluas ĉiam sur la ĉiel'fon'."*

kaj

*"Li Baj ekveturos per ŝipo nun,
Subite aŭdiĝas kanto borda,
Taŭhŭa-lago estas profundega,
Malpli ol l' amikeco de Ŭang Lun."*

Ĉiuj tiuj versaĵoj estas ĉiam ŝatataj de legantoj.

La poemoj de Li Baj estas plenaj de elmontriĝemo. Liaj sentoj estas ofte nehaltigeble elŝprucantaj. Ekz., liaj jenaj versoj havas fortan subjektivan koloron:

*"La vojo larĝas kiel la ĉielo blua,
Ja mi ne povas iri elen unusola."
"Nepre utilos mia talent' naturdotita,*

Ja denove alvenos la oro prodigita."

*"Malkvietiĝas ja mia koro,
Sekvas l' amikon al la ĉefurbo."*

*"Ora stelo min dolĉe alparolas,
Por mi l' ĉielan pordon apertas."*

Kiam la ordinaraĵaj vortoj kaj realaj objektoj ne sufiĉis al la poeto por esprimi lian impetan senton, li do kuraĝe sin turnis al hiperbolo, mitoj kaj diversaj strangaj, belaj kaj mirigaj iluzioj. Tiu romantika verkomaniero ebligis al Li Baj la romantikisman spiriton plene esprimi, tiel ke liaj poemoj atingis la kulminon de romantikisma arto en la historio de la ĉina klasika poezio. Interalie "La Malfacileco de la Vojo al Ŝu" estas la plej elstara. Ĝi estas longa poemo verkita tute laŭ iluzioj kaj mitoj, kaj priskribas animskuajn krutaĵojn. Ĝia verso "La vojo al Ŝu estas pli peniga ol la vojo alĉiela!" ripetiĝas trifoje, kio donas fortegan impreson al la legantoj pri la peniga vojo al Ŝu.

*"En akva klaro kreskas lotusfloro,
Sen ajn afekto kaj kun nenia poluro."*

estas la lingva trajto de la poemoj de Li Baj. Li multe lernis de la popolkantoj *jŭefu*. La lingvo en liaj poemoj estis vigla, natura, gracia kaj klara. Ekz.,

*"Ne konante l' lunon en infanaĝo,
Mi do nomis ĝin blankjada plado."*

*"Antaŭ lito brila luno floras,
Super tero kvazaŭ prujn' koloras.
Kapolev': la lunon mi rigardas,
Kapoklin': nasklokon mi memoras."*

La versoj estas tre similaj al la popolkantoj *jŭefu* en lingvaĵoj.

En 755 eksplodis la ribelo de la lokaj militaristoj An Luŝan kaj Ŝi Siming, kiu daŭris ok jarojn. Kun aspiro subigi la ribelon kaj akiri meritojn, Li Baj funkciis kiel konsilisto en la stabo de Princo Li Lin, la 16-a filo de la imperiestro Sĵuanzong. Surtroniĝinte, Li Heng (pliaĝa frato de Li Lin) dubis, ke Li Lin deziras uzurpi la tronon, kaj sendis armeon mortigi Li Lin. Ankaŭ Li Baj estis enkarcerigita pro tio kaj ekzilita. Survoje al la ekzilejo li estis amnestiita. Lia fama poemo "Matene mi forlasis Bajdi" ja estis verkita en tiu tempo. En la aĝo de 61 jaroj Li Baj refoje partoprenis en armeo por subigi ribelon, sed malsaniĝis survoje kaj mortis en la hejmo de sia onklo Li Jangbing en la sekvanta jaro.

La poemoj de Li Baj ludis gravegan rolon en la evoluo de romantika poezio de Ĉinio kaj multe influis la posteulojn. En la pasintaj pli ol mil jaroj liaj poemoj estis ĉiam ŝatataj de la popolo kaj fariĝis unu el la plej brilaj perloj en la ĉina literaturo. ■

* Peng estas la plej granda birdo en ĉina legendo.

** Ŝjanglu, kiu signifas "incensujon", estas nomo de montpinto.

ELEKTITAJ POEMOJ DE LI BAJ

Vizito al Tjanmu en sonĝo

— Kanto adiaŭa

*La fea Jingĝou¹ en la nebul-mar
Neviziteblas laŭ aserto inter maristaro.
Sed monto Tjanmu², kiel priparolas
Loĝantoj de Jŭe³, jen kaj jen sin montras en nubaro.*

*La monto Tjanmu ĉielskrapa ja en evidento
Superas al la Kvin Montegoj⁴ kaj la mont' Ĉiceng-o⁵.
Kaj l' monto Tjantaĵ⁶ kun alteco kvarcent-
okdek-mil-futa*

Nur ŝajnas nano kliniĝanta en sudoriento.

*Pro intereso falis mi en sonĝon pri la loko,
Transflugas la Spegulan Lagon⁷ jam en luna nokto.
La luno pentras min en laga helo,
Kaj akompanas al Ŝanŝi-rivero⁸,
Kie ankoraŭ l' tranoktejo de sinjor' Ŝje⁹ restas,
Ondetas verda fluo kaj simioj triste blekas.
Mi portas surpiede Ŝje-ajn ŝuojn⁹,
Grimpadas laŭ montvoj' en ĉiel-blulon.
Mi vidas supre l' sunon kaj la maron
Kaj aŭdas la ĉielan kok-fanfaron¹⁰.*

*Tra dek mil rokoj de la monto kurba voj' serpentas,
Dum aprezaĵ' de la belajoj jen la sun' descendas.
Eĥadas ursajn-drakajn muĝojn rokoj kaj la fontoj,
Tintremas la arbaroj densaj kaj la ĉen' de montoj.
El glima akv' vaporo supren kuras
Kaj nigraj nuboj pluvon jen aŭguras.
Fulmforko pikas, tondro bruas,
Kaj rokaltajon fenddetruas.*

*Je krako, en la roka muro,
Aperas grota aperturo.
Ĝi estas profundega kavo kvazaŭ fos' sen fundo,
Kun Oro- kaj Arĝent-Terasoj¹¹ sub la sun' kaj luno.*

*En belaj vestoj ĉielarkaj, per vent-veturilo
Alvenas el nubaro feoj are en jubilo.
Muzikas tigroj per liut', feniksoj ĉarojn tiras,
La feoj svarmas en amaso kiel se foiras.
Subite surpriziĝis l' animo en admiro,
Vekiĝas kaj leviĝas mi mire kun suspiro.
Mi vidas nur la maton kaj mian kapkusenon,
Sed ne plu la ĉielan nebulan feo-scenon.*

*Ja same iras ankaŭ nia monda vivplezuro,
De antikveco ĉio pasas kiel fluo-kuro.
Mi devas adiaŭi vin, do kiam vin revidos?
Mi lasos blankan cervon paŝti sin sur verda monto,
Ke en estonto famajn montojn per ĝi mi vizitos.
Kiel mi povus humiliĝe servi potenculojn,
Neniigante al la koro miajn vivplezurojn!*

Matene mi forlasis Bajdi

*Matene mi forlasis Bajdi¹² en nubar' kolora,
Samtage venis mi al Ĝjangling¹³ je mil lioj fora.
Senĉese la simioj blekas triste sur la bordoj,
Mil montojn la boat' trapasis kiel sag' ondbora.*

“Kanto pri Duhuo Ding”

*De Junjang¹⁴ supren-ŝiptirad' — mizero;
Surborde komercistoj en prospero.
Bubaloj tim-spiregas eĉ pro l' luno¹⁵,
La ŝiptiristoj penas en sufero ...
La akvo kota estas netrinkebla,
La kruĉoj duonplenas je feĉ-tero.
Je aŭd' de “Kanto pri Duhuo Ding”¹⁶, ho,
Ekfalas trista pluvo de larmeroj.
Dehakas ŝtonojn jen milhoma forto,
Sed malfacilas porti al la bordo.
Rigardu la ŝtonpecojn diversformajn ...
Vere plorindas tia homa sorto!*

Kantoj pri lim-gardistoj

La unua


*En la monato kvina¹⁷ ne florĉarmon
Al Tjanŝan¹⁸ portas neĝ', sed nur malvarmon.
Mi aŭdas flut-arion “Salikvergoj”¹⁹,
Sed mi ne vidas verdan printemp-garnon.
Batal', matene, kun tamburmuziko,
Kaj nokte, en la selo dorm-praktiko.
Mi volas preni l' glavon ĉe l' talio,
Por senkapig' de Loŭlan-malamiko²⁰.*

Elĉinigi LAŬLUM

1. Jingĝou — fea monto en maro laŭ ĉina legendo.
2. Tjanmu — monto en Ĝeĝjang-provinco.

3. Jüe — antikva ĉina regiono kovranta proksimume la nunan Ĝeĝjang-provincon.
4. La Kvin Montegoj — komuna nomo de la kvin famaj ĉinaj montoj Tajŝan en la oriento, Hũaŝan en la okcidento, Hengŝan en la nordo (en Ŝanŝji-provinco), Hengŝan en la sudo (en Hunan-provinco) kaj Songŝan en la mezo.
5. Ĉiceng — monto en Ĝeĝjang-provinco.
6. Tjantaj situas sudoriente de la monto Tjanmu en Ĝeĝjang-provinco.
7. La Spegula Lago troviĝas en Ĝeĝjang-provinco.
8. Ŝanŝji-rivero estas branĉo de Caŭ'e-rivero en Ĝeĝjang-provinco.
9. Sinjoro Ŝje Lingjun (385-433 p.K.) estis poeto fama pro siaj versaĵoj pri pejzaĝoj. Li kreis por si specialajn ŝuojn oportunajn por irado sur montoj.
10. Ĉiela kok-fanfaro — laŭ ĉina mito, sur Taŭdu-monto en la sudoriento estas arbeĝo kun branĉoj etenditaj 3 000 liojn malproksimen. Sur tiu arbeĝo troviĝas koko. Kiam la suno leviĝas kaj heligas la arbegon, la koko sur ĝi ekkrias, sekve de kio ankaŭ ĉiuj aliaj kokoj en la mondo ekkrias.
11. Oro- kaj Arĝent-Terasoj estas feaj loĝejoj el oro kaj arĝento.
12. Bajdi estas antikva urbo sur monteto ĉe la okcidenta fino de la famaj Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero.
13. Ĝjangling estas urbo en Hubej-provinco.
14. Junjang estas antikva loko en la nuna Ĝjangsu-provinco.
15. La bubaloj prenis la lunon kiel la sunon.
16. Duhu-o — titolo de lim-gardanta generalo en Han- kaj Tang-dinastioj.
17. La monato kvina laŭ la ĉina luna kalendaro kovras proksimume la tempon de junio.
18. Tjanŝan — montaro en la regiono Ŝingĝiang en nordokcidenta Ĉinio.
19. "Salikvergoj" estas titolo de fluta ario pri printempa alveno.
20. Loulan estis antikva regno en nordokcidenta Ĉinio.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Kanton 2. Janĝji 3. Ĉangĉun 4. Hubej-provinco 5. Ĝjiŝoŭ 6. Ŝiĝjaĝŭang 7. Ŝanhajo 8. Jujaŭ-gubernio 9. Ĉuŝjong 10. Ĝinŝji-gubernio

Pordo malfermita al la monda akrobatiko

Estis vespero de la 26-a de oktobro de 1987. Brile luminiĝis la sporthalo de la urbo Ŝiĝjaĝuāng de Hebej-provinco. Malfermiĝis antikveca kaj profunda pordego, kaj eliris kvar leonoj sur du grandaj pilkoj unu super la alia. Tuj eksplodis surdiga aplaŭdado ĉe la spektantaro. Jen inaŭguro de la Unua Uĉjaŭ-a Internacia Akrobata Festivalo de Ĉinio.

Ĉina akrobatiko estas unu el la plej antikvaj ludartoj en la mondo. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj jam aperis akrobatiko en Ĉinio. Sed antaŭe akrobata ludo estis nur rimedo por vivteno kaj stagnis dum longa tempo, por ne paroli pri prezentado sur alilandaj scenejoj.

En la lastaj ĉirkaŭ 30 jaroj, iom post iom malfermiĝis la longe fermita pordo de la ĉina akrobatiko. Dekoj da akrobataj trupoj de Ĉinio prezentis sinsekve en pli ol 100 landoj kaj regionoj,

kio starigis amikan ponton inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Kaj kolegoj de iuj landoj esprimis la deziron, ke ili povu montri sian arton en Ĉinio, precipe en Uĉjaŭ, la hejmloko de la ĉina akrobatiko, por pli profunde koni la ĉinan akrobatikon, kiu radias originalan lumon sur la internacia akrobata scenejo. La festivalo pluapaŝe malfermis al ili la pordon.

En la festivalo alestis akrobataj trupoj kaj personoj de Sovetunio, Koreio, Demokratia Germanio, Aŭstralio, Francio kaj Meksikio, kaj 15 ĉinaj akrobataj trupoj. La festivalo konsistis el 7 prezentadoj kun 30 programeroj.

Uĉjaŭ, kiu distancas de Ŝiĝjaĝuāng 173 kilometrojn, estas hejmloko kaj lulilo de la ĉina akrobatiko. De post 1949, la loko kulturis por la ŝtato pli ol 1 600

bonajn akrobatojn kaj faris grandan kontribuon por la prosperiĝo de la ĉina akrobatiko.


La festivalo donis bonan ŝancon por vasta kontakto de diverslandaj eminentaj akrobatoj. Plejparto de la 30 programeroj enkorpiĝis kreivecon, altigon de malfacileco kaj nacian karakterizaĵon. Tio spegulis la evoluatan tendencon de la monda akrobatiko.

Multaj programeroj de la festivalo karakteriziĝas per kreiveco. La sceneja dekoro de la ĉina akrobatiko estis postĝinta dum longa tempo, kio malheligis la artismon de akrobatiko. Sed en la inaŭguro de la festivalo, la "Leondanco" de la akrobata trupo de Hebej-provinco montris freŝan scenejan dekoron, precipe la pordo sur la dekstra flanko de la scenejo faris la tutan prezentadon dekoracia kaj simbola.

"Ludo de Pudeloj" de la sovetunia akrobata trupo montris kreivon. En la lastaj jaroj la dresitaj pudeloj pli kaj pli multiĝis. En la festivalo sume 22 pudeloj ludis sur la scenejo. Ili lerte kunlaboris kun la dresistino M. F. Papazova.

La festivalo karakteriziĝas ankaŭ per programeroj kun kurioza enhavo. La "Fluga Trapezo" de la Ŝenjang-a Akrobata Trupo estis nova programero, kuniganta akrobataĵon "Ledaj Rimenoj" kaj sportludon "rekado". Ĝoŭ Liĉing kaj aliaj kvar akrobatoj staris sur reko dek metrojn super la planko kaj faris diversajn malfacilajn movojn kia

La Hejlongĝjang-a Akrobata Trupo en prezentado





Oni premias akrobatojn el Sovetunio, Koreio, la Germana Demokratia Respubliko, Francio, Meksikio kaj Aŭstralio.

“rotacio”. La animskuaj movoj, la buntaj belfasonaj vestoj de la akrobatoj kaj la iluminado impresis kvazaŭ falsteloj, fulmo kaj flugantaj hirundoj en lazura ĉielo.


Strebi al malfacileco en la ludo karakterizas la novan tendencon en la evoluado de la akrobatiko en la lastaj jaroj. La 7 knabegoj de la Hejlongĝjang-a Akrobata Trupo prezentintaj “Saltadon tra

Ringoj” estas la kvara generacio de saltado tra ringo de la trupo. Surbaze de la origina malfacila tekniko, ili kreis pli eminentajn ludojn “Duflanca Saltado tra Kvin Ringoj” kaj “Kvin Transkapiĝoj Posten”. En la festivalo la transsaltita alto de kvin ringoj metitaj unu sur alia estis 2.42 metroj.

La Sovetunia Akrobata Trupo en prezentado



La apero de la malfacilaj akrobataĵoj rezultis de tio, ke junaj akrobatoj startis ĉe malfacilaj teknikoj. Dekjara aŭstralia knabino Cassandrh Goode ludis “Ŝnuran Gimnastikon” en aero pli ol dek metrojn super la planko. La infanoj-akrobatoj de la akrobatika hejmloko Uĉjaŭ mez-nombre aĝas 11 jarojn, sed ili jam povas ludi tre malfacilan “Ekvilibranta Pozadon de Sep Homoj sur Tri Balanciĝantaj Tabuloj”. La eminentaj junuloj vekis atenton de la akrobataj veteranoj ĉeestantaj la festivalon.



Franca akrobato en prezentado

En la ĉifoj interfluo de la ĉina kaj alilanda akrobatiko, plene montriĝis ankaŭ la kunfandiĝo de akrobatiko kun respektiva nacia stilo. "Granda Baskulo" ludita de la Pjongjanga Akrobata Trupo de

Koreio estas tradicia popola arto. En la lastaj jaroj la koreaj akrobatoj asimilis la teknikon de okcidenta baskula saltado kaj knedis ĝin en sian nacian stilon kunfandante sentimecon kaj

saĝon. Per multaj malfacilegaj transkapiĝoj en aero, ili formis sian propran stilon. Tiu programero estis premiita per ora medalo en la Oka Monda Akrobata Ĉampioneca Konkurso en Londono, 1983.

"Ĵonglado" de la Ŝingĵang-a Ujgura Akrobata Trupo estis ekzemplo por kunfandiĝo de akrobata arto kun nacia stilo. La ĵonglado prenis uĝur-naciecajn muzikilojn kiel rekvizitojn. Krome, la akrobatoj plene montris la talenton de uĝuroj en kantado kaj dancado kaj bone kunigis ĝin kun akrobatiko.

La festivalo fermiĝis vespere de la 1-a de novembro. La direktoroj de la festivalo, inspiritaj de la plena sukceso de la festivalo, decidis okazigi festivalon en ĉiu dua jaro. Tio signifas, ke pli da ŝancoj de interfluo kreiĝos por la ĉinaj kaj fremdlandaj akrobatoj. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceteton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 23-j. fraŭlo dez. kor. kun geesperantistoj tm. pri literaturo, poemo, leĝo kaj Esperanto. Adr.: Li Ming, Gaoqiao Shizhao Zhaodong, Xuyixian, Jiangsu, Ĉinio.

* 24-j. fraŭlo dez. kor. kun geesperantistoj tm. pri literaturo, Esperanto, poemo kaj interŝanĝi spertojn en lernado. Adr.: Wang Lunde, Hairuxiang Hairudadui Tangtoudui, Chaohu Shi, Anhui, Ĉinio.

* S-ro Lke serĉas geamikojn kaj filatelistojn el Francio, FR Germanio, Britio, Usono kaj Kanado. Adr.: P.O.

Box 1145, C-100007 Peking, Ĉinio.

* 29-j. fraŭlo dez. kor. kun geamikoj tm en Esperanto pri ĉiuj temoj kaj kolektas pm. pk. kaj aliajn filatelajojn pri Esperanto. Adr.: Qiu Jinping, Jianzhu Gongcheng Gongsi Jiancaichang, Gezhouba, Yichang, Hubei, Ĉinio.

* Mi dez. kor. kun gesamideanoj tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi b.k. Adreso: Lü Chaidong, Qinye Lu 70, Changzhou, Jiangsu, Ĉinio.

* Mano Tan volas interŝanĝi E-librojn kaj poŝmarkojn tutmonde. Adr.: Mano Tan, Zhongxiangxian Zhiyegaozhong, Hubei, Ĉinio.

* 18-j. Szolga Istvan vol. kor. kun kelkaj ĉinaj junaj geesperantistoj pri sporto, vojaĝo, fiŝhokado kaj sciencaj fikcioj. Adr.: Budapest, Jablonka ut 80, 1037 Hungario.

* 18-j. komencanto Galor Gaspar vol. kor. kun amikoj el ĉiuj landoj por altigi sian lingvonivelon de Esperanto. 1042 Budapest, Aradi u. 28, Hungario.

* 17-j. lernantino dez. kor. kun ĉinaj gejunuloj pri ĉia temo. Adr.: Emese Boda, Telekgerendas, Dozsa Gyorgy 4, 19, 5675 Hungario.

* Gelernantoj kaj komencantoj de Esperanto fondis sian E-grupon "Paco kaj Frateco" kaj deziras korespondi kun alilandaj geesperantistoj pri diversaj temoj Esperante. Adr.: S-ro Ubirajara Thadeu dos Santos, Rua Ismenia, 35, Bento Ribeiro, 21331-Rio de Janeiro-RJ, Brazilo.

* Mi vol. kor. tutmonde. Adr.: Ata Mohammad (27-j.), 161-Pak Gate, Multan-7.H, Pakistan.

* Margarete Bettmann dez. kor. kun esperantistoj. Adr.: Heilpraktikerin, Pitzlergasse 6, D-5160 Düren 4, FR Germanio.

* 22-j. laboristo kaj komencanto de Esperanto dez. kor. tutmonde. Adr.: Szakacs Zsolt, Cluj-Napoca R-3400, P.K. 462, Rumanio.

* Universitata E-Klubo dez. kor. kun samideanoj tutmonde. Adr.:

Edzoj loĝantaj en edzinaj hejmoj

Ke la edziniĝintoj devas loĝi en la hejmo de sia edzo, tio estas malnova socia tradicio de Ĉinio. Sed nun tiu tradicio estas skuata. Pli kaj pli multaj novedzoj en la ĉina kamparo ekloĝis en la hejmo de la edzino.

Pli ol 50 duetaĝaj domoj staras ekster la vilaĝo Ŝinglongĝaj en la antaŭurbo de Lūojang, Henan-provinco. Tiuj domoj apartenas al la novedzinoj, kiuj venigis la edzon en sian hejmon. La vilaĝanoj nomis tiujn domojn poredza vilaĝo.

Ŝinglongĝaj estas relative riĉa vilaĝo en la loko kaj posedas sep

prilaborejojn, du bredejojn de kokoj kaj kunikloj, restoracion kaj barbirejon. En la lastaj 4-5 jaroj la jara meznombra enspezo por ĉiu vilaĝano estis 500-1 000 jŭanoj. La infanoj en la vilaĝo estas senpage vartataj de la vilaĝa infanĝardeno. La kolektivo subvencias la vilaĝanojn en la vizitado de lernejo, kuraco, konsumado de kranakvo kaj elektro. Jen kial la knabinoj de la vilaĝo ne volas forlasi la lokon.

Antaŭ ok jaroj, iuj kuraĝaj knabinoj decidis starigi sian hejmon en la vilaĝo. Pro tio ili estis turmentitaj de publika opinio kaj havis kverelon kun siaj familianoj,

iuj edziniĝis aliloken, sed la ceteraj persistis ĝis la fino kaj havis sian hejmon en la vilaĝo.

En 1984 ĉirkaŭ 50 junulinoj de la vilaĝo venigis sian edzon en la vilaĝon. Tiuj geedzoj frontis, krom pikaj onidiroj, la ĉefan malfacilon pri loĝado. Iuj familioj kun multaj membroj ne havas vastan loĝejon, kaj la enloĝiĝo de nova edzo faris la staton pli maloportuna. Iuj familioj havas vastan loĝejon, sed ili ne ŝatis ke la novedzo loĝas ĉe ili, kaj la vivo fariĝis malakorda. En tia stato la progresemaĵoj de la vilaĝo decidis, ke la vilaĝo difinu parcelon kaj konstruu por ili

Pravni-Fakultet, YU-78000 Banjaluka, Jugoslavio.

* Ladislava Tlachova dez. kor. kun amikoj tutmonde. Adr.: Probulo 47, 39807 Orlik nad/Vltavou, Ĉeĥoslovakio.

* 39-j. s-ino Cvetanka V. Lilova dez. kor. kun ĉinoj pri diversaj temoj. Adr.: 2161 Pravec, bl. 18 vh. A ap. 2, Bulgario.

* 26-j. studento pri fremdaj lingvoj dez. kor. kun tm. en Esperanto pri E-movado, muziko, filmarto, politiko, bildkartoj, kalendaretoj. Adr.: S-ro Valerij Malihin, Vuzovskij 16-83, 660025 Krasnojarsk, USSR. Ankaŭ mia E-klubo, USSR 660075 Krasnojarsk-75, p.k. 2420 dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj.

* 51-j. akupunkturo-kuracisto dez. kor. kun ĉinoj. Mauricio Monken Gomes, Florêncio de Abreu 182-101 Jardim Amalia, Volta Redonda, RJ, Brasil.

* 33-j. grundplibonigistino dez. kor. kun ĉiuj. Adr.: Alicja Kors-

zouska, 20-857 Lublin, Harnasie 19/64, Polso.

* Andrzej Grabski kaj Darivsz Olewinski dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj, precipe kun junaj samideanoj. Adr.: Skr. Pocz. 26, PL-48-300 NYSA, Pollando.

* Nova kanada E-Klubo "AMI-KE" serĉas gekorespondantojn tutmonde. Skribu al: Amika Mez-Insula Klubo de Esperanto, Site 66, C9, R.R. 2, Lantzville, B.C. Vor 2110 Kanado.

* Pri diverslingva korespondado, kulturaj interŝanĝoj, junularaj tendaroj en Turkio kontaktu nur (iks) IKS Genctürk CAD. Mahfil SOK. 20/4, Laleli 34 470 Istanbul.

* Wesley Arnold (studento) dez. kor. kun geamikoj tm. Adr.: 3972 Dallas, Warren Michigan 48091, Usono.

* Anoj de E-Klubo "Laro" (16-50-jaraj) dez. kor. ĉu kolektive aŭ individue kun ĉiuj pacamaj samideanoj. Ĉiu ricevos certan respondon. Skribu al: Esperanto-

Klubo "Laro", Poŝtkesto 913, 354000 Soĉi-centro, Sovetunio.

* Aŭtoro kun mondĉivita spirito dez. kor. kun novaj legantoj tm. Parzival, La Afliĝluanto de BAHA, Poŝtfako 1010, CH-2501 Bielo, Svislando.

* S-ro Alphonse Diatta, prezidanto de la Dakara E-Klubo dez. kor. kun ĉinaj, japanaj kaj alilandaj esp-istoj kaj ŝtariĝi interrilaton inter ili kaj la Dakara E-Klubo. Adr.: Parcelle No 16, Fass Delorme, Dakar, Senegalio (Senegal).

* Ni deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. 1. Erika Elchlingen, Str. Brasorului Nr. 1 Bl. 53, sc. A Ap 7, Sgintu Sheaghe, Jud. Covasna Cod 4000, Rumanio; 2. Emilia Veress, Str. Scolu Nr. 104, 4033 Bodoc, Jud. Covasna, Rumanio.

* 37-jara geografo dez. kor. tm. (precipe kun geografoj kaj geologoj) en Esperanto, franca, hispana kaj angla lingvoj. S-ro Ioan Haraga, Micro 3, Bloc A3, Ap. 38, R-5100 Buzău, Rumanio.

novan loĝejon kaj la noveloj pagu. Nun ĉ. 100 paroj da noveloj ekloĝis en tiuj novaj domoj.

Dum longa periodo de la feŭdisma socio de Ĉinio, profunde enradikiĝis la feŭdisma ideologio pri la mastreco de edzo super edzino kaj la absoluta povo de edzo. Ĉiam la viroj prenis edzinon al si en sian hejmon kaj mastris en la familio. Se viro loĝis en la hejmo de edzino, tiu estis rigardata sentaŭgulo. Tia viro estis malrespektata en la socio, tial junuloj kutime ne volis loĝi ĉe la edzina hejmo post la edziĝo, escepte se ili troviĝis en granda malfacilo.

En la lastaj 40 jaroj Ĉinio senĉese klopodis ŝanĝi la malnovajn morojn kaj malnovan ideologion kaj disvastigi novajn konceptojn. Tamen pro la longtempa ekzisto de la feŭdisma ideologia sistemo pri geedzeco kaj familio, estas neeble forigi ĝin en mallonga tempo. Iuj malnovaj konceptoj ankoraŭ havas fortan influon en la ĉina socio, precipe en la kamparo. Kompreneble, neniam ĉesis la batalo kontraŭ tiuj restaĵoj de la feŭdismaj konceptoj.

En la 50-aj kaj 60-aj jaroj

junuloj de la ĉina kamparo multe klopodis por sia feliĉo en geedzeco, kaj multaj el ili realigis sian deziron pri geedzeco, kaj senĉese okazis en diversaj lokoj de la lando, ke noveloj loĝas en la hejmo de edzino.

Junuloj plenkreskintaj en la lasta jardeko kaj atingintaj la edziĝan aĝon estis pli multe edukitaj kompare kun la junuloj de la 50-aj kaj 60-aj jaroj, kaj akceptis pli da novaj pensoj kaj novaj konceptoj, kaj pli ardiĝis ilia deziro strebi al la persona feliĉo.

En iu vilaĝo de Ŝanhaja antaŭurbo, 72 junuloj, kvarono de la edziĝintaj en 1985 kaj 1986, loĝas en la hejmo de sia edzino. Multaj fraŭloj de la vilaĝo opiniis, ke estas sendiference ĉu loĝi en sia propra hejmo aŭ en la hejmo de sia edzino; tio decidiĝos laŭ la oportuneco por la vivo post edziĝo.

Enketo pri iu vilaĝo de Pekina antaŭurbo montris, ke en 1949, nur 2.9% de la edzoj loĝis en la hejmo de la edzino, sed en la periodo de 1977 ĝis 1982 tiu procento atingis 15%.

Pli kaj pli multiĝis noveloj loĝantaj en la hejmo de la edzino

ĉefe pro la efektiva bezono de la reala vivo, kaj krome estas gravaj kaŭzoj ankaŭ la garantiataj sociaj rajtoj de la virinoj, disvolviĝo de la socia ekonomio kaj progresiĝo de la homa koncepto.

Familioj havantaj nur filinojn deziris preni unu el la bofiloj kiel membron de la familio. Tion pli arde deziras la familioj havantaj nur solfilinojn. Ĉar kaj gepatroj kaj filino ne volas solecan vivon.

En Hoŭjing-vilaĝo de Dingŝjan-gubernio, Hebej-provinco, estas junulino An Ĝjunĝi, solfilino de geedzoj de pli ol 50 jaroj. Antaŭ ol la filino havis fianĉon, la geedzoj estis maltrankvilaj pro la estonta soleca vivo. Poste la filino enamiĝis al samvilaĝano U Ĉjŭanjong, kiu havas tri fratojn. La geamantoj decidis loĝi post geedziĝo en la hejmo de An. Ili plenumis sian promeson, kaj la gepatroj de la junulino An trankviliĝis.

Amo devas esti la vera bazo de geedzeco. Aspiro al vera amo estas grava kialo, ke parto de la kamparaj junuloj loĝas en la hejmo de edzino. Pro la vera amo, eĉ iuj urbaj junuloj volonte loĝis en la hejmo de kampara edzino post edziĝo.

Juna laboristo Tang Ĝuoming de la Tria Laminejo de Tjanĝin estas belaspekta kaj bonkondata. Iun tagon antaŭ tri jaroj li hazarde renkontis knabinon kaj enamiĝis al ŝi. Poste li sciigis, ke ŝi estas kamparanino, sed li ne ŝanceliĝis en sia amo. Antaŭ nelonge ili geedziĝis kaj loĝas en la hejmo de la novelzino.

Loĝado de edzo en la hejmo de edzino estas pli kaj pli vaste akceptata kaj subtenata en la ĉina kamparo, sed la restaĵo de la feŭdisma ideologio formis socian kaj psikan preforton malfacile tute eliminatan por la noveloj. Tial ankoraŭ ekzistas longtempa batalo inter junaj geedzoj kaj la postiĝintaj konceptoj. ■

Ĉen Liŝin (staranta) harmonie vivas kun siaj edzino (dekstre) kaj bogepatroj.



Porti surdorse novedzinon

de JANG ŜIGJE



Portado de novedzino

Nun en la Ĉuŝjong-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Junnan en sudokcidenta Ĉinio ankoraŭ komplete konserviĝas la tradicia moro porti surdorse novedzinon al la hejmo de la novedzo.

Ĉe la geedziĝo de ji-oj, kutime la familio de la edzo sendas bonvenigi la edzinon al sia hejmo. La bonveniga personaro konsistas el svatisto, ludistoj de surnao, la novedzo, du bonaj amikoj de la novedzo. Ili ĉiuj devas piediri la tutan vojon al la hejmo de la novedzino. Trapasante vilaĝojn, ludistoj de surnao devas ludi gajan melodion.

Kiam la bonvenigantoj atingis la hejmon de la novedzino, ili estas invitataj en budon kie ili ripozas trinkante teon unue kaj sukeran akvon poste. Tio signifas amaron unue kaj dolĉon poste en ilia estonta vivo. Poste, frato de la patrino de la novedzino benas la novgeedzojn kaj metas ruĝan

rubandon sur la novedzon. Pli poste la bonvenigantoj ĝuas bankedon akompanate de la familianoj de la novedzino. Dum la bankedo, iu respektata maljunulo de bonhava familio faras tualeton por la novedzino.

Post la bankedo, ludistoj de surnao refoje ludas gajan melodion. Kiam la melodio estas ripetata triafoje, frato de la novedzino portas surdorse la novedzinon eksteren kaj ŝin transdonas al la novedzo. La novgeedzoj eliras akompanate de la bonvenigantoj, kaj ilin sekvas la eskortantoj de la novedzino. Se la vojo estas ebena, la novedzino devas piediri kune kun la aliaj, kiam ili venas al kruta deklivo, valo aŭ loko kun akvo kaj ponto, la amikoj de la novedzo portas surdorse la novedzinon. Dumvoje la junaj bonvenigantoj kaj eskortantoj kantas kanton pri surdorsa porto de novedzino, ludas 3-kordajn banĝojn, surnaojn kaj flutojn.

La virinoj kantas:

*Mi iras nun al via hejmo,
sed al mi baras altaj montoj,
grandaj riveroj kaj deklivoj,
kanaloj kaj pontoj,
kaj mi ne kuraĝas iri pluen.*

La viroj kantas:

*Ne timu la altajn montojn,
nek deklivojn, valojn kaj
pontojn.
Oni vin akompanas en transiro
de la altaj montoj kaj pontoj,
kaj portas surdorse trans la
riveroj.*

La virinoj kantas:

*Mi ne kuraĝas iri al via hejmo,
pro la vojo longa kaj malluma.
Minacas min tigroj kaj lupoj.
Mi ne kuraĝas iri pro la timo.*

La viroj kantas:

*Ne timu, ne timu,
vin protektas dekoj da bonve-
nigantoj kaj eskortantoj.
Trankviliĝu, glimas la steloj
kiel okuloj, lumigas luno kiel*

1988, draka jaro de Ĉinio

— Internacia turisma jaro de Pekino



Karikaturo por la turisma jaro

1988 estas draka jaro de Ĉinio. Pekino varme bonvenigas diverslandajn turistojn al Ĉinio por havi agrablan vojaĝon en la draka jaro.

En Ĉinio troviĝas tradicia kutimo fari kronikon per 12 bestoj. Tiu metodo originis el la pratempa totemismo. Ili estas rato, bovo, tigro, leporo, drako, serpento, ĉevalo, ŝafo, simio, koko, hundo kaj porko. Laŭ tiu sistemo, unu jaro estas simbolata de unu besto kaj la 12 bestoj faras unu ciklon. Drako estas besto en la homa imago. Ĝi havas cervajn kornojn, tigrajn okulojn, leonan

nazon, bovajn orelojn, aglajn ungojn, ĉevalajn haregojn, fiŝajn skvamojn kaj serpentan korpon. En la okuloj de la ĉinoj, drako havas altan lokon. Ĝi estas simbolo de Ĉinio kaj la ĉina nacio kaj ankaŭ estas simbolo de favora aŭspicio laŭ la ĉinaj tradiciaj moroj. Pekino decidis okazigi internacian turisman drakan jaron kaj pere de la favora aŭspicio de draka jaro malfermi pli larĝe la pordon al turistoj de la mondo, por ke pli da personoj vojaĝu al Ĉinio kaj konu ĝin.

La internacia turisma jaro de

Pekino inaŭguriĝis en la 31-a de decembro, 1987. En la inaŭguro la urbestro de Pekino Ĉen Ŝjitong donis honoran ateston al turisto la unua veninta al Pekino en la internacia turisma jaro. Sur la placo ekster la kunvenejo oni prezentis drakan dancon, leonan dancon, taliotamburan dancon, naciajn kantojn kaj dancojn k.a. por bonvenigi la unuan grupon da turistoj en la internacia turisma jaro.

La turismaj amuzadoj en la internacia turisma jaro de Pekino kun drako kiel temo estas tre

*lampo.
Miaj amikoj certe vin portas
sur vojo malfacila.*

La viglaj bonvenigantoj kaj eskortantoj iras kantante kaj dancante dum la tuta vojo ĝis la hejmo de la novedzo.

Kiam la trupo atingis la hejmon de la novedzo, oni anoncas la venon per pafado kaj eksplodigo de petardoj. Post kiam la novedzino estis kondukita en la domon, iu maljunulo de la vilaĝo

de la novedzo deklamas kanzonon por la familio de la novedzo. Poste, la novgeedzoj riverencas al la ĉielo, la tero kaj la gepatroj, unu al alia, kaj tostas unu por la alia, dum la familianoj de la novedzo faras fajron en la budo kaj donas bankedon al la gastoj.

Dum la bankedo oni kantas konkurse. Junuloj ludas kordinstrumentojn kaj erhuojn*, knabinoj blovas arbofoliojn kaj kantas naciajn kantojn. Ĉiuj gaje dancas

ĉirkaŭ la fajro. Tiam, la novgeedzoj estas ĉirkaŭitaj de la dancantoj kaj ĝuas ĝojon kune kun la gastoj. Tio markas la kulminon de la geedziĝa ceremonio. La gaja celebrado daŭras tutan nokton. Gefraŭloj kaptas tiun ŝancon, kantas amkantojn por elekti por si amaton. Post certa tempo iuj el la fraŭlinoj fariĝos novedzinoj dorseportataj de amikoj de novedzo. ■

* Erhuo — speco de kordinstrumento.

interesaj kaj karakteriziĝas per forta nacia gusto. Ekz., drakjara kunveno de glaciaj lanternoj de Longĉingŝja de Janĉing-gubernio en la antaŭurbo de Pekino. Drako estas la temo de la glaciaj skulptaĵoj. Inter ili troviĝas "Drako Feliĉigas la Homaron", "Gaja Draka Jaro", "Ĝardeno en Draka Palaco", "Akvovalo ĉe Draka Lageto" k.a. Dum la Lanterna Festo en marto de 1988 okazos lanterna kunveno en Kultura Palaco de Laboruloj en Pekino. La lanterna festo estas tradicia en Ĉinio. La temo de la draka jaro estas pli evidenta kaj ĝia enhavo estas pli abunda ol tiu de la pasintaj jaroj. Ankaŭ la aliaj grandaj aktivadoj de la draka jaro estas sufiĉe allogaj.

Kajta turniro. La kajta turniro okazis en kvar sinsekvaj jaroj en Ŭejfang de Ĉinio kaj altiris pli kaj pli da ĉinaj kaj alilandaj turistoj. En aprilo de 1988, Pekino kaj Ŭejfang de Ŝandong-provinco samtempe okazigos kajtan turniron kaj invitos en- kaj eksterlandajn ŝatantojn. En Pekino okazos "Internacia Kajta Kunveno". En la kunveno oni faros prezentadon de kajto, ekspozicion de kajtoj kaj kolokvon pri kajto.

Drakboata konkurso. La drakboata konkurso havas longan historion en Ĉinio. Frue en la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), por memorigi patriotan poeton Ĉju Jŭan, ĉiujare oni movas boaton en rivero en la 5-a de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro, en tiu tago Ĉju Jŭan sin dronigis en rivero, samkiel tiujare oni movis boatojn sur la rivero por serĉi lian kadavron. Poste la aktivado iom post iom disvolviĝis en drakboatan remkonkurson. Nun la drakboata konkurso jam fariĝis ŝatata sporta aktivado. En junio de 1988 okazos drakboata konkurso en Pekino. La invitataj sportaj teamoj konkurso en drakboatoj plastikigitaj en koloraj

drakoj. La turistoj ankaŭ povos movi malgrandajn drakboatojn por sin amuzi.

Koncerne drakan dancon ankaŭ ĝi estas tradicia popola amuzaĵo en Ĉinio. En festaj tagoj, en multaj lokoj de Ĉinio oni prezentas drakan dancon. La longa drako ĝenerale estas farota el silkaĵo. La malgrandaj estas ludataj de kelkaj personoj kaj la grandaj — de dekkelkaj aŭ kelkdekaj personoj. La longa drako libere moviĝas supren kaj malsupren, kaj la rigardantoj gaje krias en la takto de la moviĝo de la drako, kio plivigliĝas la feston. En septembro kaj oktobro de 1988, diverslokaj teamoj de draka danco de Ĉinio kolektiĝos en Pekino por prezenti al turistoj. Tiam prezentiĝos ankaŭ fremdlandaj teamoj de draka danco.

Krome, por la internacia turisma jaro oni aranĝos ankaŭ ekspozicion de antikvaĵoj kun drakaj figuroj, varietojn de tradicia popola arto de Ĉinio, konkurson de fotografado "Or-draka Pokalo", loterian aĉetprogramon, bankedojn kun titolo "Drako" kaj manĝaĵojn kun loka gusto. La premiitoj en la loteria aĉetprogramo ĝuos 7-tagan senpagan vojaĝon en Ĉinio kunportante unu kompanon interne de du

jaroj. Dum la internacia turisma jaro, la Turo sur Tjan'anmen-pordego malfermiĝas al la en- kaj eksterlandaj turistoj. Tjan'anmen-pordego kun alto de 34.7 m. estis konstruita en 1417; la ruĝa kolonaro, la flavaj tegoloj impresas per majesteco. En 1949, Prezidanto Maŭ Zedong prezidis la solenan ceremonion por la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Starante sur la turo, oni povas vidi la vastan Tjan'anmen-placon, la Popolan Halon kaj Historian Muzeon ambaŭflanke de la placo. Kaj starante sur la malantaŭa flanko de la turo, oni povas vidi la tutan konstruajaron de la Malpermesita Civito (Imperiestra Palaco). Estas unuafoje, ke la turo sur Tjan'anmen-pordego malfermiĝas al alilandaj turistoj.

Krom Pekino, ankaŭ aliaj gravaj turismaj urboj de Ĉinio, kiaj Ŝji'an, Kantono kaj Hangĝou, faris aranĝon por turismaj programoj rilataj al drako. Prenante Pekinon kiel la centron, tiuj urboj sufiĉe disvolvas siajn superecojn, por ke la aranĝo montru buntajn lokajn kolorojn.

Karaj amikoj, se vi havas la intencon vojaĝi en Ĉinio, nepre ne preterlasu la bonan ŝancon. Vi estas bonvenaj al Ĉinio en la draka jaro!

Popola drakdanco



Ĝjaling-rivero

Teksto de ĜENG ĜENGJE

Fotoj de SEN ĈEN

Ĝjaling-rivero kun totala longo de 1 153 km. estas branĉo de Jangzi-rivero. Ĝi fontas ĉe la sudo de Ĉinling-montaro en Senŝji-provinco de Ĉinio, trapasas Dabamontaron en Siĉuan, fluas orienten al la urbo Ĉongĉing kaj tie kunfluas kun Jangzi.

Ekirinte de Ĉongĉing, mi faris turismon laŭ la pitoreska Ĝjaling-rivero kaj vizitis kelkajn urbojn kaj vilaĝojn ambaŭborde de la rivero.

En la supra baseno de Ĝjaling-rivero troviĝas belaj turismaj lokoj nomataj "paradizoj sur tero", Ĝiŭĝajgoŭ, Hŭanglong-templo

kaj ankaŭ la rezervejoj Nanpinghe, Tangĝjahe kaj Ŭanglang. Ĝia malsupra riverujo estas mallarĝa, akvo profunda kaj torenta, kio formis grandiozajn kanjonojn Libi, Ŭentang kaj Ĝŭanjin. La gubernioj Ĝŭangjŭan, Ĝjange, Langgong, Nanĉong kaj Heĉŭan de la baseno estas famaj antikvaj kulturaj urboj. La produktaĵoj de la baseno kiaj rizo, tritiko, kolzo, kotono, arakido, fruktoj, silkaĵo k.a. estas tre riĉaj.


MATENO DE ĜJALING-RIVERO

La leviĝanta suno brilas sur la


torenta Ĝjaling-rivero. Estis frua mateno. Tamen ĉe la rivero de la gubernia urbo Heĉŭan leviĝis fajfado de pasaĝera motorŝipo kaj bargo kaj bruo de pasantoj ĉe pramejo. Kaj ĉion ĉi tion superas la laŭta kaj profunda laborkanto de ŝipanoj de Ĝjaling-rivero.

"Kiel bela estas la kanto!" Starante ĉe la river-bordo, mi raviĝis de la mateno de Ĝjaling-rivero. Mi alparolis maljunan ŝipanon. Li nomiĝas Ĉen Anfu, 51-jara, ŝipestro de 32-tonela pasaĝera motorŝipo, kiu povas veturigi pli ol 100 homojn.

Li diris al mi: "En la pasinteco,



Cangŝji ĉe Ĝjaling-rivero



la navigvojo en Ĝjaling estis zigzaga kaj minacas multaj rifoĵoj kaj danĝeraj malprofundaĵoj. Ĉongĉing distancas de Nanĉong nur 321 km., sed kontraŭflue ligna ŝipo devis veturi 12-15 tagojn, kaj laŭflue, 5 tagojn. Nun la ŝipoj veturantaj en ĝi estas plejparte motoraj; la navigvojo estis multfoje ordigita, tial kontraŭflua veturado bezonas 4 tagojn kaj la laŭflua unu tagon. Antaŭe ŝipo nur povis veturi ĝis Nanĉong, sed nun povas ĝis Ĝuangjŭan.”

Iu respondeculo de la registaro de Heĉŭan-gubernio diris al mi, ke depost 1978, kiam Jangzi inter Ĉongĉing kaj Ŝanhajo malfermiĝis al eksterlando, la jara vartransporta povo superis 5 milionojn da tunoj kaj la pasaĝertransporta povo 1.5 milionojn da homoj. La povo okupas la duan lokon en Siĉŭan-provinco, nur malpli ol tiu de Jangzi-rivero.

EN LA HEJMLOKO DE GRANDA PANDO

Kiam mi venis al la urbo Ĝuangjŭan en la supra baseno de Ĝjaling-rivero, ĝuste estis la flora sezono de rododendro. Mi venis al la rezervejo Tangĝjahe. Ĝi situas

en Ĉingĉŭan-gubernio sudokcidente de Ĝuangjŭan-urbo. Ĝi areo estas ĉ. 42 000 hektarojn kaj estas unu el la gravaj bazlokoj de la Besto-protektita Asocio de Ĉinio kaj la Monda Sovaĝvivaĵa Fonduso por esplori la grandan pandon.

La grandaj pandoj en zoo faris al homo impreson mildan kaj malhasteman kaj iom stultan. Sed en densaj sagobamburoj sur montoj unuj post aliaj, grandaj pandoj, kiujn mi vidis, estas sagacaj kaj rapidmovaj, kaj ne povas ilin atingi nemalmultaj bestoj.

La granda pando ŝatas manĝi sagobambuan. Kiam ĝi prenas manĝaĵon, unue ĝi kaptas bambuan trunketon antaŭ si per siaj antaŭaj piedoj, poste ĝin derompas forte. Se ĝi ne povas sukcesi, ĝi do mordas, poste ĝi maĉas ĝin kun bona apetito, kaj la maĉado bruas. En la sagobamburoj troviĝas multaj bambuaj musoj, kiuj ofte mordas bambuajn radikojn. La morditaj bambuoj flaviĝas kaj velkas. La granda pando estas spertulo en kaptado de bambuaj musoj. Aŭdinte la bruon de rongado de musoj, ĝi tuj

serĉas la neston de la muso, senĉese blovis en la truon kaj forte frapadis teron per siaj antaŭaj piedoj por peli la bambuan muson el la nesto, kaj sin ĵetis al la muso.

Por esplori pri la granda pando, sciencistoj ligis al la kaptitaj grandaj pandoj kolrimenon kun radioaparato kaj forlasis ĝin. Laŭ la signaloj de la radioaparato ili povis kolekti diversajn materialojn pri la agado de la granda pando en certa tempo.

En la rezervejo Tangĝjahe vivas ankaŭ orharaj simioj kaj aliaj raraj animaloj, krom granda pando. Ĉi tie estas ne nur paradizo de animaloj, sed ankaŭ regno de vegetaĵoj. Tie kreskas pli ol 3 100 specoj de vegetaĵoj, inter kiuj estas nemalmultaj raraj arbospecoj.

LA MALFACILA VOJO AL ŜU

En la antikveco, por iri de Ŝenŝji al Siĉŭan, oni devis transiri la altajn kaj krutajn montarojn Ĉinling kaj Daba, pere de la surrokmura vojo en aero, ne povante uzi la nunajn Siĉŭan-Ŝenŝji-an ŝoseon kaj la Baŭĝji-Ĉengdu-an kaj Ŝjangfan-Ĉongĉing-an fervojojn. La surrokmura vojo estis konstruita el ligno



sur la krutaj rokmuroj ambaŭborde de Ĝjaling-rivero. Irante sur la vojo kaj rigardante malsupren la torentan riveron, oni sentas vertiĝon. Jen kial la granda poeto Li Baj (701-762 p.K.) de Tang-dinastio veis, ke “la vojo al Ŝu estas pli peniga ol la vojo alĉiela!” Ĉi tie la “Ŝu” dirita de li estis la nuna Siĉŭan. Nun ne ekzistas la antikva surrokmura vojo, sed sur iuj rokmuroj ambaŭborde de Ĝjaling- kaj Jangzi-riveroj ankoraŭ videblas viciĝantaj truoj. En Laŭhuzuj sude de Ĝŭangjŭan mi unuafoje vidis la postsignon de antikva surrokmura vojo. Sude de la loko estas Ĝjanmen-pasejo, kiun antikve “dek mil militistoj ne povis konkeri, se nur unu viro gardis”.

Ĝjanmen-pasejo staras en la nordo de Ĝjange-gubernio kaj estas grava pasejo de Siĉŭan al Ŝenŝji. La nuna Siĉŭan-Ŝenŝji-a ŝoseo trairas la lokon.

Proksime de Ĝjanmen-pasejo troviĝas 72 montpintoj, kiuj ĉiuj estas nuboskrapantaj. Iu klifo kun larĝo de 20 m. kaj longo de 50 m. kvazaŭ estis hakita per glavo kaj similas al pordo, tial la loko nomiĝas “Ĝjanmen” (“ĝjan” signifas “glavon” kaj “men” “pordon” en la ĉina lingvo). Antikve tie estis loko prikonkurenda por strategiistoj.

Malproksime de Ĝjanmen-pasejo estas unu puto nomata



Ĉen Anfu

“puto el pugnofrapo”. Legendo diras, ke kiam la fama generalo Ĝang Fej de Tri Regno (220-280 p.K.) venis al la loko, la soldatoj tre soifis, ili do fosis puton por akiri akvon. Ĝang Fej estis malpacienca. Li enuis de la malrapida fosado kaj forte batis la teron per pugno, je tio fonto ekŝprucis. Tial ĝi ricevis la nomon.

Nemalproksime de Ĝjanmen-pasejo estas zona areo kun longo de 200 km., kie kreskas pli ol 8 000 maljunaj cipresoj. La trunkoj estis tiel dikaj, ke ilian trunkon povas

kune brakumi ne malpli ol 3-4 homoj kun interligitaj manoj. Multaj cipresoj viciĝas ambaŭflanke de la antikva postiljona vojo pavimita per ŝtonaj platoj kaj formas ombran koridoron.

De tempo al tempo preterpasis kampanoj portantaj surdorse bambuan korbon. La bambua korbo estis plektita el bambuaj lamenoj. Portante tian korbon surdorse oni povas liberigi siajn manojn por grimpi sur krutaĵo. Se ili volas ripozi, ili do sidas surtere, apogante sin sur la bambua korbo, sen bezono demeti la korbon. La bambua korbo estas oportuna al la lokanoj. Per tia korbo oni portas grenon, legomojn, kaj iuj virinoj ofte portas infanon en ĝi kaj eĉ doton.


Tagmeze, en la urbeto Ĝjanmen proksima al Ĝjanmen-pasejo mi promenis kaj venis en restoracion vendantan pladojn ekskluzive el toŭfuo. Post nelonge, entuziasma mastro aperigis 7-8 pladojn el toŭfuo sur la tablo. El ili plej plaĉas al mi fame konata plado Mapo-toŭfuo pike akra, aroma kaj varma. Dum manĝado, la direktoro rakontis al mi la

Parto de Nanĉong





Ponto super Ĝjaling-rivero en Ĉongĉing



La Milbudha Rokmuro apud Ĝjaling-rivero en Ĝuangĵuan



Ŝtonaj gravuraĵoj ĉe la
Milbudha Rokmuro



Junulinoj en plukado de
morusfolioj





Kunfluejo de la tri riveroj

Prestinktura laborejo en la Silka Tinkturejo de Nančong





Ombra koridoro



Gjanmen-pasejo

historion de Mapo-toŭfuo: En Ĉengdu de Siĉuan-provinco iu virino nomata Ĉjaŭĉjaŭ edziniĝis al lignokomercisto Ĉen. Malfeliĉe la edzo mortis, kiam ŝi estis 30-jara. Por vivteni la familion, ŝi komencis vendi pladojn el bovaĵo kaj toŭfuo. Ŝia plado havis unikan guston, kaj ŝia entrepreno prosperiĝis. Tiam ŝia manĝejo ne portis nomon. Ĉjaŭĉjaŭ estis variolulo, oni do nomis ŝian manĝejon "Manĝejo de Mapo-toŭfuo" (en la ĉina lingvo "ma" signifas variolon, "po" virinon). Kaj la plado farita el freŝa toŭfuo, bovaĵo, junaj ajlofolioj, ruĝa pipro kaj aliaj materialoj estis nomata "Mapo-toŭfuo".

HEĈŬAN-A DINOSAŬRO

De Ĝjanmen-urbeto suden, traveturinte la gubernian urbon Langĝong kaj la silkan Nanĉong-urbon, mi revenis al Heĉŭan-gubernio en la malsupra baseno de Ĝjaling-rivero. Tie kunfluas la riveroj Pejĝjang, Ĉjuĝjang kaj Ĝjaling. En Heĉŭan-gubernio troviĝas nemalmultaj historiaj objektoj kaj restaĵoj. Inter ili estas fosilia skeleto de saŭropoda dinosaŭro, la plej granda en Azio, trovita sur monttalo en Heĉŭan-gubernio, 1957. La skeleto longas 22 m., altas 3.5 m. kaj nun estas eksponata en la Ĉengdu-a Geologia Instituto.

La dinosaŭro estis giganta besto el la rampuloj. La besto kiel reganto de la mezozoikaj kontinentaj vertebruloj vivis 140 milionojn da jaroj. Poste ili ĉiuj malaperis en la evoluo de la vivaĵoj.

La skeleto de la Heĉŭan-a saŭropoda dinosaŭro eksponata en la Ĉengdu-a Geologia Instituto havas antaŭajn piedojn mallongajn kaj la postajn longajn. Ĝia figuro iom similas al la nuntempa ĉevalo. Laŭ takso ĝi pezis ĉ. 40-50 tunojn kiam ĝi vivis. Ĝiaj kvar dikaj piedoj kvazaŭ estas kvar kolonoj. Pli interese estas, ke la

kapo de la koloso estas tre malgranda. Laŭdire, ĝia cerbo estas tiel malgranda kiel tiu de kato. Kiel la malgranda cerbo povis komandi tiel kolosan

korpon? En la posta parto de ĝia korpo estis nervonodo multe pli granda ol la cerbo. Kiam la cerbo ordonis, la nervonodo ludis rolon de "relajsostacio". ■



Malfermiĝis

Librairie

Grande Muraille

5, Galerie de la rue de Ruysbroeck
1000 Bruxelles

kiu akceptas abonojn por

El Popola Ĉinio

kaj mendojn pri E-libroj kaj E-bildkartoj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

ĈINIO REZERVAS 840 MILIARDOJN DA TUNOJ DA KARBO

La rezervokvanto de karbo de Ĉinio estas 840 miliardoj da tunoj kaj okupas la unuan lokon en la mondo. La produktokvanto de karbo de Ĉinio en 1986 estis 894 milionoj da tunoj kaj okupis la duan lokon en la mondo.

LA PLEJ GRANDA ĈINA SURMARA OLE-KAMPO EN LJAŬDONG-GOLFO

En 1987 oni certigis pri 140 milionoj da tunoj da rezervita nafto en la olekampo Sujĝong 36-1 en Ljaŭdonggolfo, nordorienta Ĉinio. Ĝi estas la plej granda surmara olekampo ĝis nun trovita en Ĉinio. En 1990 oni finkonstruos tie olekampon administratan de Ĉinio mem, kun jara produktokvanto de almenaŭ miliono da tunoj.

ĈINA POLITIKO PRI KOMPENSA UZO DE TERO

En Ĉinio ekzistas granda malekvilibro inter tero kaj loĝantaro. Oni pli kaj pli urĝe kaj pli kaj pli multe postulas teron por urba konstruado. Ĉiujare ekde 1951 la kampoj en la antaŭurbo de Pekino reduktiĝis je ĉ. 6 700 hektaroj; en la pasintaj pli ol 30 jaroj ĉ. 73 000 hektaroj da kampoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo estis okupitaj por tia uzo.

Kun la reformado de la administra sistemo en la urboj, Ĉinio iom post

iom komencas praktiki politikon pri kompensa uzo de tero en la speciala ekonomia distrikto Ŝenĝen, Ĝuangdong-provinco, kaj en iuj grandaj kaj mezgrandaj urboj.

ĈINIO EKSPORTIS PLI OL CENT ŜIPOJN DUM 8 JAROJ

De januaro 1980 ĝis septembro 1987 la Ĝenerala Ŝip-industria Kompanio de Ĉinio plenumis kontrakton pri eksporto de 168 ŝipoj, kun totala ŝarĝkapablo de 1 800 000 tunoj. Krome, oni eksportis ankaŭ puto-borajn kaj ole-kolektajn platformojn, maŝinojn kaj elektrajn aparatojn, kun totala eksporta sumo de 1.75 miliardoj da usonaj dolaroj. Nun pli ol 60% de la ekipaĵoj de la eksportataj ĉinaj ŝipoj estas produktitaj de Ĉinio mem.

ĈINIO HAVAS 13 000 KM. DA OLE- KAJ GASDUKTOJ

La subteraj ole- kaj gasduktoj de Ĉinio trairas ĝiajn 20 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn kaj etendiĝas al rafinejoj, kemiindustriaj fabrikoj kaj olekajoj, kun totala longeco de pli ol 13 000 km., pli granda ol la totala longeco de Jangzrivero kaj la Flava Rivero. Ĉ. duono de ili estis farita kaj transdonita al uzado en la pasintaj dek jaroj.

EDUKA RETO EN TIBETO

En la Tibeta Aŭtonoma Regiono jam formiĝis reto de nacieca edukado de

la pedagogia ĝis la altlerneja. La tibetanaĵkaj alinaciminitataj instruistoj konsistigas 71% de la totala nombro de la instruistoj de Tibeto.

En Tibeto funkcias pli ol 2 500 lernejoj de diversaj niveloj kaj tipoj, kun 160 000 lernantoj, inter kiuj estas 140 000 tibetanoj kaj aliaj naciminitatanoj. De 1980 Tibeto diplomis 5 500 alt- kaj mezlernejanajn kaj sendis eminentajn studentojn eksterlanden por daŭra lernado.

50 MILIONOJ DA HANDIKAPULOJ EN ĈINIO

Specimena enketo diras, ke sur la ĉina kontinento vivas ĉ. 51.64 milionoj da handikapuloj de diversaj kategorioj, kiuj apartenas al 40 milionoj da familioj el almenaŭ 200 milionoj da homoj.

La specimena enketo havigis al la ŝtato materialojn pri la nombro, disemiteco kaj proksimuma aĝo de la handikapuloj kaj la kaŭzo de ilia handikapiĝo, kaj pri iliaj kuracado, resaniĝo, eduko, okupiĝo, geedziĝo, familia kaj socia vivo, tiel ke la ŝtato povas bone fari ideologian laboron inter la handikapuloj kaj solvi iliajn problemojn.

LA ĈINA FILMO "MALNOVA PUTO" GAJNIS INTERNACIAN PREMION

En la Sepa Internacia Filmofestivalo en Havajo la ĉina filmo "Malnova Puto" gajnis la specialan premion de la juĝkomitato. Ĝi estas la kvara ĉina filmo premiita en tia festivalo.


GAŬ MIN GAJNIS LA ĈAMPIONECON DE VIRINA TRAMPOLINO-PLONĜO EN INTERNACIA KONKURSO

Ĉina sportistino Gaŭ Min per 560.16 poentoj gajnis la ĉampionecon de virina trampolino-plonĝo en la Internacia Plonĝa Konkursokazinta en Londono en la 5-a de decembro 1987. Alia ĉina plonĝistino Li Jihŭa gajnis la subĉampionecon de tiu sportbranĉo.

ĈINAJ ARKEOLOGOJ MALKOVRIS MAŬZOLEAN REGIONON


Eksportota ŝipo kun 27 000 toneloj konstruita de Ĝjangnan-ŝipfarejo de Ŝanhajo





Gestudentoj de la Tibeta Agrikultura kaj Brutobreda Instituto en eksperimentado

Gaŭ Min (meze) kaj Li Jihŭa (maldekstre) sur la podio



Arkeologoj de la Ŝenŝji-a Arkeologia Instituto kaj aliaj organizoj malkovris regionon de maŭzoleoj de reĝoj de Ĉin-regno kun areo de pli ol 24 kvadrataj kilometroj ĉe la piedo de Liŝan-monto okcidente de la urbo Ŝji'an. Ili konstatis, ke subtere estas imponaj konstruoj kun mistera strukturo. Tie kuŝas maŭzoleoj de tri reĝoj de Ĉin-regno antaŭ la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio (221-210 a.K. sur trono). La trovitaj maŭzoleoj havas gravan valoron por studi la tiamajn politikon, ekonomion, militajn aferojn, kulturon kaj historion.

VIRO KUN TRANSPLANTITA RENO TRAVIVINTA DEK JAROJN

Antaŭ dek jaroj paciento Li Ĝjanĝou agoniiis pro rena kadukiĝo. Kuracisto de la Ĝenerala Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo fortranĉis lian senutilan renon kaj transplantis al li sanan renon de alia korpo. Dum la pasintaj dek jaroj li laboris kaj vivis tute kiel sanaj homoj. Li edziĝis kaj naskiĝis al li filino.

VORTOHAVAJ PAPERFOLIOJ DE LA ORIENTA HAN-DINASTIO ELTERIGITAJ EN LANĜOU

En la meza tagdeko de oktobro 1987 laborantoj de la Lanĝou-a Muzeo de Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio, trovis tri rondajn paperfoliojn kun diametro de 17 centimetroj en tombo de la Orienta Han-dinastio (221-280), tiel ke oni

povas propraokule vidi la paperon faritan antaŭ pli ol 1 000 jaroj.

La paperfolioj estis trovitaj sur kupra spegulo. Post la elteriĝo ili aspektas blankaj. Ili estas egale dikaj ĉiuloke, molaj kaj fortikaj. La skribaĵoj sur ili estas klaraj.

PLI OL 30 VERSIOJ DE "SONĜO EN RUĜA BUDUARO"

En la mondo troviĝas pli ol 30 versioj de la fama ĉina klasika romano, "Songo en Ruĝa Buduaro" en 16 lingvoj. En 1793 komerca ŝipo veturanta de Ĝeĝiang-provinco de Ĉinio al Nagasaki de Japanio portis ksilografitan eldonon de "Songo en Ruĝa Buduaro", la plej frue cirkulantan eksterlande. De post la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento iom post iom multiĝis versioj de tiu libro.

BUSTOJ DE LUSIN KAJ SUN JONG INAŬGURITAJ EN HUNGARIO

Antaŭ nelonge en la hejmloko de la granda hungara poeto Petofi inaŭguriĝis bustoj de granda ĉina verkisto Lusin kaj ĉina tradukisto Sun Jong. La bustoj estis faritaj de du ĉinaj skulptistoj kaj donacitaj de la Kultura Ministerio de Ĉinio al Hungario.

MISTERO DE KAVERNDOMOJ DE ŜANŜJI MALKOVRITA

Kaverndomoj estis kreo de ĉinaj prauloj por utiligi subteran spacon.

Antaŭ nelonge la angla ĵurnalo "The Times" raportis, ke post 50-jara esplorado pri loĝantoj de kaverndomoj en Ŝanŝji kaj aliaj lokoj de Ĉinio, sciencistoj trovis kaŭzojn de iliaj longviveco kaj bonfarto: (1) La temperaturo de la kaverndomoj estas 10-22°C kaj la relativa grado de humideco de la domoj estas 30%-75%, kiuj tre taŭgas por la homa vivmedio; (2) La kaverndomoj ŝirmas la loĝantojn kontraŭ malbona klimato kaj radioaktivaj substancoj en la atmosfero, ke rimarkinde reduktiĝas astmo, bronkito, reŭmatismo kaj haŭtaj afekcioj.

RINCODONO KAPTITA DE ĜOUŜAN

Antaŭ nelonge fiŝistoj de Ĝouŝan-fiŝkapejo en la Orienta Ĉina Maro kaptis rincodonon (*Rhincodon typus*) 8.9 metrojn longan kaj pli ol 8 tunojn pezan, kiun oni jam faris specimeno por konservo.

NEĜLEOPARDOJ TROVITAJ EN SIĈUAN

Lastatempe oni trovis rarajn neĝleopardojn en la turisma loko Ĝiuĝajgoŭ en norda Siĉuan-provinco kaj sur la stepo de nordokcidenta Siĉuan. La neĝleopardoj havas longajn harojn, densan lanugon kaj belajn striojn sur la haŭto. Iliaj kruroj estas mallongaj kaj iliaj ungoj entireblaj kaj akraj kiel tiuj de kato. Kun karnaj plandoj, ili kuras lerte kaj senbrue.

Bonaŭguraj animaloj en Ĉinio

de LAN ŜAN

Antikvaj ĉinoj rigardis iujn animalojn kiel simbolon de bonaŭguro kaj nomis ilin bonaŭguraj animaloj. La bonaŭguraj animaloj estas klasifikitaj en birdojn kaj bestojn, kaj ankaŭ iuj birdoj kaj bestoj tute ne estas realaj sed imagitaj de la homoj laŭ ilia bela idealo. Ni jam konigis drakon kaj *feng*, la plej respektatajn bonaŭgurajn animalojn de ĉinoj. Nun ni konigas al vi iujn aliajn bonaŭgurajn animalojn.

Ĉjilin estas mita besto. En la antikveco ĉinoj rigardis "*ĉjilin*, *feng*, testudon kaj drakon" kiel kvar diojn, *ĉjilin* estis la unua kaj reĝo de ĉiuj bestoj. En la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) inter la bronza bestofiguraj ornamaĵoj inkrustitaj per oro kaj arĝento estis besto kun cerva korpo kaj unu korno, kiu estas figuro de *ĉjilin* kaj la plej frue trovita ĝis nun. En la ĉinaj dinastioj multaj literaturistoj verkis artikolojn kaj poemojn kun temo de *ĉjilin*, pentristoj kaj metiartistoj spegulis diversajn figurojn de *ĉjilin* en abundo da artaĵoj kaj donis al ili misteran koloron. La figuro de *ĉjilin* estas

tre stranga, ĝi havas drakan kapon, cervan kornon, tigrajn dentojn, bovajn kruojn, drakajn ungojn kaj voston de *feng*. Ĝia korpo estas giganta kaj kovrita de leona haŭto kaj skvamkiraso. Ĝi ofte ludas per ronda fajra globo.

Ĉjilin estas milda. Kvankam ĝi havas kornon sur la kapo, tamen la korno estas karneca kaj ne povas esti uzata kiel armilo, tial ĝi estas rigardata kiel "humana besto". En la historio oni prenis ĝin kiel simbolon de bonaŭguro. Por prikanti imperiestrojn oni ofte teksis miton pri *ĉjilin* por konstati la "sanktecon" de la imperiestroj kaj grandan ordon sur la tero. En Han-dinastio cirkulis legendo, ke imperiestro Udi (140-88 a.K. sur trono) akiris *ĉjilin* kaj ŝanĝis la kronologian titolon. *Ĉjilin* plaĉis ankaŭ al la popolanoj. Ili ofte donacis la bildon "*Filodonacanta ĉjilin*" al novgeedzoj, dezirante al ili multe da filoj kaj nepoj, por pliigi ĝojigan atmosferon. Oni ankaŭ asociis *ĉjilin* kun *feng*, komparis kun ili noblulojn kaj figuris raran kaj karan objekton per "*ĉjilin*-a korno".

La testudo estas nura animalo ekzistanta en la naturo el la "kvar diaj animaloj". En mezozoiko la


testudo vivis kune kun dinosaŭroj tere kaj akve. Ĝi kun historio de 200 milionoj da jaroj estas unu el la plej antikvaj animaloj sur la tero. Ĝiaj dorso kaj abdomeno estas kovritaj de karapaco, en kiun la besto povas entiri la kapon, voston kaj piedojn por eviti danĝeron. Tial antaŭ 70 milionoj da jaroj, kiam okazis katastrofo kaŭzita de la transformiĝo de la tero, dinosaŭroj pereis, dum la testudo travivis la naturan katastrofon kaj postvivis ĝis nun, dank' al siaj firma karapaco kaj eltenemo al soifo.

La testudo estas respektata kiel profeta dio ekde la legenda epoko en la prahistorio de Ĉinio. La besto ĉiam simbolis feliĉon, noblecon kaj longevivecon kaj okupis favoran pozicion antaŭ Ĵuan-dinastio (1271-1368 p.K.). Oni ŝatis ornami flagojn, standardojn, militajn dekretojn, mandarenajn sigelilojn kaj kostumojn, monerojn, bronzaĵojn k.a. per testuda figuro. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) korteganoj uzis sigelilojn kun testudforma tenilo. En Tang-dinastio (618 - 907 p.K.) altrangaj mandarenoj portis kun si fiŝorman saketon kaj oran rubandon

Ruĝverta gruo



Makulaj cervoj



kun testuda figuro. Imperiestrino U Zetjan ordonis en 691 p.K., ke ĉiuj mandarenoj ŝanĝu sian fiŝforman saketon per testudforma. El tio oni povas vidi, kiel altan pozicion havis la testudo sisteme.

Post Jŭan-dinastio okazis miskompreno pro tio, ke oni ne sciis, kiel distingi masklajn testudojn disde la femalaj, kio abrupte malaltigis la pozicion de testudo. Malgraŭ tio, nun oni ankoraŭ povas vidi testudojn sur pentraĵoj, gravuraĵoj kaj aliaj metiartaĵoj.

Ŝjeĝi estas stranga mita besto. En ĉina antikva libro estas skribite, ke ĝia korpo similas al kapro, la kapo al tiu de leono, kun unu korno sur la kapo, blua hararo kaj kvar piedoj parhufaj sur la korpo. Laŭ la konservataj ŝtongravuraĵoj ĝi estas kovrita de skvama kiraso.

La mita *ŝjeĝi* estis fidela kaj justa. Ĝi kapablis ĝuste distingi veron disde malvero. Kiam okazis lukto aŭ kverelo, ĝi povis distingi, kiu pravis kaj kiu ne. Kiam ĝi trovis krimulon, ĝi tuj sin ĵetis al li, mordis lin, pikis lin per sia korno, ke tiu ĉi ne povis eskapi de inda puno. Tial oni laŭdis ĝin "jura besto". Oni ofte starigis statuon de *ŝjeĝi* sur la pordoj de malliberejoj.

En la dinastioj Ming kaj Ĉing (1368-1911 p.K.) juĝistoj portis *ŝjeĝi*-forman ĉapon dum juĝado, por atesti, ke ili estas justaj, povis klare distingi veron disde malvero kaj ĝuste trakti la proceson. Tiam en la kortego estis kelkaj oficialaj akuzistoj, kies vesto surhavis broditan *ŝjeĝi*-figuron por montri, ke ili devas batali kontraŭ malbonuloj en ia ajn rango kaj akuzi ilin antaŭ imperiestro.

La ruĝverta gruo estas fama kurioza birdo en la mondo. Ĝi havas blankajn plumojn sur la korpo, nigrajn plumojn sur la flugiloj. Pro la nuda haŭto de ruĝa koloro ĝi ricevis la nomon. Ĝi kun sonora voĉo kaj granda flugpovo

ofte vadas en marĉo. Ĝi havas longajn krurojn kaj kolon. Ĝiaj movoj estas graciaj kaj tre plaĉaj. En la "Libro de Poezio" antaŭ pli ol 2 000 jaroj estas laŭdo: "Krio de gruo en profunda marĉejo aŭdiĝas malproksime ĝis la ĉielo."

La dioj kaj feoj en la ĉina taoismo libere flugas en la ĉielo, ofte rajdante sur ruĝvertaj gruoj. Tial ĝi ricevis alian nomon "fea gruo". Oni rigardas ĝin kiel simbolon de longeviveco pro ĝia longa vivo. "Longan vivon kiel de gruo", "longan vivon kiel de pino kaj gruo" estas vortoj ofte uzataj por gratulo.

La plejparto de la ruĝvertaj gruoj vivas en Ĉinio, kaj la resta parto en Japanio, Koreio kaj Sovetunio. La gruo jam enviciĝas inter la valoraj kaj kuriozaj specoj de animaloj de la mondo kaj estas difinita kiel unuaklasa protektenda animalo de Ĉinio pro sia kuriozeco.


La makula cervo estis bonaŭgura besto en la antikva Ĉinio. Ĝi servis kiel veturilo de mitaj longevivuloj kaj estis kunulo de la longevivuloj, tial ĝi fariĝis simbolo de longeviveco. En mito la makula cervo estis priskribita kiel cervo kun oraj kornoj, hufoj, oreloj, dentoj kaj ankaŭ la makuloj estis origitaj.

Fakte la makula cervo estas speco el la familio de cervedoj kaj ĝia korpo longas 1.5 metrojn. Ĝi havas longan kolon, grandajn orelojn, gracian korpon, malgrasajn kaj longajn krurojn kaj mallongan voston. Ĝia bela korpo estas punktita de blankaj makuloj kiel umefloroj. Ĉiuj partoj de la makula cervo estas valoraj: ĝia karno estas manĝebla, la haŭto estas materialo por ledo, ĝiaj tendeno, vosto, embrio, sango kaj reno estas drogoj. Precipe la plurbranĉaj kornoj de vira cervo estas valorega drogo.

Pro longtempa barbara ĉasado la nombro de sovaĝaj makulaj



Bronza statuo de *ĉjilin* en la Imperiestra Palaco de Pekino



Bronza statuo de testudo en la Imperiestra Palaco de Pekino

cervoj malgrandiĝis. Ili jam malaperis en multaj lokoj. Tial, la makula cervo estas difinita kiel unuaklasa protektenda animalo de Ĉinio. Nun sovaĝaj makulaj cervoj multiĝas en iuj rezervejoj de Ĉinio. La bredado de makulaj cervoj disvolviĝas rapide. Makulaj cervoj, originaj de Azio, estis eksportitaj en multajn landojn. ■

Sin gardi de internacia egoismo

En la Supera Kunveno de Francilingvaj Ŝtatoj okazinta en Kanado je la fino de la lasta aŭgusto, gvidanto de okcident-eŭropa lando kritikis egoismon de iuj industriaj landoj en la internacia ekonomia agado. Li skurĝis ilian "maljustan sintenon" kaj "hontindan agon" en traktado, helpo, monprunto kaj investo al la disvolviĝantaj landoj.

La problemo preparolita de la ŝtata gvidanto ne estas nova, sed tio estis ĝenerale montrata de la suferintaj landoj. Estas neordinare, ke tion traktis gvidanto de industria lando. Tio montris, ke la egoismo de industriaj landoj al la disvolviĝantaj landoj, de riĉaj landoj al la malriĉaj jam atingis gradon maltrankviligan.

Cirkulas proverbo inter komercistoj "negoco estas negoco," kiu signifas, ke profiti en komercado estas normale. Neeviteblas, ke la riĉaj landoj profitas pli multe en la ekonomiaj interrilatoj de nordaj kaj sudaj landoj. Multaj ekonomiaj interrilatoj ne estas tute senutilaj por malriĉaj landoj. Tamen iuj evoluintaj landoj ŝatas fari egoismajn kaj netolereblajn aferojn, sin ferminte en egoisma kaĝo. Ĉi tie mi mencias malnovan okazaĵon por vekti atenton ĉe la publiko.

Nokte de la 3-a de decembro 1984, fumo vualis Bhopal, la ĉefurbon de la Centra Ŝtato, Hindio. Loĝantoj eldomiĝis,

kuregis laŭ stratoj. Multaj homoj flaris akran odoron, suferis kapturton, falis surteren kaj forlasis la homan mondon pro nekonata kaŭzo. Tion estigis venena gaso ellasita el insekticid-fabriko sub usona translanda korporacio. En kelkaj tagoj mortis miloj da homoj kaj vundiĝis dekmilo da homoj.

La translanda korporacio posedas kelkajn fabrikojn en Hindio kaj ankaŭ similajn fabrikojn en aliaj disvolviĝantaj landoj. En iuj evoluintaj landoj la produktado de la fabrikoj, kiuj ellasis venenan materion, estas malpermesita. Tial tiuj fabrikoj translokiĝis en disvolviĝantaj landojn. Iuj internaciaj organizoj avertis pri la danĝero.

Estas timinde, ke iuj medikamentoj kun troa flankefiko, limigitaj kaj eĉ malpermesitaj, en la evoluintaj landoj, estas importitaj en multajn disvolviĝantaj landojn. Tiuj landoj ĉiujare importas medikamentojn kun valoro de miliardoj da usonaj dolaroj. Inter ili ja troviĝas utilaj medikamentoj kaj ankaŭ la malutilaj pro manko de rigoraj reguloj.

Kvankam iuj hormonaj medikamentoj povas kuraci malsanojn, tamen ili entenas fortan flankefikon kaj malutilas al infanoj. La okcidentaj ŝtatoj malpermesas aŭ limigas ilian uzon en kuracado, sed kelkaj eŭropaj kaj amerikaj farmaciaj korporacioj vendas ilin

plu en Azio. Ekzemple, iuspeca analgeziko kun veneno ne estas plu aplikata en multaj okcidentaj ŝtatoj, tamen iuj medikamentoj eksportitaj al disvolviĝantaj landoj ankoraŭ entenas tiuspecan materion.

En merkatoj de la evoluintaj landoj la farmaciaj produktantoj devas aldoni klarigon pri la flankefiko de siaj medikamentoj. Sed al la samaj medikamentoj transportitaj al disvolviĝantaj landoj ne nur mankas la averto sed male aldoniĝas bombasto pri ili. Ekz., en la lastaj jaroj, la okcidentaj landoj faris malpermeson al fumado, oni ĝenerale konas la malutilon de fumado al la medio kaj sano. Kaj sinsekve aperis severaj difinoj: Malpermesi fumadon en la oficejoj kaj publika loko; fabrikoj ne dungas cigaredajn fumantojn kaj registaraj institucioj maldungas tiujn, kiuj rifuzas abstinadon pri fumado. Samtempe kŭn tio cigaredaj korporacioj faris dumpingon al disvolviĝantaj landoj por gajni grandan profiton kun la celo kovri la enlandan perdon tiurilate. La vortoj, "Doktoro avertas, ke fumado malbonigas la sanon" presitaj sur cigaredujoj estis forigitaj, kiam la cigaredoj vendiĝis en aziaj, afrikaj kaj latin-amerikaj merkatoj.

Estas ofte videble, ke la evoluintaj landoj vendas en disvolviĝantaj landoj malaltk-

La bela pitoreskejo Ulingjūan

En la profunda Uling-montaro, okcidente de Hunan-provinco, kuŝas mirinda turisma loko. Tio estas la pitoreskejo Ulingjūan kun perimetro de pli ol 150 kilometroj. Tie staras miloj da groteskaj rokaj

montpintoj, kaŝiĝas sennombraj profundaj kaj kvietaj kavernoj kaj ravinoj, verdas arboj kaj murmuradas riveretoj. En la arbaro flugas valoraj birdoj kaj vagas raraj bestoj, kio donas pli da

sovaĝeco al la pitoreskejo.

Antaŭ pli ol 300 milionoj da jaroj tie etendiĝis senlima maro. Post tre tre multaj jaroj tie aperis la nuna tersurfaco el kvarca grejso. Oni diras, ke Ulingjūan

valitajn maŝinojn kaj ekipaĵojn kiel bonkvalitajn. Alia egoisma maniero estas reteni gravajn maŝinpecojn. Laŭdire, tio povas longigi la dependecon de la aĉetantoj al la vendantoj.

En la arsenaloj de industriigitaj landoj elmodiĝas armilaj specoj. Por fabriki ilin oni elspezis multan monon. Kiel solvi la problemon? Unu maniero estas oferti ilin al la tria mondo. En la lastaj 10 jaroj la valoro de la armiloj venditaj en la tria mondo superis 100 miliardojn da usonaj dolaroj. La profito gajnita el la vendo helpis ilin en esplorado kaj provfarado de pli avangardaj armiloj. Ĉu tio ne estas por ili ĝojiga afero? Estas nekonsiderinde, ĉu tio pezigas la ŝarĝon de aliaj kaj damaĝas la pacon.

Laŭ koncerna statistiko, de 1984 la monsumo de la tria mondo fluanta al la industriigitaj landoj estis pli multa ol la monsumo, kiun la tria mondo ricevis de la evoluintaj landoj en formo de pruntepreno kaj helpo.

Junie de la lasta jaro raporto de la Internacia Valuta Fonduso-

Organizo montris: En 1986 la tria mondo elspezis al evoluintaj landoj monsumon por kvitigi la ŝuldon pli multan ol la sumo prunteprenita de tiuj landoj. La ŝuldo kvitigita de la latin-amerikaj landoj estis 4.2 miliardoj da usonaj dolaroj, sed ili prunteprenis nur 2.7 miliardojn.

Nun la ŝuldo de la disvolviĝantaj landoj atingis 1 000 miliardojn da usonaj dolaroj. Ĉiujare pliiĝas rapide la interezo de ŝuldo. Statistiko de UN montris, ke pliiĝas ĉiujare la neta profito, kiun la okcidentaj privataj bankoj ricevis de la disvolviĝantaj landoj, la lastaj fariĝis monkontribuantoj de la okcidenta financo.

La grandaj okcidentaj bankoj ĉiamaniere deponas grandan monsumon de riĉuloj en la disvolviĝantaj landoj, la deponita monsumo fariĝis granda forto ĉe la grandaj bankieroj.

Kompreneble, la riĉaj deponantoj de disvolviĝantaj landoj respondecas pri tio. Ili opinias, ke la bankoj en la riĉaj landoj estas fidindaj kaj povas gardi ilian sekreton, ĝuste tiun psikon utiligis la mondaj bankieroj.

La ekonomiaj fortoj de la disvolviĝantaj landoj estas tro diferencaj de tiuj de la evoluintaj, tial ili ofte troviĝas en malbona situacio. Ekz., en la internacia negoco ekzistas protektismo kaj ankaŭ komercliberalismo. La komercliberalismo havas multajn komplikajn ĝustigojn kaj limigojn, kvalitajn kaj teknikajn regulojn, limigan kvanton de importaĵoj ktp., kiuj formis reton por limigi importadon de elementaj produktaĵoj. En la lastaj jaroj iuj disvolviĝantaj landoj suferis de malpliigo de eksportaĵoj aŭ fremdvaluta malpliigo, kvankam pliiĝis la eksporto.

Ĝuste pro tio, la disvolviĝantaj landoj forte postulas la nord-sudan interparolon kaj fondon de nova internacia ekonomia ordo. Malgraŭ ke la alvoko estas laŭta kaj la disputo en internaciaj kunvenoj akra, la racia postulo eble ne ricevos respondon en la proksima estonteco.

La internacia kunlaboro kaj interŝanĝo daŭros malgraŭ la malracia realo. Tamen en la ekonomia agado oni devas sin gardi de la internacia egoismo. ■

estas "belulino en buduaro nekonata de homoj", ĉar tiu pitoreskejo, konservanta la sovaĝan staton, estas trovita nur en la lastaj jaroj kaj ankoraŭ multaj montoj en la loko estas nekonataj. Nun la pitoreskejo plena de sovaĝeco altiras pli kaj pli multajn turistojn en- kaj eksterlandajn per siaj ĉarmaj pejzaĝoj.

La pitoreskejo Ulingjūan konsistas el la Ŝtata Arbara Parko Ĝangĝjaĝje de la urbo Dajong, la natura vidindejo Sūoŝjiju en Cili-gubernio kaj la natura vidindejo Tjanziŝan en Sangĝi-gubernio. Ili, kiel tri ĝemeloj starantaj en triangula formo, kaj ĉiu kun sia aparta ĉarmo, formas unu tuton.

Ĝangĝjaĝje havas alian nomon Ĉingjan-monto kaj estas difinita kiel ŝtata arbara parko en 1982. Tie la arbara areo konsistigas 97.7%, de la tuto, kreskas primitivaj arbaroj kaj konserviĝas multaj antikvaj valoraj specioj de arboj.

Cirkulas la onidiro, ke Ĝangĝjaĝje havas "3 000 montpintojn kaj 800 riveretojn". Tie konkuras diversformaj rokaj montpintoj: iuj similas al jadaj kolonoj kaj oraj vipegoj ĉielskrapantaj, aliaj al muregoj, imponaj kaj gigantaj, kaj triaj estas danĝeraj, kvazaŭ interligitaj per fadenoj kaj paperoj. En Ĝangĝjaĝje troviĝas riveretoj, 4 fontoj kaj 2 akvofaloj. La roja akvo malvarmeta kaj dolĉa fluas malsupren laŭ krutaj rokoj kaj montdeklivoj, preterirante arbojn kaj ruĝajn rokojn, kio ĉarmigas la montajn pejzaĝojn.

Veninte al Ĝangĝjaĝje, oni nepre devas viziti la Flavleonan Montpinton. La montpinto estas alta 1 200 metrojn super la marnivelo. Ĝi ricevis la nomon pro sia aspekto simila al surventre kuŝanta leono. Ŝtonplata ŝtuparo kondukas al la montsupro. Ambaŭflanke de ĝi bonorde kreskas densaj kaj maldensaj

plantitaj abioj. La pado el ŝtupoj estas en ombro de arboj kaj regata de kvieto. Grimpane laŭ la ŝtupoj, oni povas spekti la Kudrilegon por Marsubigo, Sudan Kolonon de la Ĉielo, Oran Testudon en Nebula Maro kaj aliajn groteskajn montpintojn kaj rokojn. La montsupro aspektas plata, kun areo de 20 hektaroj. Tie ĉi oni povas havi la panoraman vidon de Ĝangĝjaĝje. Jen kial la lokanoj diras: "Se l' Flavleonan Pinton vi ne vidus, vi vane Ĝangĝjaĝje vizitus."

La vidindejo Sūoŝjiju kun areo de ĉ. 14 667 hektaroj, oriente de Ĝangĝjaĝje, havas pli ol 200 pitoreskajn punktojn, inter kiuj la Okcidenta Maro estas la plej bela. Ĝi kun perimetro de ĉ. 10 kilometroj, ĉirkaŭita de montoj, estas baseno nesondebla. Rigardate de alte, ĝi aspektas kvazaŭ grandega ĉinstila pentraĵo. Post pluvo ĝi prezentiĝas pli poezia. En profunda ravino, de densaj verdaj laktoblankaj nebulkolonoj leviĝas supren kaj post momento plenigas la plejparton de la ravino. Jen la vasta, kvieta kaj profunda ravino turniĝas en nebulan maron kaj la ondantaj montpintoj sinkis en la nebulon. Post kelka tempo la verdaj montsuproj eliĝas el la nebula maro kiel insuloj en maro. Homoj starantaj en nebulo sentas sin kvazaŭ en fea lando. Kia ĉarma vidaĵo!

La alia vidindejo de Sūoŝjiju estas 5-kilometra galerio. Oni povas diri, ke tie estas vidindaĵoj ĉie kaj ĉiu vidindaĵo estas mirinda. En la galerio unue la okulojn frapas roka giganto, tre simila al longevivulo kun blankaj brovoj kaj haroj. Ĝi estas kun miela rido sur la klarkontura vizaĝo kaj alte levita maldekstra brako, kaj kvazaŭ bonveniganta turistojn el diversaj partoj. Irante laŭ la pado de la galerio malsupren, oni povas spekti la Drogokolektan Maljunulon, Muĝantan Tigron kaj Ĉielorigardantan Muson, kaj

ankaŭ Geedzan Rokon, Simiodeklivon, Feinan Ponton k.a. Tiel la sennombraj mirindaj montpintoj kaj groteskaj rokoj kvazaŭ konsistigas la tutan galerion kun diversaj skulptaĵoj.

Trairinte Sūoŝjiju, oni povas atingi Tjanziŝan-monton. Per aŭto oni povas veturi rekte al la montsupro. Tjanziŝan-monto kovras areon de 6 667 hektaroj kaj ĝia ĉefmontpinto altas je 1 250 metroj super la marnivelo. Ĝi similas al grandega pagodo. Starante sur ĝia supro oni havas panoraman vidon de ĉiuj montoj kaj ravinoj de Uling-monto. Ĉirkaŭ la monto serpentas 45-kilometra vojo kunliganta 7 grandajn pitoreskejojn. Laŭ la vojo dislokiĝas pli ol 80 naturaj terasoj por ĝui la pejzaĝon, ĉiu en duoninsula formo, kun longeco de dekoj aŭ centoj da metroj. Ili etendiĝas antaŭen en kvietajn ravinojn. Iliaj randoj malleviĝas apike al la fundo de ravino. Kiom profundaj estas la ravinoj, neniu scias. Oni neniel povas malsupreniri laŭ tiel krutaj klifoj. De multaj jaroj la ravinoj estas enigmo, kiu allogas kaj timigas homojn.

En la pitoreskejo Ulingjūan loĝas tuĝja-oj, mjaŭ-oj, baj-oj kaj aliaj nacimalplimultanoj. En la gastejo de Tjanziŝan servas bajnaciecaj gejunuloj. Ili en naciaj kostumoj kaj ornamaĵoj estas tre fervoraj kaj de tempo al tempo kantas por turistoj popolkantojn furorajn en la loko. La belsonaj voĉoj ebriligas la turistojn per sia loka gusto.

Nun, la pitoreskejo estas en streĉa ekspluatado kaj konstruado. En la vidindejoj jam funkcias diversaj restoracioj kaj hoteloj. En Ĝangĝjaĝje sola servas 25 restoracioj kaj hoteloj kun 368 mez- kaj altklasaj litoj. Ankaŭ aliaj instalaĵoj estas en konstruado. Al la vidindejoj kondukas fervojoj, ŝoseoj kaj akvovojoj de ĉiuj direktoj. La trafiko estos pli facila, post kiam finkonstruiĝos la flughaveno de Dajong. ■




Ĉarmaj montpintoj vualitaj de nebulo

Kvieta valo kaŝita de smeraldaj montoj .






Montpintoj konkurantaj pri beleco



La Sola Subtenilo de la Ĉielo

Tutlandaj sportkunvenoj de Ĉinio

de Ke Ming



Inter septembro 1959 kaj novembro 1987 Ĉinio okazigis ses tutlandajn sportkunvenojn. Por ĉiu sportkunveno la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis memorigajn poŝtmarkojn. Tiuj serioj da poŝtmarkoj estas tre ŝatataj de la filatelistoj. En la unua vico (de maldekstre): poŝtmarko pri la stadiono de la Unua

Tutlanda Sportkunveno (serio el 16 pecoj emisiita en la 28-a de decembro 1959); kaj poŝtmarko pri la inaŭguro de la Dua Tutlanda Sportkunveno (serio el 11 pecoj emisiita en la 28-a de septembro 1965). En la dua vico (de maldekstre): poŝtmarko "Disvolvo de Sporto" por la Tria Tutlanda Sportkunveno (serio el 7 pecoj emisiita en la 12-a de septembro 1975); miniatura peco kun emblemo de la sportkunveno en la centro por la Kvara Tutlanda Sportkunveno (serio el 4 pecoj emisiita en la 15-a de septembro 1979); kaj poŝtmarko pri la emblemo de la Kvina Tutlanda Sportkunveno (serio el 6 pecoj emisiita en la 16-a de septembro 1983). La subaj estas 4-peca serio por la Sesa Tutlanda Sportkunveno emisiita en la 20-a de novembro 1987. La kvin koloraj linioj sur la poŝtmarkoj formas la ciferon 6.